

# Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo n-ro 11 (decembro 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

**Kontribuis** James Bridge, Evgeny Khvalkov, Laimundas Abromas, Przemysław Paweł Grzybowski, Minosun, Kanglong, Wei Lai, Bardhyl Selimi, Leming Lin, Vejdo, Yang Fang, Guozhu, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Wang Chongfang, Mikaelo Bronštejn, Jorge Camacho, Tiberio Madonna, Rita Mkrťjan, Maria Nazaré Laroca, Feri Floro, Yi Qiao, Mao Zifu, Niuniu, Sero, Saulo Salgado Wanderley, Erika Godó, Jadaranka Miric, Ivanichka Magharova, Rovere Emanuele, Eto, Ardo, Fang Hong, Jouko Lindstedt, John Huang

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Alain Roza Courbou

# Enhavo

## Originala prozo

James Bridge: Brulvundita de la suno.....	003
Evgeny Khvalkov: Konduktoro.....	009
Laimundas Abromas: Ho kutimoj, ho moroj k.a.....	014
Przemysław Paweł Grzybowski: La domo de forgesitaj libroj.....	017

## Tradukita prozo

Mao Dun: Luko (trad. Minosun), Frapoj je la pordo (trad. Kanglong).....	022
Sun Guoyan: “Neatendita elektropaneo” (trad. Wei Lai).....	025
Iljet Alička: Kolegoj (trad. Bardhyl Selimi).....	028
Guy de Maupassant: Patro Milon (trad. Leming Lin).....	034
Chiung Yao: En profunda korto (11) (trad. Vejdo).....	039
Yang Qingshu: Enpaki nian amon (trad. Yang Fang).....	048
Anonima: Li Mo (trad. Guozhu).....	050
Fratoj Grimm: Tri serpentfolioj k.a. (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser).....	052
Su Shi: Odo al la Ruĝa Klifo (trad. Wang Chongfang).....	058

## Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn: Al la nepino k.a.....	062
Jorge Camacho: Senrajte.....	067
Tiberio Madonna: Taga sceno, Nokta sceno.....	070
Rita Mkrťjan: Kelkaj poemoj.....	073
Maria Nazaré Laroc: Estu lumo k.a.....	075
Feri Floro: Sereneco k.a.....	078
Yi Qiao: Revsopiro al novepoko k.a.....	085
Vejdo: Fantazi’ de juna melkistino.....	090
Mao Zifu: Amon fordrinkis.....	092
Niuniu: Inter domegoj k.a.....	092
Sero: Aŭtuna pejzaĝo.....	096

---

Saulo Salgado Wanderley: Nature k.a.....	097
Erika Godó: Varmaj someraj noktoj k.a.....	098
Jadranka Miric: Mia najbarino, Duda k.a.....	101
Ivanichka Magharova: Fasko da hajkoj.....	103
Rovere Emanüele: Esperantistoj k.a.....	105
<b>Tradukita poezio</b>	
Li Sangyin: Sentitole k.a. (trad. Eto).....	111
Shi Yu: Eterneco en momento k.a. (trad. Ardo).....	114
Ma Wei: Nokto sen stratlampoj k.a. (trad. Ardo).....	115
<b>Eseo kaj artikolo</b>	
Fang Hong: Variantoj en tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj.....	117
Jouko Lindstedt: Iom pri la romano <i>El ombro de l' tempo</i> .....	124
John Huang: Mia Vojaĝo al Ĉongĉingo dum la Ĉina Nacia Festo 2024....	125

---



**John Huang**, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis en multaj Esperanto-agadoj en la sekvaj jardekoj.




*Karikaturoj esperantigitaj de Alain Roze Courbou (Francio)*

---

Foto sur la kovrilo: Girafo sur afrika savano (fotita de John Huang)

## James Bridge (Kanado)



# Brulvundita de la Suno

*aŭtoro, James Bridge*

Megano malsupreniras la senluman kelon kaj tirfermas la klapon malantaŭ si. Riglinte la klapon, ŝi kelkfoje puŝegas por konstati ke ĝi baras la enflon de varma aero. Certiĝinte ke ĉio estas en ordo, ŝi skuas la polvon de si, malnodas la buŝomaskon, kaj kuŝiĝas apud siaj edzo kaj filo sur la malvarmeta grundo. Ŝi viŝas ŝviton de la frunto kaj dum momento nur enspiras la pli malvarman aeron. Ŝi etendas manon direkte de sia edzo, “Akvon, mi petas.”

Tomaso palpas en la dorsosako, trovas blankan botelon, kaj pasas ĝin al Megano, “Jen la lasta, sed ni rajtos replenigi la hodiaŭan provianton post kelkaj horoj.”

Dum Megano trinkas, Maŭrico ruliĝas al ŝi demandante, “Ĉu la domo vere estos sekura dum ni forestos?”

Tomaso konsolas Maŭricon, “Tial bonaj homoj restas por bonteni la najbarejon.”

Megano suspiregas kaj seriozate aldonas, “Li ne plu estas infano, Tomaso. Vi ne beligu la realon.” Megano flankenlasas la botelon kaj tiras Maŭricon al si, ĉirkaŭbrakumante lin sed dirante nenion.

Forta ventoblovo skuas la klapon kaj pli da polvo ŝteliras trans la sojlon. Tomaso stariĝas, kojnumas tuketon en la fendeton por bari la enflon de varma aero, kaj sidiĝas sur la ŝtuparo.

Maŭrico pripensas la rimarkon kaj demandas, “Panjo, ĉu miaj amikoj estos sekuraj? Mia instruistino diras ke la somerŝtormoj malebligis loĝi ĉi tie.”

Megano glatumas lian hararon kaj dum longa tempo ne respondas. Fine, ŝi certigas Maŭricon, “La provinca registaro provizas la ilojn por ke la restantoj sendanĝere trairu la someron.”

Tomaso elpoŝigas saĝtelefonon por ekscii ĉu oni eldonis pliajn vojaĝ-avertojn, kaj lume de la ekraneto Megano kaj Maŭrico spektas lin svingi la ilon jen tien, jen ĉi

tien serĉante signalon. Tomaso malŝaltas ĝin kaj planken rigardas, "Tro da suna radiado perturbas la reton."

Megano sentas Tomason zorgegi kaj penas trankviligi lin, "La radiado kaj ventegoj devus sufiĉe ĉesi post la sunsubiro. Ni dormu."

La triopo plejble komfortigas sin sur la seka grundo de la frideta karcero kaj fermas la okulojn. Tomaso kaj Megano glitas en nekvietan dormeton, sed ne juna Maŭrico kiu moke flustretas al si, "Hastu, Maŭĉjo, ni fermas la domon. Hastu, hastu!" Li kuŝas inter siaj gepatroj, kunpremante la kruojn kaj mantene la ingvenon, mirante kian punon li ricevus petinte reeniri la domon, kaj distras sin aŭskultante la venton.

Tamen, ju pli longe Maŭrico aŭskultadas la venton hurli, des malpli li povas atendi la gepatrojn vekigi. Fine, ne plu povante enteni la inundon, Maŭrico zorgeme stariĝas inter siaj gepatroj kaj trovas la malplenan akvobotelon apud la panjo. Maŭrico timoplene malfermas la botelon, levas ĝin ĝis la ingveno, kaj faras sian faron. Starante tie kun botelo da honto, li subite konsciiĝas pri kien li kaŝu la krimon. Ne sciante kion li faru, li stumbletas ĉirkaŭ siaj gepatroj, trovas la dorsosakon, kaj ŝovas la botelon ĝis la profundo. Li fine reiras sian lokon inter la gepatroj kaj sinkas en pezan dormon.

Iam poste, Maŭrico vekigis en la malantaŭa sidloko de buseto apud la patrino dum Tomaso veturigas ilin. Estas preskaŭ tute noktiĝinte, kaj la familio vojaĝas tra la najbarejo. Tie kaj ĉi tie la restantoj rigardadas ilin pasi. De unuj videblas kolero aŭ jaluzo, de aliaj senespero aŭ malĝojo. Maŭrico adiaŭe mansvingas al siaj najbaroj, sed ili turnas sin for de li. Maŭrico kulpe malsuprenlevas la manon, kaj demandas, "Panjo, kial ili ignoras min?"

Megano suspiras kaj glatumas al Maŭrico la kapon, "Dum ni forestos, ili devos kunteni la najbarejon. Estos malfacile."

Maŭrico kuntiras la frunton penseme, kaj post momento demandas, "Sed kial ankaŭ ili ne rajtas foriri? Ĉu ne estus pli sekure en la nordo, kien ni iras?"

Tomaso ekdiras, "Via patrino estas inĝeniero, kio faras ŝin 'havenda.' Ŝi ricevis elirpermesilon por labori en la ĉefurbo dum somero kaj aŭtuno, kaj ni akompanos ŝin."

Maŭrico ririgardas la ĉirkaŭan najbarejon kaj malridetas.

Estas tute noktiĝinte, kaj la seka, malpli varma nokta aero blovas kurtenojn de polvo tien kaj ĉi tien. Dankante la cediĝon de la tago, homoj venas el siaj hejmoj por enviciĝi ĉe la akvodisdonpunkto. Unuj tiras ĉaretojn por porti botelegojn, aliaj surhavas grandajn dorsosakojn. Tomaso envicigas la aŭton kaj atendas sian vicon ĉe la disdonpunkto.

Dum la familio atendas, videbliĝas paro de milicanoĵoj laŭiranta la vicon priserĉante la atendantojn. Ĉiu portas nigrajn botojn, verdkamuflitajn uniformojn, kontraŭkuglan veŝton, fusilon, kaj ruĝan ĉapon. Megano tuj rigardas Tomason en la retrospegulo kaj flustras, "Ĉu via partianeco ankoraŭ validas?"

Tomaso kapneas, "Mi lasis ĝin eksvalidiĝi por ke la partio ne rajtu venigi min servi en la urba gardistaro."

"Mi diris ke vi ne faru tion," Megano kolere siblas al la edzo. "La elirpermesilo de la provinca registaro superas la aŭtoritaton de la malplimulta partio."

Tomaso kapbalancas al la pliproksimiĝantaj ruĝĉapuloj, "La milico estas ĉi tie nun, sed kie estas la plimulta registaro? La provincaj soldatoj ne plu ĝenas sin pri urbaj aferoj!"

Megano faligas la manojn en la sinon, "Via partianeco estis nia lasta defendo kontraŭ la milico."

Momenton poste, la ruĝĉapuloj alvenas la buseton. Iu el la du paŝas al la malantaŭo de la buseto, dum la alia manfrapas la ventoŝirmilon. Tomaso malsuprenrulas la flankan fenestron kaj salutas la soldaton, "Refoje grandigu Kanusonujo."

La soldato respondas, "Refoje kaj por ĉiam. Kien vi iras ĉi-vespere?"

Tomaso ŝultrolevas, "Nu, mi volis ekiri norden dum la nokto estas ankoraŭ juna, sed ĉi tiu longa vico malfruigos min. Ĉu io misas?"

La ruĝĉapulo rigardas sian kamaradon aliflanke de la buseto kaj reen al Tomaso. Li apogas iun manon sur la rando de la malfermita fenestro, kaj la alian sur la fusilo, dirante, "Certe estus plaĉe trasomeri norde. Kunokaze, ĉu via domo estos sekura ĉi-somere dum vi forestos?"

Tomaso kapjesas, "Tion mi supozas, ĉar la edzino pasigis preskaŭ la tutan tagon fermante ĝin."

La ruĝĉapulo ĉe la alia flanko de la buseto dufoje manfrapas la malantaŭan klapon. Tiu ĉe la antaŭo de la aŭto balancas la kapon tien, "Se mi estus priserĉi vian aŭton, ĉu mi trovus pli da akvo ol vi rajtas havi hodiaŭ?"

Tomaso kolere gapas lin, dirante, "Ĉu vere?"

La ruĝĉapulo akre rigardadas Tomason, "Malfermu la malantaŭan klapon, mi petas."

Tomaso ĝemas kaj tiras anson apud siaj genuoj, lasante la klapon malfermiĝi. La ruĝĉapuloj fosas en la valizaro, kaj trovinte nenion fermas la klapon. Tomaso vokas al la duopo, "Ĉu bone?"

La unua ruĝĉapulo revenas kaj okulumas Maŭricon kaj Meganon, ordonante, "Necesas priserĉi ankaŭ la kunvojaĝantojn."

Tomaso tute perdas sian paciencon kaj iras el la buseto por alparoli la ruĝĉapulon, sed la ruĝĉapulo paŝegas al li kaj ponarde puŝis fingron en lian bruston, “Vi restu en la buseto ĝis kiam mi estos preta trakti vin.”

Ĝuste tiam, la flanka fenestro malsupren ruliĝas kaj Maŭrico krias, “Refoje grandiĝu Kanusonujo!”

Megano ŝokite ĉitas Maŭricon, sed tro malfrue, ĉar la proksima ruĝĉapulo estas jam turninta sin al la infano kaj ridas, “Refoje kaj por ĉiam.”

Alloginte la atenton de la ruĝĉapuloj, Maŭrico kaptas la apudan dorsosakon de Megano dirante, “Mi havas donacon por vi!”

Megano baraktetas kun Maŭrico penante bonkondukti lin, sed vane ĉar la proksima ruĝĉapulo estas proksimiĝinta ŝian fenestron kaj moketas, “Lasu la infanon paroli, knanjo.”

Maŭrico fine trovas la kaŝitan botelon en la dorsosako kaj estas dononta ĝin al la ruĝĉapulo tra la malferma fenestro, sed Megano kaptas lian brakon por bari la donacon.

Tamen, Maŭrico kriegas, “Dankon pro via servo, frato!,” kaj la ruĝĉapulo etendas manon en la buseton prenante la botelon de Maŭrico.

La ruĝĉapulo skuas la botelon konstatante ke ĝi fakte enhavas akvon, kaj reregardas Tomason kun venka mieno, dirante, “Dankon pro la kontribuo al la urba gardistaro, kamarado.” Fine, li dufoje frapas la supron de la buseto kaj foriras.

Tomaso kolere residiĝas en la buseto, kaj post momento Megano diras, “Ĉu vi ne diris en la kelo ke mi trinkis la lastan akvon?”

Tomaso grumble respondas, “Tion mi diris.”

En momento de kunhavata suspekto, la gepatroj malrapide turnas sin al Maŭrico kaj rigardadas lin. Megano dolĉavoĉe enketas, “Kion vi ĵus faris?”

Maŭrico honte flustretis, “Multe necesegis al mi pisi dum vi dormis.”

Sen plia vorto Tomaso elviciĝas de la akvodisdonpunkto kaj rapidege ekveturigas norden tiel rapide, kiel li taksas sendanĝere. Dume, Megano grumble ĉirkaŭbrakumas Maŭricon, “Tio estis ruza, sed vi plej bone esperu ke ili ne baldaŭ eltrovos la trompon.”

Kelkajn minutojn poste, la familio alproksimiĝas la nordan pordegon. Lampegoj lumigas la scenon kie blue vestitaj provincaj soldatoj baras la vojon. Du soldatoj kontrolas dokumentojn kaj priserĉas aŭton de veturantoj, dum pliaj kvar soldatoj gardestaras ĉe la fina barilo antaŭ la nordena ŝoseo.

De malantaŭe ekaŭdebliĝas la sonorado de aŭtokorno, kiu ĉiunomente fariĝas pli laŭta. Tomaso kaj Megano diras nenion, sed Maŭrico sentas la subite pli seriozan etoson inter siaj gepatroj.

La provincaj soldatoj fine delasas la kontrolatan aŭton kaj mangestas ke Tomaso antaŭeniru. Dume, la sonorado daŭras kaj nun videblas ne tro for de la kontrolpunkto paro de antaŭlampoj.

Tomaso veturas ĝis la barilo kaj malsuprenrulas la fenestron. Soldato alproksimiĝas, etendante manon, “Dokumentojn, mi petas.”

Tomaso transdonas la pasportojn kaj elirpermesilon de Megano. Dum la soldato kontrolas la pasportojn kaj atente legas la kondiĉojn de la elirpermesilon, aŭdebliĝas krioj de la proksimiĝanta veturilo, “Haltu, haltu!”

Tomaso etendas manon tra la fenestro penegante ne tremeti kaj milde demandas, “Se ĉio estas en ordo, ĉu ni rajtas ekiri?”

La soldato estas redononta la dokumentojn al Tomaso kiam la postĉasanta kamioneto atingas la kontrolpunkton. La soldato retiras la dokumentojn de Tomaso kaj paŝas for de la buseto por trakti la novealvenintojn. La kamioneto kriĉe haltegas apud la buseto de Tomaso, kaj du ruĝĉapuloj eliras kun siaj fusiloj. Iu restis flanke de la kamioneto, kaj la alia antaŭeniras. Vidante la ruĝĉapulojn porti siajn fusilojn pafpretaj, kvar el la provincaj soldatoj levas la siajn, kaj tiu tenanta la vojaĝdokumentojn ordonas, “Klarigu vin.”

La antaŭenirinta ruĝĉapulo malsupren celas sian fusilon, dirante, “Tiuĵ estas krimuloj, kaj ni tenos ilin ĝis kiam ilia kulpo estos juĝita.”

La soldato rigardas la familion en la buseto, kaj ririgardas la ruĝĉapulon, respondante, “Do, kiuj estas iliaj krimoj?”

La ruĝĉapulo evidente ne anticipis ke oni defius lin en ĉi tio, kaj balbutas, “Ili subaĉetis min.”

La soldato tre amuzite ridas, “Mi penos kompreni: vi akceptis subaĉeton, kio estas krimo, kaj nun volas ke mi baru al ili la vojon?”

La ruĝĉapulo tro klare ne pripensis sian akuzon antaŭ ol elparoli ĝin, do li nur gapas la provincan soldaton, kaj ruĝiĝas tiel profunde ke la vizaĝo superas la koloron de la ĉapo. Fine, li krias, “Ili donis al mi akvobotelon kaj ŝajnis ĝin plena, sed la botelo reale enhavas pisaĉon!”

Je tio, la provincaj soldatoj ekridegis, kaj iu el la soldatoj devis apogi sin sur la barilo por ke li ne falu surteren.

La hontigita ruĝĉapulo staras sola antaŭ la soldatoj, kaj kiam evidentiĝas ke ili ne helpas, li kuretas al la buseto por eltiregi Maŭricon, sed je tio la soldatoj ĉesas ridi kaj levas siajn fusilojn pafpretaj. La ruĝĉapulo haltas kaj malrapide levas siajn manojn ĉielen. La plej proksima soldato paŝas al la milicano kaj puŝegas lin retroen, dirante kun mortiga voĉo, “La urba gardistaro restu en la urbo.”



Tomaso kaj Megano timante spektas la ruĝĉapulojn reeniri sian kamioneton kaj foriri, kaj certiginte ke la ruĝĉapuloj ne revenos, la apuda soldato redonas la dokumentojn, dirante, "Bonan vojaĝon."

La fina barilo antaŭ la nordena ŝoseo flankenruliĝas, do Tomaso ŝaltas la motoron kaj ekveturas, murmurante, "Bonan foriĝon al malbonaj aĉuloj."

Megano respondas kantante, "*Nia diligenta gardistaro, en somera devo ne laciĝos, ĝis la frida vento de la vintro, por sezona ben' malplivarmigos.*"



*esperantigita de Alain Roze Courbou (Francio)*

## Evgeny Khvalkov (Rusio)



### Konduktoro

"Mi forgesis denove preni laŭdanon," pensis Eduardo Reuters, elirante el la bienpordego sur la kamparan vojon en malvarmeta aŭtuna tago. Li haltis por sekundo, ĉirkaŭrigardis, envolvis sin en mantelon kun kolumo el lupa felo, kiun la maljunulino Modlin donis al li, kaj marŝis al la arbaro.

*aŭtoro, Evgeny Khvalkov*

Lin lasis indiferenta kaj la lastaj novaĵoj pri la debatoj en la Parlamento kaj la entuziasma letero de onklino Agatha, kiu raportis pri la sukcesa geedziĝo de kuzo Elizabeto kun la tria filo de grafo Harrington. Nek Napoleono, nek la minaco de elpelo de Balliol College, nek la senscia obskuranto kontraŭ la lastatempa artikolo de profesoro N-son en la Philosophical Transactions of the Royal Society okupis lian menson. Eĉ la gaja, lentuga vizaĝo de rapidokula Kiĉjo, la filino de la forĝisto, kiu ridetis al li de malantaŭ la nebula fenestro de dometo ĉe la rando de la vilaĝo, ne deturnis lin de liaj doloraj pensoj. La nigra kato, fiksrigardante lin kun la okuloj brulantaj kiel oleaj lanternoj, restis nerimarkita sur la fenestrobreto de kaduka morna konstruaĵo ĉe la periferio — la domo de maljuna Modlin; kaj la maljunulino mem, kiu kliniĝis eksteren, apogante sin al la rando de la fenestro per la mano kun longaj flaviĝintaj ungoj en fendoj, nur knarigis post li ion nekompreneblan.

La tuta estaĵo de Eduardo estis okupita per unu afero. Atinginte la randon de la arbaro, li fiksas sian blindan, frenezan rigardon en la densejon. Subita ventoblovo preskaŭ forblovis la ĉapelon de la junulo. La krio de korvo venis de malproksime kaj ektiris lin. Tiam liaj maldikaj, sensangaj lipoj flustris:

— Morvena!

Kaj li ŝajnis esti falinta en la pasintecon — ĝis tiuj tagoj, kiam la pasintan printempon li vagis kun ŝi tra la florantaj pomĝardenoj de Somerset. Nun li eĉ ne povis memori kie kaj kiam li renkontis ŝin. Sed venis la tempo — kaj Morvena Fidimeir forlasis lin. Kvazaŭ li denove troviĝus tie, en tiu malgaja kaj prema ĉambro, en tiu grandega mortinta domo. La horloĝo sonis noktomezon, pluvo verŝiĝis ekster la fenestro, la fajro en la kameno brulis — same kiel la vivo de la knabino brulis. Konsumo neforgeseble mortigis ŝin. Vane Eduardo vokis ŝin, kuŝanta senkonscia en

la lito sub silka baldakeno, vane li provis persvadi ŝin ne lasi lin tie, en la rondoj de la animaj vojaĝoj, en la lando de la Spiritoj, en la lando de la mortintoj. Al la lando, al kiu ŝi ĉiam ŝajnis aparteni, kvankam Eduardo trompis sin kredante, ke post la morto de Rupert ŝi apartenis al li kaj al li sole.

Branĉo krakis sub la piedoj kaj alia frapis Eduardon en la vizaĝon. Li stumblis, kaj kiam li levis la kapon, li vidis antaŭ si la nudajn branĉojn de svelta acero. Leviĝante super la frosta kaj roke malmola tero, la acero ŝajnis verŝi larmojn, aŭ plorante pro la fantomoj de la folioj falintaj de ĝi, aŭ funebranta sian propran nudecon. Kaj li mem, kaj la arbaro, kaj la tuta mondo en ĉi tiu aŭtuno mortanta ne estis fremdaj al certa beleco — sed ĝi estis la beleco de ostoj, la beleco de la skeleto, la beleco de absoluta mortemulo. Pacon.

Eduardo eliris al la eriko kaj, marŝante laŭ mallarĝa pado, atingis la randon de alta klifo. Rokoj estis blankaj malsupre, kaj ŝtorma monta rivero rapidis preter ili. "La lasta bordo," ĝi sonis en lia kapo. Starante sur la klifo, la junulo fermis la okulojn kaj antaŭ li denove staris tiu neĝkovrita arbaro sur la malvarmaj bordoj en la ĉirkaŭaĵo de Inverness, kaj la malbonaŭguraj piedoj de la abioj, kiuj etendis al li, kaj la mallumo, apenaŭ videbla figuro de Rupert tridek paŝojn for de li. Je la signalo, Eduardo iris antaŭen, malrapide levis la manon, celis, kaj marŝinte ankoraŭ kvar paŝojn, ektiris la ellasilon. Kelkajn sekundojn poste, li staris apud du sekundoj kaj rigardis kiel nigra sangoflako fumis kaj disvastiĝis tra la neĝo ĉirkaŭ sia senkuraĝa amiko, rigardis liajn dentojn nudigitaj en agonio.

Eĉ tiam, Eduardo estis turmentita de pento kaj bedaŭris ke li delogis la fianĉinon de Rupert, kun kiu li vivis sub la sama tegmento en kolegio, ke li defiis amikon kiu neniam tenis pafilon en sia vivo. Li vidis, ke Morvena, venkita de ĉagreno pro sia murdita amanto, evitas kaj simple ne volas vidi, ke ŝi cedas al liaj persistaj antaŭenmarŝoj, nur cedante al ia neklarigebla forto, al ne-tera perejo, al ia malbona sorto. Tio altiris ilin ambaŭ. Kaj tamen li neniam ĉesis serĉi ŝian favoron.

Kaj li ne serĉis forgeson, ne! Kvazaŭ en febra atako, li ĝojis pri sia sufero, kiel hundo, kiu lekas akran segilon kaj glutas gutojn da sango el sia lango. Li aŭ suferis de sendormeco la tutan nokton, aŭ falis en kompletan senkonsciecon sub la influo de fortaj trinkaĵoj. Lin turmentis samtempe la pento pro siaj sekretaj pekoj kaj la ebrio de sia propra malvirteco, zorge kaŝita de malklaraj okuloj de pasio. Sed malvirteco venkis, kaj iom post iom la pento cedis, same kiel Morvena cedis al siaj progresoj. Ĉu li antaŭsentis tiam, ke ĉi tiu pasio kondukos lin al frenezo, ke ĉi tiu absoluta mallumo malfermiĝos en li, ĉi tiu senfina maro de hororo?

Li malfermis la okulojn kaj denove rigardis la malgajan pejzaĝon kaj la malvarmajn ŝtonojn sub la klifo. Ŝancelita. Li retenis la spiron. Li eltiris flakon el sia poŝo, trinkis el ĝi la bonodoran likvaĵon, suspiris kaj vagis plu tra la dezerto.

Baldaŭ li denove trovis sin ĉe la rando de la arbaro. Inter la skeletoj de arboj, li vidis malproksime la silueton de pendumiloj. Eduardo premis siajn okulojn pro subita ekblovo de neracia teruro kaj revidis la nudigitajn dentojn de la mortinta Rupert.

Dum tiu terura vintro, la ŝokoj, kiujn li travivis post la duelo, donis al li viziojn kaj deliron. Alia atako devigis lin eĉ pli ofte uzi opion. Vekiĝante ŝvitante pro koŝmaroj, li aldonis pli kaj pli da laŭdano al sia ŝereo aŭ ruĝa vino. Ĝi estis trankviliga, vigliganta, kaj ofte kondukis al ŝanĝo de konscio. Sed post la foriro de Morvena, kiu legis la sekretojn de la ekzistado sur ŝiaj malpermesitaj paĝoj kaj komuniĝis kun la spiritoj de la mortintoj, post la foriro de Morvena, kiu penetris preter la vivo kaj la morto, li konstatis, ke li finiĝis, li elĉerpis sin, li ne plu havis lokon en ĉi tiu mondo .

Antaŭtage, en Reuters Hall, la malnova kastelo de lia onklo, kiu, kiel juna viro, laŭdire mortigis amikon en duelo pro rivaleco en aferoj de la koro, Eduardo rimarkis virinan portreton kaj ŝajnis ŝtonigita. La samaj nigraj bukloj kiel flugilo de korvo, la samaj okuloj profundaj kiel lagoj, la sama mortiga paleco — la portreto ekzakte ripetis la trajtojn tiel konatajn kaj karajn al li! Estas ŝi, ŝi estas la kaprica infano de liaj sonĝoj kaj fantazio, subite karnvestita kaj same subite forlasanta lin; nun li estas kondamnita turmenti kaj suferi por la resto de sia vivo, dezirante ŝin. Same kiel nun, li tiam devis fermi la okulojn. Kiel nun, li spertis profundan teruron. Ŝajnis al li, ke la virino en la portreto parolas al li, sed li ne povis distingi ŝiajn vortojn — ŝajnis, ke ŝi vokas lin ie. Restis sendube: morto por li nun estis same neevitebla kiel nemateria ekzistado post kiam ĝi estis neevitebla.

Promenante laŭ la rando, Eduardo, sen pli profundigi en la arbaron, iris laŭ la pado al la malnova gardoturo sur la klifo. Grimpante la padon, li estis malfermonta la malnovan knaran pordon, sed la sono, venanta de malantaŭ ĝi, devigis la junulon halti. Ŝajnis, kvazaŭ iu parolas en la turo. Eduardo malrapide, singarde kaj silente malfermis la pordon kaj englitis. Penante fari kiel eble plej malmulte da bruoj, li komencis grimpi la kadukan ŝtuparon.

— ...kaj tiel niaj du familioj ligiĝis. Ligite per tiaj ligoj, ke estas neeble rompi ilin. Mi aŭdas la sonojn de la infero la tutan tempon...

— Ni ĉiuj estas kondamnitaj al vagado, fraŭlino. Ni ĉiuj, ĉiuj maltrankvilaj animoj.

Eduardo grimpis kelkajn ŝtupojn kaj eliris al la pordo kiu kondukis al la galerio. Sur la galerio de la turo, proksime de la mallarĝa kaŝpasejo, aperis du neklaraj siluetoj, vira kaj ina.

— Kaj mi ne povas trovi pacon en la mondo de miaj prapatroj, Rupert! Mi ne estas nur kondamnita vagi sur la tero, ne trovante pacon — mi estas kondamnita reveni! Mi estas kondamnita ĉiam reveni!...

— Vi estas kondamnita. Kaj mi estas kondamnita. Tiel diras la Krepuska Damo.

Subite, sufokita ĝemo eskapis el la brusto de Eduardo. “Morvena!...” li flustris.

La ina silueto turnis sian kapon al lia direkto. Du nigraj, senfundaj malplenaj okulkavoj rigardis la neinvititan gaston.

Eduardo estis terurigita. Li volis forkuri de ĉi tie, sed liaj kruroj kaj brakoj rifuzis servi al li. Kaj la fantomo aspektis kvazaŭ tra li — la fantomo ne vidis la personon aŭ, eble, ne volis vidi lin. La fantomoj de du amantoj, kiuj iam estis homoj, parolis sen rimarki la ĉeeston de li, vivanta.

“Familia malbeno kunligis niajn du familiojn, Rupert. Ĉar, en la tempo de reĝo Karlo, Sir Fitzgerald Reuters fitraktis min... fitraktis Eleanor Marbe... mortigis sian edzon... kaj ŝi memmortigis en sia dormoĉambro...

— Mi konas la historion, fraŭlino. Ŝi estas terura.

— ...de tiam mi mortas ĉiufoje kaj ĉiufoje kiam mi revenas tra generacio en la ina idoj de Eleanor Marbe por vekti detruan pasion en la sekva posteulo de Sir Fitzgerald!

— La Krepuska Damo diras, ke ekzistas nur unu maniero por ke vi trovu pacon, kaj nur unu maniero esti liberigita de la malbeno — por posteulo de Reuters. Vi devas suferi grandan purigon, fajran purigon, kaj li devas fariĝi via gvidisto al la mondo de la mortintoj.

— Sed tio neniam okazos, Rupert! Vi tre bone scias, ke tio neniam okazos. Mi estas eterna estaĵo el la mondo de la mortintoj, mi estas eterna loĝanto de la limo de la mondoj, mi estas koŝmaro revenanta el la alia mondo, mi estas tiu, kiu estas senigita de espero trovi pacon!

La vizio de Eduardo malklariĝis kaj liaj kruroj cedis. Li aŭdis fragmentojn de vortoj atingi lin ĝis li tute perdiĝis en forgeso..

\*\*\*

Reuters Hall Park estas, fakte, unu el la multaj restaĵoj de la antikva Kaledonia Arbaro disigitaj tra Skotlando, parto de kiu iam estis malbarita por konstrui biendomon. La plej granda parto de ĝi restis netuŝita – eĉ en la tempo de la Stuartoj, la loĝantoj de la kastelo ne kuraĝis dehaki ĝin, por ne pretervole kvereli kun la lokaj spiritoj. Ĉar la lastaj generacioj de posedantoj malofte loĝis sur la bieno, la arbaro kreskis, kaj ŝajnis, ke ĝi estas englutonta la grandbienon mem, en kiu loĝas nur kelkaj maljunaj servistoj.

La nokto de Samhain montriĝis malluma, sed kiam viro envolvita en longa mantelo per lanterno kaj fosilo elglitis el la kastelpordegoj, la nuboj disiĝis kaj la lumo de la luno malforte kaŝrigardis tra ili. La viro en la mantelo ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ volante certigi, ke neniu lin observas, kaj direktiĝis al la parto, kie la parko fariĝis antikva praarbaro, kiu estis ĉi tie, ŝajne, ekde la alveno de la unuaj homoj. Enirinte pli profunden en la densejon de la arbaro, li malfacile trovis trokreskitan,

longe nepaŝitan vojon. Li sciis kien ĝi kondukas. Stumblante pro arboradikoj, li aperis en malgrandan maldensejon. Al soleca ŝtonkonstruaĵo profunde en la arbaro. Ŝajnis, ke taŭgus, ke la Arbara Mastrino mem loĝu en tia domo. Sed ĉi tio estis la domo de la mortintoj, la domo de la morto. Familia kriptoj de la familio Reuters.

"Ŝi estas ĉi tie," flustris la viro. "Morvena estas ĉi tie."

Li apenaŭ movis la malnovan rustan feran pardon kaj, transirante la sojlon de la mondo de la vivantoj kaj la mondo de la mortintoj, eniris la kripton. La lumo de la lanterno falis sur unu el la sarkofagoj kaj lumigis la surskribon sur ĝi:

"Eleanor Marbe, 23 aŭgusto 1628 - 30 januaro 1661."

"Ŝi estas ĉi tie," ripetis Eduardo. — Ŝi atendas min.

Li metis la lanternon sur la randon de la apuda ĉerko kaj provis movi la kovrilon de la sarkofago per fosilo. Ĝi malfacile cedis. Eduardo forte apogis sin sur la fosilo. La kovrilo leviĝis, falis sur la ŝtonplankon kaj fendetiĝis. La lumo de la lanterno falis sur la enhavon de la sarkofago, lumigante la kadavron de la virino kuŝanta en ĝi. Ŝajnis, ke ŝi estis enterigita nur lastatempe, kaj kvankam kadukiĝo jam tuŝis ŝin, la viro en la mantelo kun kolumo de lupa felo rekonis konatajn trajtojn.

— Morvena! — li ekkriis, farante paŝon malantaŭen. Poste li denove alproksimiĝis kaj rigardis en la vizaĝon de la virino. — Nu, ĉi tiu ĉerko estu nia lasta geedzeca lito!

Preninte duonon de sia mantelo, Eduardo movis la lanternon al la rando de la ĉerko, zorge paŝis sur la ŝtonmuron, kuŝiĝis en la sarkofago kaj premis la lipojn al Eleanor Marbe. Subite, la nuboj sur la ĉielo disiĝis, kaj la plenluno lumigis la malgajan kripton kaj ĝiajn loĝantojn tra la pordo.

Eduardo eligis longan hurlon. Li sentis, ke liaj dentegoj plilongiĝas, lia korpo kovriĝas per felo, kaj liaj manoj fariĝis ungegaj piedoj. Jen li estas — la lupoj, la gvidisto de la mortintoj al la venonta mondo. Ĉirkaŭprenante sian amaton, li ne rimarkis, kiel li tuŝis la lanternon kaj renversis ĝin en la ĉerkon, kiel lia mantelo kaj lia haŭto ekbrulis el la fajro de la kandelo.

La lupoj ne flaris la brulantan pelton kaj karnon, ne sentis doloron. En ĝia obtuza, tomba hurlado sonis nur:

— Morvena! Morvena!

## Laimundas Abromas (Litovio)



### Ho kutimoj, ho moroj

Kiom da ili kaj kiaj ili estas, scias nur Sinjoro Dio.

Jen mia najbaro Petro, ĉiumatene piedvestas la ŝtrumpojn inverse.

—Kiam oni piedvestas la ŝtrumpojn inverse, — rakontas li, — nepre oni estos tiutage ebria.

Mi intencas tion provi iam.

*aŭtoro, Laimundas Abromas*

Tamen tio estas la kutimo de unu homo.

Sed kiajn eksterordinarajn morojn, kutimojn, tradiciojn posedas la gentoj, nacioj, ŝtatoj. Jen en diversaj gentoj de Ameriko, Afriko, Azio ekzistas la moro, nomata „tabuo“, kiam oni ne rajtas tuŝi iun aĵon, homon, beston aŭ eniri iun lokon. En Litovion tiu moro ankoraŭ ne venis, ĉar ĉe ni oni povas ne nur ĉion tuŝi, sed ankaŭ simple preni, ŝteli kaj eĉ konfiski.

Judoj, muzulmanoj ĵus naskiĝintan knabeton tuj cirkumcidas. Brrr. Ankoraŭ nenion malbonan li faris, sed jam... Sed kiam oni pli bone ekpensas, sekve oni vidas, ke tio justas. Eble tiel tiuj knabetoj estas atentigataj, se ili iam ion malbonan faros, do „tio“ estos plene fortranĉata. Tiu ĉi moro nin, litovojn, ankoraŭ ne atingis.

Sur la insuloj Sicilio kaj Korsiko en la Mediteraneo disvastiĝis vendeto. Ho, tiuj makaronioj!... Vi imagu, se vi mortigis iun el ilia parenkaro, do ili ne manĝos tiujn siajn makaroniojn, ĝis mortigos iun el via parenkaro! De kie venas tiu besta sangosoifo?! Dank' al Dio, ĉe ni tiu moro ne ekzistas.

Ĉukĉoj... Ho, tiuj ĉukĉoj. Ili al la veninta gasto por nokto en la liton nepre kuŝigas sian edzinon. Ne donu Dio, se matene la gasto diros al la dommastro, ke lia edzino ne estis al gasto amema. Tiam por la edzino de la dommastro..., ne donu Dio! Estus tiele ĉe ni, en Litovio... Tiam, se vi havus belan edzinon, la gastoj venadus al vi amase, ili starus envice ĉe via dompordo.

Kazaĥoj... Ili – ne ĉukĉoj, ili scias, kiel fortimigi la tedajn gastojn. En Litovio tion ankoraŭ neniu elpensis. Se oni venas gaste al kazaĥo, tiu tuj buĉas la ŝafon, rostas ĝin kaj, montrante al la gasto respekton, donas al li por formanĝi la okulojn de tiu rostita ŝafo. Kaj vi nur provu ne manĝi. Nur provu!

Kompreneble, iujn kutimojn transprenas ankaŭ ni. Jen nia junularo la tagon de sankta Valanteno tuj kaptis. Tiutage junularo promenadas sur la vangojn kaj postaĵojn la koretojn gluintaj. Anstataŭ la tago de mortintoj, la 1-an de novembro, nia junularo, ĉifonvestinte surkapen metas kukurbojn, festas iun „helovino“— aŭ „halogeno“— feston.

Tiujn judajn postulojn de ŝabato, dum kiuj sabate oni ne rajtas labori, nia junularo plenumas ne nur sabate, sed dum tutaj semajnoj, monatoj kaj eĉ dum tuta jaro. Tamen ramadanon, la moron de sankta monato de muzulmanoj, dum kiu ekde sunleviĝo ĝis la krepusko oni rajtas nek manĝi, nek trinki, — nia junularo ne akceptas. Do, tio temas pri nia junularo. Sed pli aĝa generacio kondukas pli praktike. Jen estroj de multaj Afrikaj negroj, Amerikaj indianoj, Siberiaj kaj Oceaniaj aborigenoj ekde pratempo posedas siajn proprajn aŭguristojn, ŝamanojn aŭ simple sorĉistojn, kiuj por ili antaŭvidas estontecon, konsilas kiel decas konduki en tiu aŭ alia okazo. Iuj aŭguras esplorante la internaĵojn de la buĉita besto, aliaj— flarante la birdan fekaĵon, aliaj — manĝinte la homan viandon. Kaj tiu aŭgurado helpas nur tribestrojn.

Esperantistoj ankaŭ posedas siajn kutimojn. Ĉiu novbakita adepto de internacia lingvo pretas verki novan lernolibron de Esperanto, la plej bonan kaj verki poemojn. Post la esperantista renkontiĝo iuj staras en la rondon, interkroĉiĝas per la manoj kaj adiaŭas dirante: „Per Esperanto por mondpaco ĝis revido, ĝis revido, ĝis revido“.

Do, mi ankaŭ adiaŭas, ĝis revido, ĝis revido.

## Tiel naskiĝas kutimoj

Tio okazis en la ŝtonepoko, ĉar ĝuste per la ŝtono oni frapis okcipiton de Malgrasulo. Kiel konvenas en tia okazo, Malgrasulo etendis siajn longajn gambojn, iom tirmovis ilin kaj trunkviliĝis. Li ankoraŭ neniam vidis multkolorajn filmojn kaj ne scipovis bele morti. Interalie, li ne forpasis ĝis la fino, poreterne: la kapoj en ŝtonepoko estis ne tiaj, kiel nun. Des pli neniuj kuracis tiam.

Verŝajne Malgrasulo longe kuŝis, ĉar, rekonsciiginte, li unue devis forĵeti el sia barbo la neston, ĉi tie aranĝitan de iu birdo. Malgrasulo komprenis, ke pasis multe da tempo, ĉar en lia denaska kaverno li ekvidis multe da nekonataj vizaĝoj. Tamen en la kaverno ŝanĝiĝis ne nur la vizaĝoj... Malgrasulo, maĉinte ion similan al la apra kruro, iomete gajjiĝis.

—Sed via nazo estas kurba, — li diris al la dikmalalta ulo, ial sidanta en la mezo de kaverno.

Subite en la kaverno ekŝvebis malhejmeca silento, kvazaŭ dum la nuntempa sepulto. Malgrasulo ekmiris:



—Ĉu ci ne vidas, ke lia nazo kurbas kaj, krome, li manĝegis la plej grandan pecon de viando? — demandis Malgrasulo plej proksime sidantan Grandpiedulon. Tiu pro io flankeniĝis for de Malgrasulo kaj nenion respondis al li. Tiam Malgrasulo demandis Kurbnazulon mem:

—Pro kio ci sidas en la mezo de kaverno, ne tiel, kiel ĉiuj aliaj homoj — apudmure?

—Pro tio, — anstataŭ Kurbnazulo respondis Dikulo, plej bona amiko de Malgrasulo, — ke li estas ĉefo.

Kaj iu frapis kapon de Malgrasulo per ŝtono. La epoko jam estis ŝanĝiĝinta, iom mildiĝinta, — la ŝtono estis volvita en ŝtofon. Pro tio Malgrasulo rekonsciiĝis ĉifoje multe pli rapide.

Kiam li malfermis siajn blujn okulojn, en denaska kaverno estis okazintaj iuj ŝanĝiĝoj. Kurbnazulo nun sidis en malhela angulo kaj en lia loko, meze de kaverno, sidis Longbrakulo. Malgrasulo faris iujn konkludojn.

—Ho, rektiĝis via nazo! — li turnis sin al Kurbnazulo. — Ĉu vi havas ion por manĝi? Ĉar mi longe kuŝis..., mi ne bezonas multe...

Kurbnazulo nur kuntiriĝis kaj kaŝis sin profunden en la angulo. En la kaverno ekregis silento. Malgrasulo eksentis, ke li diris ion malbonan: ĉiuj rigardis lin kondamne. La okuloj de Longbrakulo flamis per kolero.

—Laŭ opinio de nia komunumo, — diris Longbrakulo, — kun tiu suspektinda flatulo de estinta estro, povas esti nur unu parolo.

„Unu parolo, verŝajne, signifis, ke entute ne estos parolo“ — komprenis kvaran fojon rekonsciiĝinta Malgrasulo post la frapo per la ŝtono, ĉifoje fiksita sur bela tenilo.

Nun en la mezo de denaska kaverno sidis Durpugnulo. Kurbnazulo kaj Longbrakulo entute ne vidiĝis.

Malgrasulo singarde ekpapis sian okcipiton kaj solene deklaris:

—Estu salutata, kiu sidas meze, kaj muelu grenon sur mia kapo.

Malgrasulon ne plu oni batis per ŝtono, kaj eĉ ne fingrofrapis. ✖

## Przemysław Paweł Grzybowski (Pollando)



### La domo de forgesitaj libroj

Foje dum somerferia vagado, mi venis al trankvila urbeto en pitoreska valo. Estis iom malfrue, ĵus komenciĝis krepusko, kaj mi antaŭe tute ne pensis pri iu dormloko, kiel kutime fidante je bonvolema sorto kaj ebla aventuro. Mi do decidis tranokti subĉiele sur benko en parko, por ĝui agrablan veteron, en mallumo aŭskulti interesajn sonojn kaj rigardi al steloj.

Improvizante kusenon el la enhavo de mia dorsosako, en proksima strato mi rimarkis domon kun malfermitaj, agrable prilumitaj fenestroj. Scivola mi decidis iri tien. Ĝi estis malnovstila konstruaĵo kun tegmento ornamita per graciaj turetoj kaj sagoformaj ventindikiloj. Sur la fasado pendis kelkaj diverskoloraj paneletoj kun artece faritaj skribaĵoj „Brokantejo”, „Librovendejo”, „Legejo”, „Biblioteko”, „Klubo de legemuloj”, „Eldonejo”, „Redakcio”. Ŝajnis, ke iu ne kapablis decidi kio troviĝas interne, aŭ intence deziris ŝerco allogi eblajn amatorojn de literaturo - kiel min.

En la montrofenestro ŝirmata kontraŭ pluvo per volvebla, ornamita de strioj kurteno kun falbaloj, videblis libroj kaj diversaj presaĵoj, precipe malnovaj, iom palaj, kun faltecaj randaĵoj kaj makulitaj kovriloj. Inter fantazie ordigitaj libroj aŭ kiel apogiloj por ampleksaj binditaj jarkolektoj de ĵurnaloj, kuŝis kartonaj kaj metalaj teskatoloj, dolĉaĵujoj, diversformaj statuetoj kaj ornamaĵoj. Ĉio ĉi estis iom arkaikstila kaj instigis rememorigi „la malnovajn bonajn tempojn”, pri kiuj oni revas kun sento de komprenebla rideto.

Dum mi eniris, la malfermata pordo gaje bruetis kaj de sub la plafono aŭdeblis tinto de sonorileto pendanta sur ŝnuro. La internon prilumadis gustoplenaj murlampoj. Iliaj plurkoloraj abajuroj el vitraloj dissemadis ĉirkaŭe iom fabelecajn lumetojn. La lokon certe karakterizis unika ĉarmo. Malgraŭ ke de ekstere la domo ŝajnis tute malgranda, en ĝia interno amase staradis bretaroj ŝtopitaj de libroj kaj iliaj

suproj malaperadis en subplafona ombro. Mi havis la impreson, ke ili etendiĝas al diversaj direktoj kvazaŭ longegaj koridoroj aŭ tuneloj. Unu el ili kondukis al abunde prilumita saloneto, el kiu aŭdiĝadis neklaraj sonoj de konversacioj, foje bruo de kulereto metata sur subtason kaj frotsonado de paŝoj sur ligna knaranta planko. Alvenis de tie mirinda aromo de freŝa infuzaĵo el arbaraj fruktoj kaj de pomkuko ĵus forprenita el bakforno. Tra la pordo videblis tablo kovrita per diverskolora tablutuko, kiu de tempo al tempo iomete moviĝis. Sub la meblo iu gaje amuziĝis ridante kaj penis teni tie hundon svingantan la voston.

En la dua parto de la brokantejo, nur post momento mi rimarkis iun laboriston, aŭ eble la posedanton de tiu ĉi domo. Li staris ĉe grandega skribotablo kun plato fleksita pro pezo de amaso da paperaĵoj. La viro estis vestita per paliĝinta surtuto laŭ la Viktorina modo. Li franclingve konversaciis per telefono. Ŝajne kontenta li notis ion en dikega kajero plena de tabeloj kaj indeksoj. La kajero kuŝis en lumo de kupra tablolampo kun verda kloŝo, kiun foje oni povas vidi en publikaj legejoj.

La brokantisto estis impona, eble du metrojn alta, kun larĝa dorso kaj karakteriza ovoforma kapo kovrita de mallonge tondita griza hararo. Lian iom malhelan sed simpatian vizaĝon ĉirkaŭis fantaziaj vangharoj. Sub lia surtuto pendis sur ŝelkoj strikta pantalono. Surpiede li portis altajn botojn. La brokantisto ne surmetis ĉemizon. Lian nudan torson, ventron, eĉ la brakojn videblajn de sub rulitaj manikoj de la surtuto, kovris bluetaj tatuajoj. Pro la aspekto li iom similis al cirka artisto, kiu starante sur areno per resona voĉo anoncas sekvajn prezentaĵojn. Krom tio li havis pintajn orelojn kvazaŭ elfo, kaj malsupre sub la surtuto oni povis rimarki finaĵojn de falditaj flugiloj!

Ne rompante la konversacion, la brokantisto per afabla gesto invitis min konatiĝi kun enhavo de la bretaroj. Mi faris tion kun plezuro, foje kaŝe rigardante al lia fantazia, eĉ neimagebla silueto, ĉar antaŭe mi neniam vidis similan ulon.

En loko kiel tiu ĉi, oni povus atendi multon da polvo kaj malpuro. Tamen en la domo ĉio estis purigita kaj ordigita. En la bretaroj okupantaj la tutan spacon inter la planko kaj la plafono, troviĝis libroj aranĝitaj laŭ malfacile distingebla ŝlosilo. Estis tie diverslingvaj kaj plurformataj romanoj, literaturaĵoj por infanoj, ampleksegaĵoj sciencaj monografoj, kalendaroj, memorlibroj, broŝuroj kun instrukcioj pri la uzado de bicikloj kaj de iuj jam delonge forgesitaj utilaĵoj. En aparta bretaro staris manuskriptoj en kovriloj el malnovaj lernejoj kajeroj aŭ zorge kunmetitaj per silka ŝnureto stokoj de paperfolioj kun etiketoj „Ne Eldonita”. Kun granda miro kaj ĝojo mi malkovris breton plenan de malnovaj libroj en Esperanto, en kiuj ravite mi malkovris titoloĝojn kun aŭtografoj de Ludoviko Zamenhof kaj aliaj famaj geesperantistoj! Ĝi estis vera trezorejo por fakuloj kaj kolektantoj. Ne estas do

surprize, ke mi restadis tie longatempe trarigardante la bretarojn kaj ĝojante, ke la grandulo daŭre babiladas per telefono.

Mi rimarkis, ke dum mi prenis en la manon iun libron, en la apuda ĉambro iu moviĝis kaj ekster la pordo jen kaj jen hezite rigardis al mi scivolemaj vizaĝoj. Ili estis tre diversaj personoj kaj mi tute ne povis imagi, ke ili ĉiuj povus samtempe restadi en la sama ĉambro.


Unue aperis maldika, tre alta viro en frako. Poste montriĝis faltplena maljunulino en kufo, du nudpiedaj infanoj (pli aĝa knabo tenanta la manon de malpura knabino, eble lia fratino) kaj juda junulo en vertoĉapo. Tra la pordo rigardis ankaŭ probable iu profesoro kun serioza mieno, kiu zorge okulumis al mi trans okulvitroj; eleganta damo en plumornamita ĉapelo; eĉ diketa skolto, kiu por altiri mian atenton ĵetis al mia direkto grandan strobilon. Kaj kvankam tio ŝajnis al mi tute neebla, mi povus aserti, ke dum momento mi vidis la kapon de drako kaj de sub la tablo venis iuj fabelaj estuloj, eble troloj aŭ koboldoj, kiuj aŭdace rigardis min kaj montradis per longaj fingroj diskutante kun entuziasmo.

Subite el la interno alvenis — aŭ prefere kvazaŭ grazie enflugis, ĉarmega junulino kun rigardo kaj rideto tiom ravaj, ke ili paligis la lumon de la kandelabroj. Ŝi surhavis eteran, florecan robon ornamitan per arĝentaj zekinetoj, kiuj dum ĉiu movo dissemadis ĉirkaŭe ĝajajn rebrilojn. Ŝi havis travideblajn flugilojn plenajn de delikataj ĉielarkaj ombroj! Kun ŝi kuris la hundo. Kontenta pro la alveno de gasto ĝi ĉirkaŭe saltadis bojante, svingante la voston kaj tuŝante min per malvarma nazo. Videble ĝi anoncis, ke mia vizito en la domo estas bonvena. Koscia pri siaj ĉarmo kaj la impresoj, kiun ŝi faris, la junulino modeste ruĝiĝis kaj ridetis. Poste ŝi iris al la brokantisto, brakumis lin kaj kun ŝerca riproĉo diris:

— Paĉjo, sufiĉas jam la babilado. Ni ja havas gaston! Bonvolu fini kaj venu manĝi kun ni la kukon.

— Kiel kutime vi pravas, karulino. Ni iru! — base respondis la viro kaj rapide finis la konversacion kaj malfunkciigis la malmodernan telefonaparaton. Larĝgeste li invitis al la manĝo kaj permesante sekvi la filinon li gvidis min tra tunelo plena de libroj.

Mi miregis malkovrinte, ke en la apuda ĉambreto krom nia triopo troviĝas neniu. Ĝi estis agrabla kuirejo, en kiu la plej multe da spaco okupis bakforno. En la forno trembriletis restaĵoj de la fajro, kiu antaŭ momento varmigis ledan kruĉon. Rimarkinte mian mirmienon, la patro kaj la filino afable invitis min sidiĝi ĉe la tablo, sur kiu troviĝis porcelanaj tasetoj kun bongustega trinkaĵo kaj bakpleto kun pomkuko. Apude staris mola kanapo, du foteloj kaj kartona skatolo, el kiu saltis



granda rufa kato. Ĝi nur atendis la momenton en kiu la brokantisto eksidos en la fotelo. Tiam la kato murmurante buliĝis sur liaj femuroj. Kvankam kutime mi havas amason por diri, ĉi-foje mi mutiĝis pro la impresoj kaj nur ĝuegis la unikan etoson de la renkonto.

La junulino tenere rigardis al la patro kaj proponis gustumi la kukon.

— Vi certe estas iom surprizita, amiko, pri ĉio kio okazas tie ĉi. — ekparolis la brokantisto kun kompleza rigardo. — Vi venis en la domon de forgesitaj libroj. Ĝi estas la unika en la mondo loko, en kiu sur magiaj bretoj staradas la libroj, kiujn nuntempe oni ne plu legas. Ekzistas amaso da tiaj libroj, kaj iliaj herooj daŭre vivas rememorante la iaman gloron kiam iliaj libroj estis legataj de pluraj aŭ eĉ nur unuopaj personoj. Finfine la paĝaroj endormiĝis pro laco, protektitaj de helpemaj kovriloj, kaj delonge oni ne utiligas ilin. Tiu ĉi domo estas la loko de memoro pri ĉiuj aferoj, kiuj daŭras danke al libroj. Verdire neniu skribita aŭ presita vorto pereas. La spirito, la penso, kun kiu ĝi estas ligita, forflugas en spacon puŝate de homaj sentoj kaj emocioj. Ĉar ĉiu libro enhavas rakonton pri amo, ĝojo, espero, sufero, tristo, timo... — do pri la aferoj, kiuj iam estis al iu sufiĉe gravaj por verki pri ili, valoras konservi ilin, rakonti, transdoni al aliaj. Pensoj vivadas eterne, flugante al ĉiuj direktoj kun la vento, ŝtelitaj de pigoj, incititaj de inspiroj de poeto aŭ de la krio de sciencisto Eureka! Ili vagadas de loko al loko tuŝitaj de rideto de artisto aŭ laco de genia inventistino kiu ĵus eltrovis ion gravegan por la homaro. Ili ĉiuj, iliaj similuloj kaj — kontraŭe — malsimiluloj, kunkreas proprajn rakontojn. Tiel naskiĝas kaj vivadas libroj.



Ĉe ni la forgesitaj libroj estas bone traktataj. Ili estas sekuraj en la eternaj magiaj bretaroj kaj detalajn informojn pri ili mi zorge notas en ĉiutage aktualigata katalogo. Evidente tio postulas multe da pacienco kaj laboro, sed neniu ĝenas nin. La tempo pasas agrable dum rakontoj kun la herooj de la forgesitaj libroj, kiuj iom enuante foje volonte vizitas nin por trinki teon, kune manĝeti kaj klaĉi en agrabla etoso.

Okazas ankaŭ la specialaj momentoj, dum iu en la mondo malfermas forgesitan libron. Tiam sonoras la telefono sur mia skribotablo kaj la libra elfo kiu zorgas pri librejoj en difinita mondangulo ĝoje informas, ke iu ĵus eklegis la libron. Tie ĉi la libro mirakle

malaperas el la breto, kaj ĝiaj herooj gaje forflugas tra kamentubo aŭ tra fenestro por akompani la novajn legantojn kaj flustri al iliaj oreloj siajn rakontojn, plifirmigi la pensojn el la libro per ĝusta inspiro.



Tial mi petas vin, ke vi almenaŭ de tempo al tempo prenu iujn malnovajn librojn, ne detruu ilin, revenu al iam komencitaj kaj forlasitaj legaĵoj, por ke tio ĝojigu iliajn heroojn kaj revivigu iamajn rakontojn!

La simpatia duopo konstatis, ke post la tago plena de aventuroj, miaj okuloj mem fermiĝas pro laco. Ili do proponis al mi tranokti sur la kanapo kaj diskrete malaperis pretekstante, ke ili havas ankoraŭ ion por fari antaŭ la tagiĝo. Kontentega pro la invito mi ŝoviĝis sub kovrilon el koloraj ĉifonaĵoj kaj adiaŭinte per rigardo la mirindan ejon mi ekdormis akompanata de la kato, kiu venis sur mian akselon kaj murmuradis feliĉa pro la nokta kunulo.

Vekis min laŭta sonorilo de telefono. Kiam mi malfermis la okulojn mi konstatis, ke mi kuŝas sur la benko en la parko, kaj la sono de la sonorilo tamen venas el staranta apude veturilo de glaciajvendisto, kiu ĵus komencis la laboron kaj tiel vokis siajn klientojn.\*

### Ilustris *Lucyna Fic*

\*Represo el P. P. Grzybowski, *La domo de forgesitaj libroj*, Oficyna Wydawnicza „Impuls”, Kraków 2024 - bitlibro disponebla senpage en Interreto i.a. ĉe <https://strefa.academia.edu/PrzemyslawGrzybowski>



esperantigita de *Alain Roze Courbou* (Francio)

## Mao Dun (1896-1881)



aŭtoro, Mao Dun

*La jenaj du pecoj de prozaĵoj estas verkitaj de la moderna verkisto Mao Dun, kiu produktis multajn novelojn kaj romanojn dumvive. Kaj li estas unu el la plej elstaraj verkistoj en la moderna literaturo de Ĉinio.*

### Luko

Sur la fasado de vilaĝa domo estas nur vico da fenestroj el latoj. En varmaj kaj serenaj tagoj, la fenestroklapoj apertas ĉiuj en la plena larĝo kaj ekestas sunradioj kaj aerfluo.

En la tagoj ventegaj, pluvegaj aŭ vintraj kun forta hurlado de la norda vento, la lignofenestroj estas fermitaj kaj tiam en la domo regas malhelo kiel en kelo.

Pro tio vilaĝanoj faras tra la tegmento kvadratan apertureton vitritan kaj nomatan lukon.

Somere, kiam ekpluvego verŝiĝas, knaboj plej preferas kuri kaj sin amuzi en la pluvo, kun la kapo levita rigardante al fulmoj. Sed iliaj gepatroj obstine malpermesas. "Endomiĝu!" Kun la fermiĝo de la fenestroj la knaboj estas enfermitaj en la obskure keleca domo. Tiam la luketo fariĝas al ili ununura konsolo.

Tra la vitreto vi povas vidi, ke tie dancetas pluvogutoj plaŭdantaj kaj ekbrilas fulmoj rubandosimilaj; kaj el tio vi povas imagi al vi, kiel forte forbalaas la mondon la pluvo, vento, tondro kaj fulmoj, kaj ke eĉ pli multoble granda estas ilia potenco ol tiu, kiun vi efektive sentas sub la libera ĉielo. Tiu ĉi malgranda luko povas inspiri vian imagon!

Nokte, kiam vi estas devigata "ripozi" en la lito, supozeble, vi ankoraŭ memoras la herbejon kaj riverbordon sub la lunlumo, kaj vi ŝovas vian kapon el la kulvualo por suprenrigardi. En tiu ĉi momento la luketo denove fariĝas al vi ununura konsolo!

Via imago povas vagadi de unu stelo, unu nubo super la vitrita luketo al miriado da flagretantaj steloj amindaj, fascinaj nuboj similaj al montoj, ĉevaloj kaj gigantoj; kaj de silueta strio preterŝoviĝinta super la vitrita luketo al griza vespereto, kantscipovanta najtingalo aŭ tirana strigo. — Unuvorte, tuj eksterniĝos en via imago

ĉio de la mirinde ĉarma mondo nokta.

Ajojojo! Kiom mirinda estas tiu ĉi malgranda malplenaĵo! Ĝi vidigas al vi kosman sekreton, pri kiu vi neniel revus, se ĝi ne ekzistus, ĝi imagigas al vi diversajn okazaĵojn, kiujn vi neniam imagos al vi, se ĝi ne ekzistus!

Grandan dankon meritas la plenkreskuloj, kiuj eltrovis tian "lukon". Ĉar la viglamensaj knaboj kapablas bone scii, kiel trovi "havecon", "plenecon" el "malpleneco", eĉ pli vaste, pli komplike kaj pli aŭtentike ol propraokule ili vidas.



tradukinto *Minosun* (Ĉinio)

## Frapoj je la Pordo

Pum, pum, pum!!

Mi vekigis salte el la sonĝo.

Kiu frapis je mia pordo? Mi pensis konfuzite. Mi streĉis mian oreton por aŭskulti. Frapsono jam malaperis. La lampo surkape disverŝis iom da helflava lumo sur mian dormeman vizaĝon. La fenestroj gluitaj per papero kaj litvualo restis tiel kvietaj kiel antaŭe.

Turninte sur alian flankon, mi estis apenaŭ dormeme revenonta en la sonĝon, kiam la frapsono min vekis ankoraŭfoje. La frapadon supersonis hurlado. Ĉu la norda vento muĝas aŭ homoj vokas por veki? Mi ne povis fari decidon. Tamen mia sango ekbolis. Kvazaŭe mi jam elflugis el la ĉambro kaj tranĉis la ĉielon, rajdante sur la nuko de la norda vento!

La surdiga hurlado tamen obtuziĝis, mallaŭtiĝis kaj fine malaperis. Tio, kio restis, transformiĝis en solecan malplenenon.

Ĝuste tia malpleno ekestigis tian laŭtan hurladon! Mi ekridis, kompreninte ke mi estis trompita de halucino.

Kun rondigitaj okuloj mi volviĝis en profundaj pensoj. Multaj vizaĝoj dancis unuj post aliaj antaŭ miaj okuloj; multe da voĉoj bruis laŭte aŭ mallaŭte ĉe miaj oreloj.



Abrupte ĉio pereis. La mallaŭta frapado persiste alblovigis el la fenestroj, kvazaŭ iu frapus je la pordo.

“Kiu vi estas? Kio okazis?” Mi malpacience krie demandis, sed ne venis respondo.

Mi malŝaltis la lampon. Ekster la fenestroj sporade glimis kelkaj steloj sur la frosta kaj malhele blua ĉielo. Ne povis esti, ke iu frapas je la pordo en tiel profunda meznokto. Se vere estas homo, mi pensis, li certe estas malĝentila ulo, kiu vekas aliulon per pordfrapado, sed ne donas respondon.

Mian kontempladon interrompis la tondrosimila bruoj ekster la pordo. Nature tio ne estis la bruoj de moskita svarmo. Kvankam ili vere ekzistis, ili, kaŝante sin en mallumaj anguloj, tamen jam perdis la forton por ekestigi bruojn tondron. Tio ne estis vera tondro, mi komprenis, ĉar estis ankoraŭ tre frue por tondra sezono.

Mi turnis sur alian flankon sub la litkovrilo kaj premis mian maldekstran oreilon sur la kapkusenon, suspektante, ke la bruoj memproduktiĝas en miaj propraj oreloj. Tamen, subite sonis ankoraŭfoje pum, pum, pum!

La triafoja frapsonado disfuziĝis en la frida aero, tre sonore kaj triste. Neniul ĝin eltenante, mi saltis el la lito kaj tirmalfermis la pordon por pririgardi eksteren.

Sin trovis nenio. La lunarko super la lageto antaŭdoma disverŝis malvarmetan lumeton; vico da ĉerizarboj ĉe la lageto, nudaj en la glaciiginta aero, tremetis leĝere.

Sin trovis nenio, krom nigra hundo, kiu kuŝis surventre ĉe la pordo, kun kapo flanken klinita, kvazaŭ subaŭskultante, kaj nun klininte sian kapon hontŝajne, malrapideme iris sub la plankon antaŭ la tegmentrando kaj kuntiriĝis en bulon kun sia buŝegon en haraĵan kolon.

Mi naskis portempan kompaton al tiu griza besto, kvankam tra mia menso fulmis riproĉeto: Estas ĉi bojemulo, kiu petolaĉe vekis homon, sed postlasis malplenenon al li.

### Elĉinigi **Kanglong** (Ĉinio)



esperantigita de **Alain Roze Courbou** (Francio)

# Sun Guoyan

## “Neatendita” elektropaneo

Hill estas laboristo de elektroproviza kompanio. Post duonjaro li emeritiĝos. Lia plej granda deziro estas emeritiĝi glate kaj vivi komfortan vivon kun familianoj.

Tiun antaŭtagomezon, kiam li ripozis sen deĵoro, du fremduloj subite vizitis lin. Ne konante ilin, li demandis, kion ili volas. La du ne respondis. La viro kun sun-okulvitroj el ili demandis al li, “Postmorgaŭ, la 16an de ĉi monato, vi deĵoros, ĉu ne?” Hill jese balancis la kapon.

La viro ekpuŝis la sun-okulvitrojn, dirante, “Ni volas, ke vi, en la 16a de ĉi monato, ekde la sesa horo de mateno interrompos la elektran kurenton dum duonhoro.”

Nekompreneble Hill diris, “Mi ne povas helpi vin. Vi devas vin turni al nia kompanio por raporti.”

Ekskuante la kapon la viro diris, “Vi miskomprenas nin. Ni bezonas neatenditan interrompon de elektro, tio estas, ke vi fabrikos etan paneon.”

Hill tre perpleksiĝis. Li laboris tie multajn jarojn, sed li ankoraŭ ne renkontis tian absurdan postulon.

“Kompreneble ni ne volas, ke vi faros tion senpage. Ni pagos al vi milionon da dolaroj kiel rekompenco,” dirante, la viro elprenis ĉekon el la poŝo de la vesto kaj donis ĝin antaŭ lin. “Jen estas antaŭpago de dudek mil. Post plenumo de la tasko ni pagos al vi okdek mil.”

La koro de Hill furioze batis. Miliono da dolaroj estas enorma sumo por li ordinara salajrito. Tamen li tuj kvietiĝis, pensante, ke tia malavareco certe kaŝas sekreton. Pensante pri tio, li ne akceptis la ĉekon, sed diris, “Mi volas scii, kial vi volas, ke mi tion faros.”

La viro kun sun-okulvitroj ekskuis la kapon kaj respondis, ne permesante al li pridubi, “Vi ne bezonas scii tion. Faru laŭ tio, kion mi diris al vi.”

Kun iom da malĝojo, Hill replikis, “Se mi ne konsentos?”

“Tio ne dependas, ĉu vi volas aŭ ne!” la alia viro diris kun raŭka voĉo tremiga.

Ne estis malfacile, se Hill promesos fari tion, ĉar lia kompanio administris nur duonan kvartalon kaj, se paneo okazas al la elektroproviza sistemo iafaje, tio estas normala, kondiĉe, ke oni submetas raporton al la estro. Se li ne konsentus, kion ili, kun mallica intenco faros al li?

Pensante pri tio kaj la milionon da dolaroj, Hill akceptis la ĉekon kun konsento.

Ĉe la vespero de la dekkvina, dum deĵorado, Hill foliumis tiutagan ĵurnalon. Subite novaĵo kaptis liajn okulojn: Hali estis komdamnita al morto kaj ekzekutota per elektro en la prizono Mor akurate je la sesa de la morgaŭa mateno.



Hill estis ege surprizita. Laŭ lia scio tiu Hali, fifama nepardonebla pri drogkontrabando, estis arestita de la polico antaŭ ok monatoj. Laŭ lia konsidero tiuj du viroj, kiuj vizitis lin, volis ke li faris elektro-paneon, por ke Hali povu eskapi la elektro-punon, ĉar la prizono kuŝas en la areo sub administrado de lia elektra kompanio.

Hill tuj sentis, ke la sango svarmas al lia cerbo. Li neniel forgesas, ke lia pliaĝa filo saltis malsupren de la alta etaĝo kaj tragike mortis pro la haluciniga efiko de la drogo. Sendube tiu Hali estas nereakta mortiginto de lia filo. Li estis tute ekster si de kolerego. Ĉu eblas, ke la murdinto de lia filo eĉ serĉos radion de vivo ĉe li? La murdinto devas ricevi punon!

Pro tio Hill decidis forĵeti la antaŭan planon kaj provizi elektron normale, por ke la demono-murdinto iru en la inferon. Post pripenso li faris du telefonvokojn. Li doni la unuan telefonvokon al lia intima kolego, dirante, ke pro tio, ke li havos gravan aferon, tiu venos deĵori anstataŭ li en la kompanio. Lia amiko konsentis kaj demandis, “Malnova amiko, ĉu vi estas en bona ordo?” Hill ekridetis sen respondo. Alian telefonvokon li donis al sia edzino, petante, ke ŝi eliru je la sesa morgaŭa matene kaj renkontu lin ĉe la policejo.

Post tio Hill fikse rigardis la murhorloĝon, silente atendente la alvenon de tiu momento. Tuj proksime al la sesa horo sur la ekrano de la regĉambro aperis avertaj vortoj, indikante, ke la elektro provizo estos interrompita akurate je la sesa.

Kial la stato fariĝos tia? Hill surpriziĝis, sed li tuj konsciis, ke la nura racia klarigo estas, ke por certigi la aferon sukcesa, Hali subaĉetis aliulojn en la kompanio pli ol li mem, kaj tuj jam faris ion destinitan al la programo de la sistemo.

Evidente jam mankas tempo por modifi la programon. Hill tuj ekhavis ideon en urĝeco. Li senprokraste sin turnis al la porurĝa sistemo. Tuj antaŭ dekkelkaj sekundoj li firme ekpemis la startan butonon, murmurante, “Adiaŭ, Hali!”

Tiam alvenis la amiko, al kiu li petis anstataŭ lin por deĵoro. Hill diris kelkajn vortojn por transdoni la deĵoron al li, kaj rekte rapidis kun la ĉeko al la policejo.

Aŭdinte lian raporton, unue la policano surpriziĝis kaj poste kun bedaŭro diris al li, “Mi volantas kredi vin, sed fakte Hali ne mortis. Laŭ la informo ĵus ricevita de ni, apenaŭ la elektra ekzekutado komenciĝis, kiam la elektro en la prizono interrompiĝis.”

“Neeble!” Hill kriis, “Mi persone puŝis la butonon de porurĝa sistemo. Hali ne povus eskapi la mortpunon.”

Ekskuinte la kapon, la policano diris, “La afero eble statas kiel vi asertis. Tamen la prizono ĵus konstatas por enketado, ke unu peza ŝarĝaŭto kolizie faligis la elektran foston ligatan al la prizono kaj kaŭzis la interrompo de ticia elektro. Tiu Hali estis elektrita nur ĝis sveno, sed ne en danĝero de morto.”

Hill stuporiĝis aŭskultante. Post iom da pensado, li haste diris, “Tio estas la artifiko de Hali! Ĉu li...”

Hill ne eldiris la restantajn vortojn. En lia cerbo aperis lia amiko, kiu deĵoris anstataŭ li.

Malkiel oni imagas, elektra ekzekuto rabas la vivon dum momento, sed ordinare daŭras kelkan tempon, eĉ ĝis unu horo. Estas certe, ke lia amiko vidis la porurĝa sistemo starti kaj tuj raportis tion al la subuloj de Hali, kiuj faris la akcidenton de la ŝarĝaŭto kolizianta kontraŭ la elektra fosto. Hill nereteneble sentis iom da despero. Ĉu la kolegoj de la kompanio ĉiuj estas subaĉetitaj de la subuloj de Hali?

Ekbalancinte la kapon, la policano diris, ke la polico faros enketon pri la afero, sed kun bedaŭro esprimis, ke la afero fariĝas malsimpla, kaj estas ne facile sendi Hali al la eŝafodo.

Vespere, en la sekreta azilo, kiun la polico provizis, Hill frue ŝaltis la televidilon. Post nelonge la programo de vesperaj novaĵoj prezentis detalan raporton pri la okazaĵon. Aŭtoritatulo diris, ke Hali probable seniĝos je la mortpuno, citante la vortojn de la advokato de Hali: “Mia kliento jam trapasis ‘morton’ unufoje, kaj la tribunalo ne rajtas preni lian vivon duafoje.”

Ĝuste tiam sonis la telefonilo sur la tablo. Post iom da hezito Hill prenis la aŭdilon kaj aŭdis raŭkan voĉon, “Sinjoro Hill, ĉu vi sentas vin komforta en la sekreta azilo, kiun la polico provizas al vi?”

Hill ektremis de timo, sentante, ke lin atakas ĝisosta frosto... ✖

*elĉinigiis Wei Lai (Ĉinio)*

## Iljet Aliĉka (Albanio)



*aŭtoro, Iljet Aliĉka*

rekonis Petron, studkolegon, kiu antaŭ dudek jaroj, kiam ni kaŝe legadis dekadencajn aŭ malpermesatajn librojn, skribis al la polico denunciojn kontraŭ nia grupo. Ĝuste li neniam estis pagata denuncanto – li faris tion malice.

Tiam ni estis studentoj. Kaj se en niajn manojn falis malpermesata, danĝera libro, unu transdonis ĝin fulmrapide al la alia. Kompreneble ju pli severe malpermesataj kaj danĝeraj estis la verkoj kaj iliaj aŭtoroj, des pli ni freneziĝis pri tio. Ni deziris engluti ilin kiel eble plej rapide, ĝuante la „volupton de legado”. Ni parkerigis tutajn fragmentojn, kaj poste ni konkuradis, kiu memoras pli multe.

Kiam alproksimiĝis oktobro, ni tremtemis pro emocioj atendante la verdikton de la komisiono aljuĝanta la literaturan Nobelpremion. Kaj refoje nenio povis nin konsoli, ke ne ricevis ĝin nia Kadare. Sed ni tuj komencis serĉegi aperintajn verkojn de nova premiito. Mi nur memoras, ke kiam en niajn manojn falis la kosova traduko de *Unu tago el la vivo de Ivan Denisoviĉ*, nia tuta grupo, sep personoj, tralegis ĉi tiun libron dum dudek kvar horoj, ĉar en la sekva tago matene ni devis porti ĝin al la koleginino en la fako kun proĥibajoj de la Nacia Biblioteko.

La apartan hierarkion de la danĝeraj libroj fiksas la aŭtoritatoj. El spertoj de la persekutatoj ni sciis, ke plej danĝera estis la Biblio. Pro ĝia legado kaj disvastigado minacis granda puno. Poste estis Sartre kaj liaj geamikoj „kun iliaj malĝojo kaj kontraŭrevolucia bedaŭro”. Pro legado de tiuj verkoj oni malliberigis aŭ ekzilis tutajn familiojn.

Tamen spite al minacoj la legado de tiuj malpermesataj libroj fervorigis kaj ebrigiis nin kiel brando. Kiam la manuskripto de la traduko de *La Triumfarko* de Remarque migradis de mano al mano, duono de la junularo en Tirana forlasis la revolucion vojon, drinkante rumon kaj kalvadoson ĝis falo kaj vagante tra la stratoj

### Kolegoj

Iun tagon eniris mian oficejon mezaĝa viro, kiu havis eksmodan jakon, distaŭzitaĵajn harojn. Kun ĝojkrio li sin ĵetis sur min.

– Tiom da jaroj, amiko, kiel vi fartas?

Mi rigardis liajn primorditajn ungojn kaj

kun krioj „Ni estas la perdita generacio”. Tre ebriaj studentoj ofte dormis sur la bordo de la rivero Lana aŭ en parkoj kaj ĝardenoj, kaj matene ili vekigis en la policaj arestejoj. Ili provis senkulpiĝi sin, parolante, ke ili faris tion, por ekkoni pli bone dekadencajn sentojn, kiajn malbridas la reviziisma-burĝa vivostilo, kontraŭ kiu ili intencas poste batali – sed la polico ne kredis iliajn vortojn, ĉar ĝi havis ĉion skribitan nigre sur blanko.

Sed iafoje ankaŭ ĝi perdis orientiĝon. Ĝuste tiel okazis pri Andrea, ĉe kiu traserĉante la loĝejon post la denunco de Petro oni trovis libron de Kierkegaard en la itala lingvo. Ĝi tre embarasis policajn fakulojn, ĉar ili ne sciis, kien apartenigi la aŭtoron – ĉu meti lin en la liston de la dekadencaj verkistoj aŭ ne. Finfine ili decidis konkorde, ke ne estas la kaŭzo por opiniadi Kierkegaardon dekadenca aŭtoro, ĉar li devenis el la skandinava lando, kiu ne diskoniĝis pro iuj famaj kontraŭrevoluciuloj, sed estis lulilo de multaj marksistaj-leninistaj movadoj.

Tamen Andreo ne sukcesis pli bone ol la ceteraj.

Tiutempe en nian studgrupon el la alia fakultato venis magra knabino kun harligoj. Ŝia patro havis la privilegion teni hejme malpermesatajn librojn, por ataki ilin poste kaj mallaŭdi sur la paĝoj de gazetoj kaj dum sciencaj kunvenoj. Ni malkovris tion, kiam unu el ni, Berti, amindumis tiun knabinon kun harligoj.

Kiam ili venis kaŝe en la bibliotekon de ŝia patro (kiu troviĝis kvazaŭ en kelo) – kompreneble por fiki – Berti malfermegis la okulojn, kiam leviĝante super la korpo de la amatino, li vidis, ke ŝia kapo apogas sin al romano de Gide, kaj ŝiaj magraj ŝultroj kuŝas sur verkoj de d’Annunzio (la aŭtoroj, kiuj minacas almenaŭ per kvin jaroj da malliberigo). Ne pensante tro longe, Berti ĉesigis la fikon duone kaj haste kuregis al ni kun tiuj libroj ĉirkaŭvolvitaj per gazeto.

Tiam Petro estis kun ni. Por diri la veron, li eĉ ne imagis, per kio povas minaci legado de libroj de la malpermesataj aŭtoroj, ĉar li tralegis nenion. Sed kiam li sentis konspiradon kaj eksciton ĉe nia grupo pro la malkovro de la nova fonto kun libroj (ni kverelis, kiu eklegos kiel la unua), li entrudigis:

– Kaj mi? Nu, kial ne mi?

Antaŭ ĉio li deziris ne esti pli malbona ol liaj kolegoj.

– Foriru, Petro, ne serĉu pugnobaton sur la kapon, neniam vi estis vidita kun libro en la mano – volis senfervorigi lin Murat.

Tiam Petro ofendiĝis kaj pro malico denunciis nin. Sekve la polico komencis gvati nin.

La unua viktimo fariĝis Murat, kiu estis kaptita pro bagatelo. Murat legadis malofte, sed post legado li ne povis longe forlasi la impreson. Mi memoras, kiom da tempo li bezonis por liberigi sin de la efiko de *Patroj kaj filoj* de Turgenjev, ĉar al li ŝajnis, ke li estas Bazarov. Laŭnature li estis pesimisto, li vivis kun sia patrino

mizeran vivon kaj post la plej grandaj malfacilaĵoj ricevis la konsenton pri studado. Kiel li diradis, vivigis lin nur la amo al la patrino kaj la timo pri ŝi.

Traleĝinte *Senmoraliston* de Gide, Murat tute perdiĝis. Li estis la lasta en la vico por la libro kaj ĝi impresis lin fortege, tiel ke li falis en melankolion kaj ĉio ekŝajnis al li sombra, griza. Li maldikiĝis, kriadis ĉie: „Ni vivas sence, la mondo estas aĉa, la vivo nenion valoras ... mi ne eltenos pli longe ...” Tia konduto eblis nur ĉe iu sentema kiel Murat, sed tiuj stultaĵoj, kriataj de la knabo, spronis ĉies atenton.

Murat estis arestita. Post kelkaj demandadoj li rompiĝis nerve. Li denunciis nur Andreon. Kaj Andreo ĉiel klopodis perfidi neniun, li prenis sur sin la tutan respondecon pri la „burĝa-reviziista propagando kaj agitado” – dum la ceteraj: mi, Shk ĉqim, Engj ĉli kaj Berti tremegis kiel tremolo kaj atendis kun terurplena koro sian vicon.

Tamen okazis nenio. Sed preskaŭ dum la tuta vivo mi jam ne liberiĝis el la timo antaŭ puno.

Andrea ricevis nur tri jarojn da mallibereco. Kaj Murat pasigis du jarojn en frenezulejo. Li eliris de tie vivanta nur dank’ al la kaŝa sindonemo de sia patrino. Poste mi jam ne sciis, kio okazas pri li.

Petro ne estis persekutata. Sed de tiam li restis sola, neniun proksimiĝis al li, kaj li sin ĵetis sur librojn, pro la sento de la soleco aŭ pentofare kaj repage por siaj faroj. Li aperadis diversloke kun libro sub la brako. Tamen lia fervoro ne sufiĉis por favori nin. Ni timis lin kaj sentis koleregon al li.

Mi rememoris ĉion, kiam mi ekvidis Petron en mia oficejo.

– Kiucele vi venis? – mi demandis.

– Al la seminario pri parazitaj fruktarboj, kun svedaj fakulo.

– li respondis.. – Ili ankaŭ laboras sur la bazo de francaj spertoj.

– Kaj mi – li daŭrigis nedemandita – estas nun prezidanto de la urba societo por la batalo kontraŭ parazitaj fruktarboj – li ĵetis sian anglalingvan vizitkarton sur mian skribotablon.

Nun mi vidis de proksime liajn ungojn, primorditajn ĝis la fingropintoj. Li ne liberiĝis sin de la fikutimo. Harojn li havis distaŭzitajn. Mi imagis, ke li bezonas multe da tempo por kombi ilin.

– Mi estas profesoro – li daŭrigis – en mezlernejo kun usona instruprogrameco por terkulturistoj. Fakulojn ni pretigas laŭ usona modelo. Niaj lernantoj estas plej bonaj sur la grekaj kampoj (iun tagon diris tion mia greka ĉefo – kiel vi scias, multaj el la tuta ĉirkaŭaĵo laboras en Grekujo).

Liberiginte sin de la komenca timo, Petro eksidis komforte sur la seĝo kaj rakontis emfaze:

– Sed bedaŭrinde iom mankas al ni lernantoj, Yllo. Estas vilaĝaj dupoj. Ĉion ili prifajfas. Ekzemple pli ol tri fojojn mi klarigis al ili, kio estas la elektrono kun pozitiva ŝarĝo, mi perdis la spiron, kaj ili nek mek, nek blek. Mi streĉas la tutan forton, penigas min, eliras el mia haŭto, kaj ili oscedas pro enuo, pisas sur ĉion, ankaŭ sur la disciplinon. Ili venas, kiam ili volas, kaj timigas nin. Sufiĉas, ke ne plaĉis al iu noto, aŭ iu ellitiĝis per la maldekstra piedo kaj aĉe! tiu pugnominas al vi. Kaj vi pensas, ke ili ne efektivigos siajn minacojn? La polico, kiel vi scias, tute ne zorgas pri tio. Eĥ, Yllo, ho, kiel ni sopiras unu la alian!

– Kaj libroj, Petro, ĉu vi ankoraŭ legas tiel volonte? – mi interrompis.

Lian vizaĝon distiris grimaco, sed kiam li certigis sin, ke mia demando ne aŭdiĝis moke, li suspiris:

– Oh, libroj, hodiaŭ ni tretegas ilin, ni ĉesis legadi. Kiu zorgus pri tio! Vendisto ĉirkaŭvolvas kotletojn per *Biblio*-paĝoj, kaj el paĝoj de *Uliso* oni faras kornetojn kaj enŝutas semojn de sunfloro kaj kukurbajn kernojn. Oh, amiko, la libroj neniu allogas hodiaŭ!

– Kio okazas pri la malnovaj kolegoj? Ĉu vi renkontis ilin? – mi demandis. – Kion faras Berti?

– Ah, Berti. Ĉe li estas bone. Li laboras en vilaĝo, en la komunumo Progridi, ĉiun tagon malfrue vespere li rehejmiĝas petveture, kun retsako da pomoj. En Progridi, kiel vi scias, estas tre bongustaj pomoj, sukriĉaj. De tempo al tempo mi renkontas lin – rakontis Petro – kotŝmirita de la piedoj ĝis la kapo, frostanta, en unu mano – sako kun kajeroj, per la alia li tenas retsakon kun progridaj pomoj.

Ĉiam li rapidas, kiam ni renkontiĝas. „Oj, mi ankoraŭ ne kompletigis la klaslibron” – li diras kaj forkuregas timante, ĉu morgaŭ la direktoro kontrolos lin. Li edziĝis, divorcis, edziĝis ankoraŭfoje.

Li ne havis feliĉon: ĉiutage li revenadis hejmen malfrue vespere, elĉerpita, kvazaŭ li sopiradis la edzinon, sed kiam li nur manĝetis ion, kompletigis la klaslibron kaj tralegis hejmtaskojn, tuj poste li premiĝis al la stoveto kaj vekigiĝis matene kun teruro, ĉu jam ne forveturis kamionoj kun ligno, per kiuj li venadis al sia lernejo.

„Mi rehejmiĝas malfrue, pli frue mi ne povas” – li plendis al mi iun tagon. Mi timas, ke li divorcos ankoraŭfoje, kiu scias, eĉ ŝajnas al mi, ke li fariĝis pederasto – finis Petro.

Kaj Shkëlqim Cimi, ĉu vi vidis lin?

– Ne. Mi scias, ke li laboris en vilaĝo en la komunumo Maliqi. Li tre malviglas. Por la lasta fojo ni renkontiĝis antaŭ pli-malpli ses jaroj, kaj same kiel nun, mi interparolis kun li pri niaj kolegoj.

Poste ni rememoris studojn. Kiam ni komencis pri libroj, mi demandis lin (ruze, ĉar mi ne volis disgrati malnovajn vundojn), ĉu li plu legas. „Ne, tute ne, eĉ ne parolu



al mi pri tio. Cetere mi ne havas la kapon. Kiucele mi bezonu legadon? Por ekscii, kion imagis tiu ĉefa psikopato en soleco, kiam al li ŝajnis, ke li estas blato aŭ pasero? Ne, amiko, la libroj ne plu allogas min. Mi havas multe da zorgoj: lernantoj, mia edzino, veturoj al la vilaĝo... Mia propra soleco sufiĉos al mi por ĉiuj romanoj de la mondo. Aŭskultu, mi diros, ke jam ne fervorigas min tia oficiala legado, antaŭ la okuloj de homoj, sen timo. Tiam estis alie. Ni komencis noktomeze, ĉiu atendis sian vicon kaj tremegis pro la emocio, serĉante angulon, por englutadi kun la kapo sub la peplomo, kvazaŭ ensorĉita, ĉion, kion oni skribis en libro ... Nenio anstataŭos la magion de la malpermesataj libroj. Estis la malfeliĉa tempo, kiu jam ne revenos". Tiam li diris kaj de tiam mi ne vidis lin.

La rakonto de Petro mutigis min dum longa momento.

– Kaj Engjëlli? Kio okazas ĉe li? – mi demandis finfine.

– Li prosperas bone. Unue li veturadis al vilaĝa lernejo en la regiono de Moglica, sed komencis drinkadi kaj post kelkaj jaroj falis en la manaĉojn de brigadestrino kiel pruno en kompoton. Ili estis kaptitaj en la ĉevalejo kaj li restis por ĉiam en la vilaĝo. Li konstruis domon kun urba aspekto, plantis fruktarbojn, tiun domon luprenis la prezidanto de la konsilio aŭ iu konsilanto. Lastatempe mi renkontis lin dum la kunsido de klerigaj laborantoj. Grasdika kiel porko kaj li nur ridis, anhelante pro superpezo kaj ebriemo. Li fanfaronis pri la rikolto kaj siaj vilaĝaj amatinoj. Mi demandis lin pri libroj. „Knabaj jaroj” – li murmuris. Jes, Engjëlli, prosperas bonege.

– Kaj Andreon vi vidis? Delonge mi aŭdis nenion pri li.

– Kiel vi scias, Andreo finis studojn kiel eksterulo, kun grupo da politikaj malliberuloj. Li fariĝis instruisto, eĉ eminenta. Li retrovis, kiel oni diras, la sencon de la vivo, li aranĝis imponan kemian laboratorion en sia lernejo, modelan por la tuta distrikto.

Okazadis tie metodikaj konferencoj por instruistoj el la ĉirkaŭaĵo.

Li estis laboranta kun sindonemo, ĉiun posttagmezon li preparis kemiajn eksperimentojn, kaj sekvatage prezentis tion al la infanoj. Sed li ne kaŝis inklinton al politiko kaj aliĝis al la reganta partio.

Kiam poste ĝi malvenkis balotadon, oni forpelis Andreon el la urba lernejo kaj sendis al fora vilaĝo, kompreneble pro la politika kaŭzo. Tiu laboratorio estis detruita de politikaj malamikoj aŭ de tiuj, kiuj varmigis rakion en balonoj aŭ mezurglasoj – mi ne scias, mi ne volas mensogi. Ĉiuokaze Andreo perdiĝis entute. Se mi renkontas lin dimanĉe en la bazaro – ĉar kion ni faru? ĉiam dimanĉe ni renkontiĝas kun kolegoj en la bazaro – li demandas min detale pri la politika situacio. Kompatindulo, li atendas senpacience la venkon de sia partio, por tuj aranĝi denove sian laboratorion.

– Kio okazas pri Murat? – mi demandis tremante. Ĉi tiu demando afliktis min senĉese. Tute ne konfuzite, Petro respondis per la sama monotona voĉo:

– Mi ne scias, sed elirinte malliberejon aŭ frenezulejon li ankoraŭ pli izolis sin. Li ne povis resaniĝi. Li estis instruisto en popol-lernejo, dank’ al tiuj du studjaroj. Poste li ĉesis labori kaj sin kaŝis ie en Grekujo, kaj eble en Italujo kiel elmigrinto ... Mi renkontis lin kun la patrino tuj poste, kiam ili revenis el internigejo. Kiam mi demandis pri libroj, li eksilentis kaj paliĝis. Mi havis la impreson, ke li timis paroli pri iu ajn libro, kaj mi eĉ supozas, ke li ne kaŝis sian konvinkon pri la tuta malbono venanta el la libroj. Ŝajne li estas freneza, Yllo, ĉu ne? Mi kapjesis. Mi sentis, ke mi jam ne havas forton demandi.


Cetere pri kio?

– Nu, Petro? – mi ne sciis, kion diri.

– Do, tiel, Yllo – li suspiris. – Kion ni faras? Ni laboras, ĉagreniĝas, penegas, vivas, trinkas glaseton da brando. La lernantoj tute ne aŭskultas, ni ripetas lecionojn ĝistede, kaj ili fajfas pri tio. Ili migras enpense tra grekaj insuloj, primokas nin malkaŝe, kaj kiam ili ofendiĝis pri io, ili pugnominacas. Forpasas jaroj, sed ni forpasas ankoraŭ pli rapide ... Oh, Yllo – li parolis kun melankolio – sed bone, ke ni renkontiĝis kaj iom rememoris la malnovan tempon.

Adiaŭe ni ĉirkaŭbrakis unu la alian.

– Por la sekva fojo vizitu min hejme – mi diris sincere, sed li ne aŭdis miajn vortojn. Li flustris subnaze: „Eh, amiko, tiom da jaroj, tiom da jaroj! ...”



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

## Guy de Maupassant (1850-1893)



### Patro Milon

Depost unu monato, la brula suno ĵetas al la kampoj ardajn flamojn. La vivo radianta disfloras sub la priverŝo de flamo. La tero, kiu etendiĝas ĝis la horizonto, estas freŝverda. La vastega ĉielo estas lazura. Rigardate de malproksimo, la normandiaj bienoj, kiuj dissemiĝas sur la ebenaĵo, similas al arbaretoj, ĉirkaŭataj per la heĝo de

*aŭtoro, Guy de Maupassant*  
fagoj maldikaj kaj altaj.

En proksimo, kiam oni puŝmalfermas la lignan barilpordeton vermopikitan, oni vidis grandan ĝardenon, ĉar la antikvaj pomujoj ostecaj, kiel kampuloj, estas florantaj. En korto la nigraj, kroĉiĝemaj kaj maljunaj trunkoj etendas siajn ruĝetajn kaj blankajn kronojn sub la blua ĉielo. La aromo de freŝaj floroj miksiĝas kun odoro de stalo vaste malfermita kaj kun vaporo de sterkduno, kiu fermentas, kovrata de kokoj.

Tagmeze, la familio tagmanĝas sub la ombro de la pirarbo plantita antaŭ la pordo: patro, patrino, kvar infanoj, du servistinoj kaj tri ĉambristoj. Oni ne multe parolas. Oni unue manĝas supon kaj poste pladon da miksaĵo plena de terpomoj stufita kun lardo. De tempo al tempo servistino stariĝas kaj iras al la kelo por preni pli da cidro. La viro, kvardek-jara fortikulo, kontemplas la viton, ankoraŭ nudan, kiu rampas kiel serpento laŭlonge de la muro sub la persienoj de lia domo.

Finfine li diras: “La vito de patro burĝonas frue ĉi-jare, eble ĝi portos fruktojn.” La virino ankaŭ sin turnas kaj pririgardas ĝin, sed sen diri eĉ unu vorton.

Ĉi tiu vito estas plantita tie, kie ilia patro estis pafmortigita.

Tio okazis dum la milito de 1870. Prusoj okupis la tutan landon. La generalo Faidherbe estis gvidanta armeon de nordo kontraŭstaris kun ili.

Nu, la stabo de la prusa armeo estis establita en ĉi tiu bieno. La posedanto de la bieno estis la patro Pierre Milon, kiu okupiĝis pri akcepto kaj loĝigo al ili laŭ plej granda eblo.

Depost unu monato, la avangardaj trupoj de germana armeo ĉiam faris observadojn en la vilaĝo. La franca armeo, kvardek kilometrojn de ĉi tie, restis senmova. Kaj ĉiunokte ulanoj malaperis.

Ĉiuj skoltoj neniam revenis, se ili nur estis senditaj solaj en du-aŭ-triopo.

Matene oni povis trovi iliajn kadavrojn en kampoj, ĉe la randoj de kortoj, en irigaciaj kanaloj aŭ en fosaĵo. Iliaj ĉevaloj kuŝis laŭlonge de la vojo kun gorĝoj fortranĉitaj.

Tiuj murdoj ŝajne estis faritaj de samaj homoj, kiujn oni ne sukcesis malkovri.

Pro tio la lando terurigiĝis. Germana armeo laŭ simpla denunco pafmortigis kamparanojn kaj enprizonigis virinojn. Ili vringis informojn de infanoj per minacaj rimedoj. Sed ili eltrovis nenion.

Sed, iun matenon, oni rimarkis, ke patro Milon kuŝas en sia ĉevalstalo, kun glava vundo sur la vizaĝo.

Oni ankaŭ trovis du mortigitajn ulanojn, kies ventroj estis distranĉitaj, je tri kilometroj for de la bieno. Unu el ili ankoraŭ tenis enmane sangmakulitan sabron. Klare li estis batinta por sin defendi.

Antaŭ la bieno milita tribunalo estis tuj formita sub la libera ĉielo, kaj la maljunulo estis alkondukita.

Je la aĝo de sesdek ok jaroj, li havis malgrasan kaj malgrandan staturon kun iom kurba dorso kaj paro da grandaj manoj kiel pinĉiloj de krabo. Liaj senbrilaj kaj maldensaj haroj, kiel viloj de anasido, malkaŝis lian kranian haŭton tie kaj ĉi tie. La bruna kaj sulketiĝinta haŭto sur la kolo montris dikajn vejnojn, kiuj malaperis sub la makzeloj. Li estis rigardata kiel avarulo, kun kiu oni malfacile tenis bonan rilaton.

Ili lin lokis inter kvar soldatoj, lasis lin stari antaŭ la tablo tirta eksteren el la kuirejo. Kvin oficiroj kaj kolonelo sidis ĝuste kontraŭ li.

La kolonelo parolas en la franca lingvo:

— Patro Milon, depost kiam ni alvenis ĉi tien, ni nur faras laŭdon al vi. Vi ĉiam tre bone traktas nin kaj nin prizorgas kun granda komplezemo. Sed hodiaŭ, grava denuncado koncernas vin, tial vi devas klarigi la aferon. Kiel vi ricevis la vundon je la vizaĝo?

La kamparano respondis nenion.

La kolonelo daŭrigis:

— Via silentado kulpigas vin, patro Milon. Sed mi volas, ke vi respondu al mi, ĉu vi aŭdis? Oni trovis, ke du ulanoj estas mortigitaj hodiaŭ matene proksime de la monto Calvaire, ĉu vi scias kiu mortigis ilin?

La maljunulo neniom ambigue respondis:

— Estas mi.

La kolonelo, surprizite, fikse rigardis al la kaptito dum silenta momento. Patro Milon restis trankvila, kun stulteco de kamparano, kaj rigardis malsupren, kvazaŭ parolanta al sia pastro. Sed estis videble, ke li estis sinĝena en sia interno, ĉar li pene glutis salivon fojrefoje, kvazaŭ lia gorĝo estus strangolita.

La tuta familio de la maljunulo, liaj filo Jean, bofilino kaj du malgrandaj infanoj konsternitaj, staris je dek paŝoj malantaŭ li.

La kolonelo ree diris:

— Ĉu vi scias, kiu mortigis la skoltojn de nia armeo, kiujn oni trovas mortaj en ĉiu mateno, sur la kampo, dum unu monato?

La maljunulo respondis kun same senesprima mieno kiel stultulo:

— Estas mi.

— Ili estas mortigitaj de vi?

— Jes, ili estas mortigitaj de mi.

— Vi sola?

— Mi sola.

— Diru al mi, kiel vi faris tion.

Ĉi-foje la maljunulo aspektis emociite, ĉar neceso paroli longtempe evidente ĝenis lin. Li balbutis:

— Kiel scias do mi nun? Mi tiel faris ĝuste..

La kolonelo daŭriĝis:

— Mi sciigas al vi, ke vi devu elparoli al mi la tutan procezon. Vi devu pli bone fari tujan decidon. Kiel vi komencis tion?

La maljunulo ĵetis maltrankvilan rigardon al sia tuta familio, staranta malantaŭ li. Post momenta hezito, li subite faris decidon.

— Mi revenis hejmen ĉirkaŭ je la oka horo de iu nokto, la sekvanta tago post kiam vi venis ĉi tien. Vi kaj viaj soldatoj prenis de mi furaĝon de pli ol ducent kvindek frankoj, kune kun bovino kaj du ŝafoj. Mi diris al mi: Se ili refoje prenos aĵojn kun kosto de cent frankoj, mi repagos al ili la tutan sumon. Krome mi ankoraŭ havas aliajn ideojn, kiujn mi diros al vi poste. Tiam mi rimarkis, ke unu el viaj kavalerianoj fumas pipon ĉe la flanko de fosaĵo post mia grenejo. Mi iris dekroĉi falĉileton kaj revenis per malpezaj paŝoj malantaŭ li, tiel ke li neniom aŭdis. Kaj mi forhakis lian kapon per unu svingo, sole per nura svingo, kvazaŭ oni falĉus tritikon, antaŭ ol li povis krii “uf!”. Nur se vi iras al la fonto de la laĝeto serĉi, vi lin povas eltrovi en karbsako, kun ŝtono subtenanta palisaron.

— Mi havas mian ideon. Mi demetis ĉiujn liajn vestojn de botoj ĝis milita ĉapo, poste mi ilin kaŝis en la kalkofornon de la arbaro Martin post la korto.

La maljunulo estis muta. La oficiroj ŝtoniĝintaj pro konsterniĝo, rigardis unu al la alia. Jen la procezo de pridemandado:

Depost kiam li mortigis la kavalerianon, li ĉiam havis la penson: “mortigi la prusojn!” Li ilin malamegis kun profunda malamego de monavida kaj patriota kamparano. Ĝuste kiel li diris, li havis sian ideon. Li atendis kelkajn tagojn.

Oni lin lasis libere iri kaj reiri, eniri kaj eliri, ĉar li estis humilema, obeema kaj plaĉema al venkintoj. Ĉiuvespere, li vidis la heroldon eliris. Ĉar li ofte kontaktis kun soldatoj, li ellernis kelkajn necesajn germanajn vortojn. Iun nokton, aŭdinte la nomon de la vilaĝo, kien la kavalerianoj volis iri, il eliris.

Li eliris de sia korto, glitis en la arbaron, venis al bakforno por kalko, kaj penetris en la finon de la longa tunelo. Eltrovinte la vestojn de la mortinto, li sin vestis per ili.

Poste vagante sur la kampoj, li rampis laŭ la taluso por esti nevidebla, atente aŭskultante al ĉiu brueto, maltrankvila kiel ŝtelĉasisto.

Tuj kiam li opiniis, ke la tempo alvenas, proksimiĝinte al la landvojo, li sin kaŝis en vepro kaj atendadis. Finfine, ĉirkaŭ ĉe noktomezo, aŭdiĝis galopado de ĉevalo sur la malmola grundo. Li alpremis sian oreton al la tero por konstati, ĉu nur unu kavaleriano alvenas. Kaj li sin pretigis.

La ulano alvenis kun trotego, portante depeŝojn. Li singardeme pririgardis, kun streĉitaj oreloj. Tuj kiam li estis dek paŝojn fore, Patro Milon sin trenis transversen sur la vojo, ĝemante: "Help! Help!" La kavaleriano haltigis la ĉevalon kaj rekonis en li germanan soldaton defalintan de sur ĉevalo. Opiniante, ke tiu estas vundita, li saltis de sur la ĉevalo kaj alproksimiĝis al li sen ajna suspekto. Kiam li klinis sin malsupren la nekonato, li ricevis en la mezo de sia ventro longan kaj kurban tranĉon de sabro. Li falis sen agonio kaj baraktis en lastaj tremoj.

Ĉi-momente la normando, radianta de silenta ĝojo de maljuna kamparano, leviĝis kaj, por plezuro, fortranĉis la gorĝon de la kadavro. Poste li tiris kadavron ĝis la rando de fosajo kaj ĵetis ĝin en la fosajon.

La ĉevalo ankoraŭ trankvile atendis sian posedanton. Patro Milon suprenrajdis la ĉevalon kaj forgalopis tra la ebenaĵo.

Post unu horo, li vidis du aliajn ulanojn reiri ŝultro ĉe ŝultro al komandejo. Li rekte kuris al ili, kriante ankoraŭ: "He, helpon, helpon!" La prusoj rekonis la uniformon kaj sensuspekte lasis lin proksimiĝi al ili. La maljunulo galopis, kiel obuso, inter ilin, kaj mortigis unu per sabro kaj la alian per revolvero.

Poste li buĉis la ĉevalojn, ĉar tiuj estas germanaj ĉevaloj! Poste li senhaste revenis al la kalkoforno kaj kaŝis ĉevalon en la fundo de la malhela galerio. Li demetis sian uniformon tie, reprenis siajn ĉifonajn vestojn kaj revenis al sia lito, dormis ĝis mateno de la sekvanta tago.

Dum kvar tagoj, li ne eliris, atendis la fino de la enketo komencinta. Sed la kvina tago, li ree eliris, kaj ankoraŭ mortigis du soldatojn per sama artifiko. Ekde tiam li ne ĉesis plu. Ĉiunokte, li sencele vagis, jen ĉi tien jen tien por mortigi prusojn, galopante sub la luno, sur dezertaj kampoj, li ŝajnis ulano kiu perdis sian vojon, ankoraŭ ŝajnis ĉasisto kiu speciale ĉaskaptis kapojn de homoj. Plenuminte sian

taskon, la maljuna kavaleriano lasis kadavrojn, kiuj kuŝis ĉe la vojflanko, revenis al kalkoforno por kaŝi sian ĉevalon kaj uniformon.

Ĉirkaŭ la tagmezo, kun trankvila mieno, li alportis avenojn kaj akvon al la fundo de la subtera pasejo kaj nutris ĝissate la ĉevalon, kio postulis pezan laboron.

Sed en la antaŭa nokto, li ree atakis du prusajn soldatojn, unu el kiuj, jam pretigita por defendi sin kaj tranĉis per sia sabro la vizaĝon de maljuna kamparano.

Sed li mortigis du prusajn soldatojn. Li denove reiris kaŝi la ĉevalon kaj surportis siajn malnovajn vestojn. Tamen kiam li reiris hejmen, pro elĉerpiteco li trenis siajn paŝojn ĝis la ĉevalejo, ne havante plu forton iri al la domo.

Oni trovis lin kuŝi sur pajloj, sangmakulitan tutkorpe ...



elfrancigis **Leming Lin** (Ĉinio)



esperantigita de **Alain Roze Courbou** (Francio)

## Chiung Yao (1938-)



*aŭtorino, Chiung Yao*

### En profunda korto (11)

La suno, kiel granda fajra pilko, minace ĵetis siajn radiojn sur la teron. Mez-somero de Tajvano ardis kaptumige. Parkinte sian aŭton ĉe la pordego de la fabriko, Bai Peiwen elauĝigis. Varma ondo tuj

lin atakis kaj la varmega suno blindige brilis super lia kapo. Kiam li eniris la fabrikon, lin renkontis la delikata aromo de tefolioj en la aero, miksitaj kun bonodoro de jasmenfloroj, pure dolĉa kaj freŝa, kiu ĉiam plaĉis al lia flarsenso. Profunde enspirinte, li sentis sin pli vigla, kvazaŭ la ardanta aero estus multe forpelita de la aromo de tefolioj. Preterlasante la prilaborejon, li aŭdis monotonan kaj enuigan zuman bruadon eligitan de bakforno kaj frotmaŝino de tefolioj. La majstro ĉe la bakforno levis sian kapon kaj salute kapsignis al Bai. La fajro brulis sub la maŝino, igante la tutan prilaborejon bakkesto. La majstroj kaj laboristinoj abunde ŝvitis. Starinte momenton ĉe la pordo de la prilaborejo, li iris pluen. Sur la te-sunuma tereno, tri aŭ kvar laboristinoj kun bambua ĉapelo sur la kapo, kies manoj kaj piedoj estis vunditaj per tolo kontraŭ la arda suno, senĉese turnis la ĵus plukitajn tefoliojn per bambuaj rastiloj. Vidinte lin, ili ne ĉesis labori nek direktis sian atenton al li. Kiel mastro li malproksimis de ili en hierarkio, kaj ilin regis laborestro.

Trairinte la te-sunuman terenon, li eniris sian oficejon, kiu estis la nura ĉambro klimatizita en la tuta fabriko krom fridiga tenejo. Ĉiutage li laboris ses aŭ sep horojn tie. Kiam li forestis, tiu ĉi ĉambro servis kiel akceptejo. Najbare de lia ĉambro estis la oficejo por aliaj superaj oficistoj, kiaj direktoro Zhao kaj kontisto Zhang. Pli malproksime staris ripozejo por laboristinoj, manĝejo kaj loĝejo. Tiu ĉi domo entenis kvin grandajn ĉambrojn, kiuj, kune kun prilaborejo, te-sekiga ĉambro kaj fridiga tenejo, konsistigis U-forman komplekson. En vaka loko de la komplekso troviĝis te-sunuma tereno. Laŭ la skalo, lia fabriko de te-prilaborejo estis la plej granda en Taibai. En aliaj fabrikoj, frotado kaj bakado de tefolioj ankoraŭ estis plenumitaj per manlaboro, dum Bai jam anstataŭigis manlaboradon per maŝinoj. Pro tio, en lastaj jaroj, la fabriko ekspansiis multe kaj negocado ankaŭ rapide pliiĝis. En entreprenado kaj kreemo, li montris sian unikajn konojn kaj kapablojn. Tial, kvankam



la fabriko estis fondita de lia patro, la vera prospero tamen estiĝis nur post la morto de lia patro. Kontisto Zhang, kiu servis en la fabriko dekelkajn jarojn, ofte diris al la novenomumita direktoro Zhao, “Kvankam nia juna mastro aspektas pedante kaj malforte, li tamen estas dekoble kapabla ol lia patro en entreprenado! Nur tri jarojn li transprenis la fabrikon, sed la negocado jam pliiĝis pli ol dekoble!”

La filozofio de Bai Peiwen estis senĉesa investado. Li reinvestis ĉiun sumon da mono, kiun la fabriko profitis, por aĉeti maŝinojn, konstruigi domojn kaj fridigan tenejon... Li altigis la kvaliton de la produktaĵoj, tial kelkaj grandaj vendejoj de te-produktaĵo en Taibei jam fariĝis liaj fiksitaj klientoj. Kaj poste eksterlandaj mendoj alvenis sinsekve, tiel ke lia te-plantejo jam ne povis liveri sufiĉan provizojn al aĉetantoj. Pro tio li aĉetis te-plantejojn kaj plibonigis la metodon de plantado. Oni ne sciis, kiel li faris tion: en aliulaj te-plantejoj oni rikoltis tefoliojn maksimume kvinfoje ĉiujare, trifoje en printempo kaj dufoje en aŭtuno, dum en liaj propraj, oni ofte havis sep aŭ ok rikoltojn, ĉiufoje kun nemalbona kvalito de te-folioj. Tial la famo de “Tefolioj de Bai” estis tre konataj en la rondo.



Enirinte la oficejon, Bai apenaŭ sidiĝis, kiam direktoro Zhao eniris kun fasko da mendiloj en la mano. Tiu staris antaŭ Bai, dirante, “Alvenis la mendilo el Japanio, kiu postulas ‘Lango de Birdo’. Mi timas, ke ni ne povas produkti tiom multe. Te-vendejoj Xinxin kaj Qingxiang ankaŭ mendas ‘Lango de Birdo’, kiu ŝajnas furora ĉijare.”

“Lango de Birdo” estas speco de verda teo, konata de te-ĝuantoj. Ĝi devas farita nur per ŝosoj ekskluzive, sed ne toleras ajnan folion miksitajn, tial oni per multe da ŝosoj povas produkti nur iom da “Lango de Birdo”, kaj sekve de tio, ĝi estas multkosta.

“Kiom Japanio mendas?” Bai demandis.

“Mil kestojn.”

“Ni akceptu!” diris Bai.

“Ĉu ni povas? Ili postulas, ke ni faru liveradon en tri monatoj, sed oni rikoltos aŭtunajn tefoliojn en oktobro. Se ni ne povos fari liveradon laŭ difinita dato, ili postulas monpunon.”

“Atendu. Mi telefonu por informo.”

Bai turnadis la telefonnumeron de la hejmo kaj la parolanto estis servistino Alan. Li demandis, “Ĉu estas sinjoro Gao ĉirkaŭe?”

“Li ĵus revenis el te-plantejo.”

“Petu al li paroli.” Gao alvenis. Bai demandis lakone, “Kiel statas la te-plantejo, Lide? Mi volas rikolti tefoliojn en unu monato, ĉu eble? Mi akceptis la mendilon el Japanio.”

“Kion la mendilo postulas?”

“Lango de Birdo.”

“Ha!” la parolanto ĉe alia fino ridete diris, “Do, mi nur staru en la te-plantejo kaj alvoku venton kaj pluvon. Kaj poste mi blovu al la te-arbetoj per fea elspiro kaj krii, ‘Kresku! Kresku! Kresku! Mi volas vidi, ĉu ili povas kreskigi la foliojn.’”

“Ne ŝercu! Donu al mi vorton, jes aŭ ne?”

“Jes!” asertis la parolanto decideme kaj simple.

“Tio estas via aserto, Lide. Se oni ne povos fari rikolton je difinita tempo, mi kulpigos vin!”

“Estu trankvila, Peiwen! Mi neniam malbonigas vian aferon, ĉu?”

“Do, ĝis vespere!”

“Momenton!”

“Kio?”

“Via patrino volas, ke vi revenu por vespermanĝo!”

“Ho,” Bai demetis la aŭdilon. Rigardante al direktoro Zhao, li ekbalancis la kapon, ridante, “Estu tiel. Ni akceptas.”

“Tiu sinjoro Gao vere havas rimedon por reagi,” nereteneble diris direktro Zhao. “Ŝajnas, ke te-arbetoj obeas lin.”

“Li ja estas fakulo!” diris Bai. “Ĉu vi havas aliajn aferojn?”

“Ĉi tiuj dokumentoj bezonas subskribadon. La mastro de Shengda Komerca Firmao invitis vin al sabata vespermanĝo, kaj li jam donis al vi sep aŭ ok telefonvokojn.”

“Shengda? Al kie ili vendos?”

“Al sudorienta Azio.”

“Ni antaŭe komisiis la tuton al Hongji, ĉu ne? Donu al mi la kontrakton kun Hongji kaj ni decidu post kiam mi ekzamenos ĝin. Fakte Hongji agas ne malbone, escepte de ĝia hezitema pagado. Kiom-monatan kambion ĝi pagis al ni lastfoje?”

“Ses-monatan.”

“Kiel nedeca pago! Kiom da monatoj estas difinita laŭ la kontrakto?”

“Ŝajne tri monatojn.”

“Do donu al mi la kontrakton kaj mi ĝin ekzamenu unue.” Bai transprenis dokumentojn kaj ekzamenis ilin unu post alia. Sin turnante, direktoro volis foriri, kiam Bai voke haltigis lin. “Momenton, direktoro Zhao.”

“Sinjoro Bai?”

“Mi vidis, ke la laboristinoj en la bakfornegejo ŝajne suferas multe pro la alta temperaturo. Informu al kontisto Zhang, ke oni instalu klimatizilon tie, kaj listigu la elspezon en kont-artikolon por instalaĵoj. Tuj agu. Ju pli rapide, des pli bone.”

“Bone.” la direktoro ekridetis. “Se tiel, oni konkuros por la laboro en la bakfornegejo.”

Post kiam li retiris sin el la oficejo, Bai, malantaŭen klininte sin en la seĝo, ekstudis la kontraktojn en la mano kaj substrekis kelkajn lokojn modifindajn. Kiam li volis telefone alvoki kontiston Zhang, li vidis grupon da laboristinoj streĉite kaj brue preterkuri la fenestron. Surprizite, li stariĝis kaj malfermis la pordon. Ĉiuj kuris en la direkto al la te-sunuma tereno. Laŭ la direkto, li vidis amason da homoj kunpuŝiĝantaj sur la tereno kaj pririgardantaj, kio okazis. Kaptinte direktoron Zhao, kiu ankaŭ alkuris tien, li demandis, “Kio? Kio okazas?”

“Laboristino svenis sur la tereno.”

“Sveni?” Kun ekmiro, li rapide paŝis al la tereno. La arda suno lumis fajre kaj eĉ varmegis la cementan plankon de la tereno. Elirinte al la klimatizita oficejo, li sentis la varman aeron ankoraŭ pli vaporumanta. Ne mire, en tia vetero, la laboristino svenis. Ili devus alternis la skipojn. Kiu povus elteni tian eksponiĝon sub la ardega suno? Li impetis al la grupo kaj kriis, “Flanken! Donu spacon al ŝi por enspiri pli da aero!”

Post kiam laboristinoj tiris sin flanken, li alpaŝis kaj vidis la laboristinon surdorse kuŝanta sur la tero, ankoraŭ kun bambua ĉapelo sur la kapo. Sub la ĉapelo ŝia tuta vizaĝo, krom okuloj kaj nazo, estis vindita per indiga tolo kaj ankaŭ ŝiaj manoj kaj piedoj volvitaj per indiga tolo. Laboristinoj, kiuj laboris sub la suno, kutime ekipis sin tiel por eviti sunum-vundiĝon de la haŭto. Kaŭriĝinte, Bai ekrigardis ŝin kaj, levinte la kapon, jetis rigardon al la suno radianta rekte malsupren. Li sciis, ke nun la plej grava afero estas movi ŝin al la ombra kaj malvarmeta loko kaj senigi tiujn vindaĵojn. Senpripense li levis ŝin en sia brakumo. Kun ŝi en sia sino li eksentis ŝian malpezan kaj sveltan korpon, kiu ekmirigis lin. Li transportis ŝin en sian oficejon kaj diris al sekvanta direktoro Zhao, “Pli malvarmigu la ĉambron! Rapide!”

La direktoro turnis la butonon al pli malalta temperaturo, dum li kuŝigis ŝin laŭlonge sur la sofona kaj forigis la bambuĉapelon kaj tolon kovrantan ŝian vizaĝon.

Je senigo de la tolo, bela kaj gagatnigra hararo akvofale pendis malsupren, kaj samtempe montriĝis pala kaj belaspekta vizaĝo. La delikateco de la vizaĝo mirigis lin: la alta frunto, kurbaj brovoj, du vicoj da longaj okulharoj ĉe la fermitaj palpebroj, malgranda kaj iom kuspita nazo kaj firme fermitaj lipoj sensangaj kaj kompatindaj. Ŝtoniĝinte kelke da sekundoj, li tuj rapide forigis la tolon volvitan ĉirkaŭ ŝiaj pojn kaj malkuniĝis la butonon ĉe la kolumo de ŝia ĉemizo, demandante al la direktoro, “Kiel nomiĝas la laboristino?”

La direktoro ĵetis ekrigardon al ŝi. “Ŝi ŝajnas nove-veninto. Nur la laborestrino konas ŝian nomon.”

“Venigu la laborestrinon, kaj alportu alian malvarman lavtukon.”

La laborestrino, pli ol tri dek jarojn, nomiĝis Cai Jinhua, kiu jam laboris pli ol dek jarojn en la fabriko. Rigardante al Bai Peiwen, ŝi respektplene diris, “Ŝia nomo estas Zhang Hanyan. Ŝi venis antaŭ tri tagoj. Ŝajnas al mi, ke ŝi ne estas en bona sano, sed ŝi insistis, ke ŝi povas...”

“Zhang Hanyan?” Bai interrompis ŝin. Kiel elegante la nomo sonas. “Ĉu ŝi loĝas en la amasloĝejo de nia fabriko?”

“Ne, mankas vaka lito. Ŝi deziras loĝi en amasloĝejo, sed nun ni povas fari nenion pri tio.”

“Kial vi ne lokis ŝin en laborpostenon en te-sekigejo?”

“Ho, sinjoro Bai,” Cai ekridetis kontraŭvole. Ĉielo scias, kiel malfacile servi kiel laborestro! Kiu ne konkuras por malpeza kaj komforta laboro? Kiu devas labori rekte sub la suno! “Se oni ĉiuj volas labori en te-sekigejo, kiu el ili laboru sur te-sunuma tereno? “Ĉar ŝi estas mallerta nove-veninto, mi ne kuraĝas loki ŝin sur aliajn postenojn.”

“Ho,” Bai ekbalancis sian kapon, rigardante Zhang Hanyan kuŝantan sur la sofo, kiu, maldika kaj malalta, surhavis la veston kun desegno de ruĝaj floretoj sur blanka fono, kaj kies haŭto estis blanka kaj delikata kaj kies fingroj maldikaj kaj longaj. Tiel delikata, ŝi ne estas destinita por labori. “Kie ŝi loĝas?”

“Mi ne scias,” Cai diris iom singene. “Poste mi demandos al ŝi pri tio. Se mi scius pli frue, ke ŝi ne povas elteni...”

“Sufiĉe,” li eksvingis sian manon. “Foriru! Lasu ŝin ripozi momenton ĉi tie. Mi timas, ke ŝi ne povos daŭrigi sian laboron hodiaŭ. Kiam ŝi revenos al la konscio, donu unutagan forpermeson al ŝi por ripozi. Foriru do.” Cai foriris.

Kovrata per malvarma lavtuko sur la frunto kaj kuŝanta en klimatizita ĉambro duontage, ŝi fine revenis al konscio. Ŝi iom kuntiris la brovojn kaj levetis la longajn okulharojn, montrante paron da kristale klaraj okuloj en malklara vualo. Post tio, ŝiaj okulharoj kuniĝis kaj ŝiaj brovoj kuntiriĝis pli strikte. Ŝi provis movi si, eligante mallaŭtan ĝemon.

“Ŝi sobriĝis,” diris la direktoro.

“Mi supozas, ke ŝin jam ĝenas nenio,” Bai trankviliĝis. “Ankaŭ vi foriru. Lasu ŝin kuŝi sur la sofo dum pli da tempo.” La direktoro eliris el la ĉambro.

Bai rekte paŝis al Zhang Hanyan kaj sidiĝis sur la malaltan tableton antaŭ la sofo. Kun krucitaj manoj antaŭ sia brusto, li kviete kaj zorgeme okule mezuris tiun junan vizaĝon: la pinta mentoneto, la bela kaj svelta konturo de la kolo, la malfortaj ŝultroj... La knabino ja similas fajnan kaj miniaturan artaĵon. Ŝiaj iom kuntiriĝantaj brovoj logas amemon, ŝiaj ventumile flagrantaj okulharoj kortuŝas kaj tiuj etaj lipoj, mallaŭte ĝemantaj lipetoj... Ŝi vere vekigis. Abrupte ŝiaj longaj okulharoj leviĝis kaj malfermiĝis paro da panikitaj okuloj grandaj, profundaj kaj nigraj kiel du malhelaj lagetoj.

“Kio...okazas al mi?” ŝi demandis malpeze kaj malforte, provante sidiĝi.

“Ne moviĝu!” Bai premis ŝian ŝultron per la mano. “Vi pli bone kuŝu pli da tempo. Vi svenis dum kelka tempo.”

Ŝi pligrandigis siajn okulojn kaj dubeme rigardis lin. Post longa tempo, ŝi ho-is kompreneme kaj mallevis siajn okulharojn malforte. Klinante sian kapon flanken, ŝi rigardis la teron kaj fingrumis subkonscie la baskon de la vesto, eligante tre longan suspiron.

“Mi vere estas sentaŭga,” ŝi parolis al si. “Mi povas fari nenion.”

Tiu softa kaj pentema monologo kurigis strion da miriga kaj kompatema sentimento tra lia koro. Kuŝante tie, pala kaj malforta, ŝi embarasiĝis en tiaj izoliteco kaj senhelpeco, ke li nereteneble ekhavis fortan impulson konsoli ŝin, eĉ protekti ŝin.

“Vi laboris longan tempon,” li diris rapide. “Tian veteron neniu povas elteni. Ne maltrankviliĝu. Mi povas ordoni, ke ili transpostenigu vin al te-sekigejo aŭ bakfornegejo.”

Ŝi rigardis lin kviete, kun explorema mieno, ankoraŭ iom kuntiriĝante la brovojn. “Ne zorgu pri mi, sinjoro Bai,” ŝi diris mallaŭte kun hontemo kaj maltrankvileco. Tio, kio ŝin plej panikis, estis kuŝi en tia stato antaŭ viro. Pri Bai ŝi jam ekhavis plenan konon, ekde la unua tago, kiam ŝi eniris la fabrikon. Ŝi sciis, ke ĉiuj en la fabriko kaj respektas kaj kredeme adoras la junan mastron. En la okuloj de laboristinoj, li tute preskaŭ estis la kombinaĵo de homo kaj diaĵo: juna, belaspekta, decidema, entreprenema, plibonigema kaj zorgema pri geservistoj. Tiam ŝi ekkomprenis, kial oni ŝatas lin, tiom afablan kaj tiom mildan.

“La laboro sur la te-sunuma tereno ne estas la plej peniga. Mi devas ellerni ĝin,” ŝi diris. “Ĉiukaze, la laboro ĉiam bezonas laboristinon. Se mi ne laboras tie, oni devas.”

“Kiu rekomendis vin al ni?”

“Laboristino de via fabriko, kun nomo Yan Lili. Vi ne konas ŝin, mi pensas. Ŝi

estas mia najbarino.”

Li penetreme rigardis ŝin. Tiam ŝi jam sidiĝis, forpreninte la lavtukon de sur la frunto. Kun longaj haroj pendantaj ĝis la ŝultroj, ŝi havis pure blankajn dentojn kaj brilajn okulojn, iom retiriĝema, multe pli delikata kaj timida, kaj plej rimarkinde eleganta. Li nevole ekgapis al ŝi.

“Tiu laboro ne taŭgas al vi,” li diris instinkte.

“Mi esperas, ke vi ne volu maldungi min per tiuj vortoj,” dirante iom panikite, ŝi peteme rigardis lin, kun radio da ĉagreno en la okuloj.

“Ho, ne, mi ne volas fari tion,” li diris haste. “Mi nur sentas, ke tiu laboro estas plej peniga por vi. Vi ŝajnas tiom milda kaj malforta, ke vi ne povas elteni la penigan laboron, mi timas.”

Ŝiaj okulharoj malleviĝis, kaj post momento, kiam ili ree leviĝis, ŝiaj okuloj aspektis pli pure klare. Ŝi malstreĉis la kuntiriĝintajn brovojn kaj prezentis kompatindan rideton ĉe la buŝangulo. Tiu rideto eĉ pli kortuŝis lin ol ŝia brov-kuntiriĝo. Ridetante, ŝi diris kvazaŭ mokante sin mem, “Mi iam faris pli penigan laboron.”

“Kian laboron?”

Ŝi tenis sin silenta. Post longa tempo, ŝi ree rigardis en lian vizaĝon, ankoraŭ kun rideto ĉe la buŝangulo, sed kun nekompreniga kaj majesta mieno.

“Bonvole ne demandu al mi pri tio, sinjoro Bai. Vi devas kompreni, ke la sufero, kiu trafas min fizike, estas nenio al mi. Labori ĉi tie plezurigas min. Estas tre facile por mi trovi nepenigan laboron, sed mi ne volas, ke mi lasu mian vivon erodiĝi senlume en mia juna aĝo.”

Bai eksentis kortuŝiĝon. Ĉu tio estas parolo el la buŝo de laboristino? Rigardante ŝin fikse, li demandis, “Ĉu vi vizitadis lernejon?”

“Mi estas abituriento.”

Abituriento? Imagu! Ŝi estas eĉ lernantino diplomiginta el supera mezlernejo! Ŝi dungiĝis kiel laboristino en te-fabrika! Mirplene gapante al ŝi, li estis tute konfuzita de ŝi en sia menso. Kia junulino ŝi estas? Ĉu ŝi nur volas serĉi kelkajn travivaĵojn ĉi tie? Aŭ ĉu ŝi volas sperti alispecan vivon pro tio, ke ŝi legis tro multe da legendaj noveloj? “Ĉar vi estas abituriento, vi ŝajne nenecese prenas ĉi tiun laboron, kaj vi povas trovi pli bonan okupon!”

“Mi trovis kaj ankaŭ prenis ĝin, sinjoro Bai,” ŝi ridetis, tiom feble. “Mi ne povas trovi decan laboron, ĉar mi ne havas konatan dunganton nek garantiulon nek rekomdanton. Kaj krome, la diplomo de abituriento ne tiom valoras kiom vi imagas. Cetere, mi ankaŭ dungiĝis kiel komizo, skribisto, sekretario, kaj fine mi trovis, ke mi vendas ne laborforton nek intelekton, sed Junecon. Mi eĉ prenis la malplej bonan... Fine, mi elektis vian fabrikon, kiu estas la plej bona el la lokoj, kie

mi iam laboris.”

Li restis silenta momenton, rigardante en ŝian beletan vizaĝon. Li venis al la kompreno, kiel malfacile junulino serĉadas laboron en la socio, precipe tiuj belaj junulinoj, ĉar troviĝas ĉie kaptiloj, kiuj atendas ilian enfalon. Li suspiris en la korfundo kaj sentis bedaŭron pri ĉi tiu junulino kun eleganta nomo Zhang Hanyan.

“Ĉu la laboro estas necesa al vi?”

“Jes.”

“Kial?”

“Por pagi ŝuldon.”

“Pagi ŝuldon? Ĉu vi estas ŝulda? Kaj viaj gepatroj?”

“Mi ne havas gepatrojn.” Deprimigiĝinte, ŝi apogis sian vangon per la mano, sidante tie. Ŝiaj okuloj pli kaj pli malheliĝis. “De mia infaneco miaj gepatroj mortis, kaj mi jam ne povas rememori, kiel ili aspektis. Mia malproksima parenco alportis min al Tajvano. La geedzoj havis nur idiotan filon. Ili min vartis kaj edukis ĝis kiam mi diplomiĝis el la supera mezlernejo. Kaj poste, ili subite diris al mi, ke mi edziniĝu al la idioto...” ŝi montris malpezan rideton, rigardante lin. “Jen estas mia rakonto. Mi ne volis, kaj rompiĝis la amsono inter ni. Mi transloĝiĝis eksteren kaj mi perlaboris monon por repagi al ili la ŝuldon, kiun mi akumulis dum dekkelkaj jaroj.”

“Tio ne pravigeblas!!” li diris iom indigne. “Kiom vi devas repagi al ili?”

“Du cent mil dolarojn.”

“Kiom vi perlaboras ĉi tie ĉiumonate?”

“Mil dolarojn.”

Ho ĉielo! Kiom longe ŝi devas laboradi por repagi la ŝuldon! Li direktis sian rigardon al ŝi, kiu evidente jam klinis sian kapon al sia sorto. Ŝia fordonema kaj obeema mieno igis, ke li volis elkore pravigi ŝin pro la maljusteco. “Vi povas ne repagi ilin, ĉar ili ne diris pli frue, ke la kondiĉo por varti vin estas edzinigi vin al la idioto! Laŭ leĝoj, ili ne povas sin pravigi. Nenecesas doni atenton al ili!”

“Laŭ leĝoj, ili ne povas sin pravigi, sed laŭ homaj sentoj, mi ŝuldas multe al ili!” Ŝi eligis eksuspiron kaj ree iom kuntiris siajn brovojn. “Vi ne komprenas. Mi ruinigis ilian dumvivan esperon. En iliaj okuloj, mi estas maldankema... Tial mi volontas repagi al ili la sumon da mono por moderigi la pezon sur mia konscienco.” Levinte siajn okulharojn, ŝi rigardis lin kviete kun pridemanda mieno. “La ŝuldo de la homa vivo estas malfacile kalkulebla, ĉu ne? Oni ofte ne povas juĝi, kiu ŝuldas al kiu.”

Li fiksrigardis ŝin. Li aprezis ŝin! Liaj ĉiuj konscioj kaj pensoj aprezis ŝin. Kaj krome, iom post iom, forta kaj mirplena sento elŝprucis el lia koro. Li neniel atendis, ke ekzistas tia figuro inter liaj laboristinoj! Kvazaŭ eltrovinte perlon en amaso da sablo, li ne povis kaŝi sian ravan kaj emocian senton. Stariĝinte, li abrupte diris decideme, “Vi devas tuj forlasi ĉi tiun laboron!”

“Ho, sinjoro?” ŝi surpriziĝis. Ŝia buŝo ĵus revivigita paliĝis. “Mi bedaŭras, ke mi svenis. Mi certigu al vi...”

“Vi ne povas certigi al mi ion,” li ridete interrompis ŝin, ĵetante sian mildan rigardon sur ŝian vizagon. “Se vi nun restus sub la suno pliajn du horojn, vi ankoraŭ svenus! Vi ne kapablas plenumi ĉi tiun taskon.”

“Ho, sinjoro?” Ŝi rigardis supren al li, pasive kaj senhelpe. Ŝiaj tremetantaj lipoj prezentis ŝin ankoraŭ pli kompatinda.

“Do, ekde morgaŭ, vi eklaboros en mia oficejo. Mi bezonas homon, kiu povas helpi al mi fari skriban laboron, ordigi kaj ellabori kontraktojn, subskribi kaj disdoni fakturojn. Momenton poste mi ordonis al maljuna Zhang almeti alian skribtablon ĉi tien. Ekde morgaŭ vi...”

Ĉe tio, ŝi eksaltis el la sofo, je lia neatenditeco. Sur ŝia vizaĝo videblis neniom da ĝojo, sed male paniko, timideco, retiriĝemo kaj kvazaŭa esprimo de vunditeco. “Ho, ne, ne, sinjoro,” ŝi haste diris. “Mi ne volas akcepti ĉi tiun taskon.”

“Kial?” li gapis al ŝi mirplene.

Ŝi fermis sian okulojn kaj mallevis sian kapon. Kiam ŝi relevis sian kapon, larmoj jam ŝveligiĝis en ŝiaj okuloj kaj la pupiloj trempataj en larmoj sin montris tiom nigraj, tiom brilaj kaj tiom tristaj. Kun tremanta voĉo, ŝi diris, “Mi bedaŭras, sinjoro Bai. Vi povas aserti, ke mi ne konas vian favoron. Mi ne povas akcepti, mi ne volas akcepti, ĉar, ĉar...” Ŝi faris enspiron. Larmoj glitis malsupren de ŝiaj vangoj ĝis ŝiaj moviĝemaj lipoj. “Kvankam mi estas sensignifa, soleca kaj senhelpa... mi tamen ne bezonas kompaton nek simpatian. Mi volas vivteni min per miaj propraj fortoj. Mi dankas vin pro via favoro, sinjoro Bai, sed bonvole estu komprenema al mi... Mi jam havas nenion krom porcio da memrespekto.” Findirinte, ŝi impetis al la pordo, sen rigardi al li. Antaŭ ol li vekigiĝis el surprizo, ŝi jam malfermis la pordon kaj elkuris. Postkurinte ĝis la pordo, li rigardis ŝian rapide malaperantan dorsfigureton en la koridoro kaj nevole ŝtoniĝis tie. Li neniel atendis, ke lia propono eĉ vundis tiun delikatan kaj malfortan koron. Tamen en la profundo de sia koro li eksentis skuon unuafoje dum sia tuta vivo. Li estis skuita profunde, profunde, profunde.

*(daŭrigota)*

elĉinigi **Veĵdo** (Ĉinio)



# Yang Qingshu

## Enpaki Nian Amon

En nia urbeto, se oni ne edziĝas super la aĝo de 30 jaroj, estas certe, ke ili ne havas bonajn “naturajn kondiĉojn” tiajn, kiaj malbela aspekto kaj psikologiaj mankoj, aŭ ili inklinas fariĝi bonzoj (ĉe ni estas multaj temploj kaj bonzoj), aŭ io okazas al ilia cerbo.

Dankon al Ĉielo! Mi jam edziĝis ĝuste en la jaro kiam mi ĵus atingis la aĝon de 30 jaroj, ĉar feliĉe la supre-menciitaj tri kazoj ne falis sur min.

Vi preferas danki vian edzinon ol Ĉielon, Ĉjing diris. Se mi ne firme decidus edziniĝi al vi, vi ankoraŭ estus fraŭlo ĝis nun.

Mi jesis senĉese, kaj riverencadis al Ĉjing.

Ĉjing estas mia edzino.

Se oni faras zorgeman komparon, oni povas trovi, ke edzeco kaj fraŭleco havas siajn proprajn avantaĝojn. Edzeco signifas, ke vi ekhavas varman manĝon; ke vi kunportas enviindan hejmsopiron kiam vi vojaĝas foren; kaj ke, se vundita ekstere, vi povas hejmeniri por leki vian vundon trankvile. Tiuj estas la avantaĝoj de edzeco.

Fraŭleco signifas senzorgecon. Se vi sate manĝas, via tuta familio satiĝas; se vi volas senkonsidere veturi tien kaj ĉi tien tra la mondo, neniue, vin sekvante, vin sakris; se vi estas mallaborema, tio ne gravas, ekzemple, kiam matene vi vin elŝovas el la litkovrilo, ĉio estas farita se vi persone eliĝas sen... Se paroli pri litkovrilo, hehe...

Post mia edziĝo, mi ofte ridas tiamaniere. Se mi ridus antaŭ la edziĝo, la rida maniero elspirus murdemon kaj insidemon; tamen post la edziĝo, la rida maniero prezentas senhonteman kaj obstineman aspekton — mi ridas tiamaniere, ĉar mi faras ion malpravan. Mi kredas, ke tia rido ne estas fremda al 99 procentoj de edzigitaj viroj.

Mi ofte ridas tiamaniere.

Mi ridas tiel, pro tio, ke Ĉjing estas purema kaj ordigema, kaj ĉiam devigas min faldi la litkovrilon nete kaj rektlinie, kvazaŭ hakita per glavo. Ĉu necesas? Mi demandas. Tio estas en hejmo, sed ne en kantonmento. Vi estas mia edzino, kaj mi ne estas soldato en via subploton.

Ŝi rikanas kontraŭ mi.

Ŝia rikano pleje senesperigas min. Kompare kun tiuj gvidantoj, kiuj historie instrukcias kiel grandaj simioj, ŝi estas multe pli timiga ol ili. Ĉe tio, mi vole nevole hehe-as, kaj mi ankoraŭ enŝovas min en litkovrilon.

Mi vere ne komprenas kial Ĉjing ŝatas la litkovrilon kun disŝutitaj floretoj sur hele nigra koloro. Mi konfesas, ke tiaspeca litkovrilo estas tre bela, sed mi trovas, ke ĝi ankaŭ konfuzigas. Ekzemple, vi ne povas distingi diversspecajn aĵetojn sur ĝi, kompreneble, kelkfoje aliajn kia haroj.

Almenaŭ, mi konsideras, ke haroj ne apartenas al tiuj diversspecaj aĵetoj. Mi iam legis artikolon pri haroj. Ĝi diris, ke unu haro servas kiel miniaturo de persono, kaj el unu haro oni povas supoze eltiri ies karakterizaĵojn en psiko, temperamento k.a. Alivorte, unu haro estas enkarniĝo de unu persono.

Mi ne scias, ĉu la aserto estas iom praviga aŭ ne, sed mi preferas, ke ĝi estu vera. Ĉiutage niaj haroj forfalas, fakte, tamen mi kredas, ke Dio diras al ni, ke ni iras pli kaj pli proksimen al la morto kun ĉiu tago, aŭ Dio bonkore atentigas al ni “trezori la vivon”.

Kovrinte mian kapon per litkovrilo, mi larĝigas miajn okulojn por serĉi harojn falintajn sur la littuko.

Kion vi faras?

Ĉe la subita demando de Ĉjing, mi ektremis.

Kiam vi revenis, Ĉjing?

Mi... hehe...

Ŝi forte levis la litkovrilon el mia kapo kaj mi tuj eksponiĝis en brila lumo.

Mi tre embarasiĝis.

Ŝi vidis notlibron en mia mano.

Vi...

Mi...

Antaŭ ol mi diris ion, ŝi deprenis ĝin el mia mano. Diru, vi eĉ kuraĝus...

Ŝi ŝtoniĝis antaŭ ol fini la parolon.

Sur po paĝo de la notlibro algluiĝis longaj haroj, pli aŭ malpli en nombro, kiujn mi trovas sur la littuko post kiam mi ellitiĝas ĉiumatene.

Ŝia mano fiksiĝis kaj ŝia korpo senmoviĝis, tamen mi vidis la tremetojn de ŝiaj ŝultroj.

Tiumomente, mi emis diri al ŝi, ke mi ĉiam kovas feliĉan kaj fieran senton pro mia posedo de ŝi. Kvankam ekzistas tiaj kaj ĉi tiaj neakordoj en niaj temperamentoj, kaj kvankam okazis kvereloj kaj malpacemoj, eĉ la plej firmaj viroj ne povas elŝiri el la hejmo, ĉar la hejmo provizas forton al tiuj homoj, kiuj volas fariĝi veraj viroj. Estas ŝi, kiu donis al mi hejmon, kaj pro tio mi fariĝas pli firma kaj profunde dankema al ŝi. Mi estas nur ordinara viro. Mi havas nenion. Tio, kion mi povas fari, estas trezori ĉi ĉion, inkluzive ŝian ĉiun falintan haron eĉ pli ol aliuloj, ĉar ŝia ĉiu haro estas ŝia miniaturo kaj ĉiu haro estas ŝia memo. Eble, kiam ni troviĝos en kaduka aĝo, ĝuste kiel tiu tempdaŭro priskribita de Yeats en la poemo *Kiam ni maljuniĝos*, Tiam mi plektos belan florkronon per tiuj haroj, ĝentile surportigos ĝin sur ŝian kapon, kaj flustros ĉe ŝia orelo: nia amo estas jam enpakita...

— Sed mi nenion diris, vere, tiumomente mi diris nenion.

*elĉinigi Yang Fang (Ĉinio)*

# Anonima (aŭtoro vivanta en Tang-dinastio)

## Li Mo

S-ro Li Mo estis famkonata kiel la plej eminenta flutisto dum Kaiyuan (*kajjŭan*)-erao (713-741), kaj li estas senrivala majstro ankaŭ en la nuntempo.

Foje, pro iu afero s-ro Li Mo petis forpermeson kaj veturis al Shaoxing (*ŝaŭŝing*). Lokaj aŭtoritatuloj kaj famuloj konkure invitis lin al festenoj por aŭskulti lian majstran flutludon.

Estis dek rekomenditoj por la ekzameno de la titolo Jinshi (*ĝinŝi*), ĉiuj el bonhavaj familioj de Shaoxing.

Ili kolektis sumon de du mil moneroj por okazigi bankedon en la Spegula Lago kaj volis inviti s-ron Li Mo tie ludi. Eĉ la anticipa imago pri lia majstra flutludo jam sufiĉe ravas. Ĉar la sumo estis iom tro granda por nemultaj kontribuantoj, ili interkonsentis varbi respektive po unu gasto.

Hazarde iu el la dek gastigantoj ekmemoris nur en la vespero ke li ankoraŭ devis varbi alian homon, sed jam estis tro malfrue por fari tion. Okaze li havis maljunan najbaron kun familia nomo Dugu, kiu vivis ĉiam en kampara kabano, sen scio pri la ekstera mondo, kaj estis nomata Avo Dugu (Avo Izolita). En la urĝa momento la forgesema rekomendito do invitis la avon ĉeesti la bankedon.

Kiam ili venis al la kunsido, ĉirkaŭita de senlima ondaro kaj belaj pejzaĝoj, s-ro Li Mo milde viŝis al sia fluto kaj la ŝipo iom post iom naĝis al la mezo de la lago. Tiam leĝeraj nuboj ŝvebis vuale. Zefiroj karesis ondetojn, kaj ruliĝis blankaj ŝaŭmoj. S-ro Li Mo levis sian fluton. Je lia ekblovo al la fluto, kvazaŭ serenigis la nubozan ĉielon, kaj akve kaj ŝipe fariĝis froste, verŝajne alvenis fantomoj kaj feoj. Ĉiuj gastoj admiris, laŭdante, ke la muziko superis eĉ tiun de la ĉiela palaco. Tamen Avo Izolita nur mutis, kio vekis malkontenton ĉe la kunsidantoj. Ankaŭ s-ro Li Mo prenis la muton de Avo Izolita kiel ofendan ignoron kaj tre koleris.

Post longa meditado, s-ro Li Mo ludis alian arion, pli superban ol la antaŭa. Ĉiuj aŭskultantoj imponite laŭdis. Sed Avo Izolita ankoraŭ sidis silente. La gasto, kiu alvenigis Avon Izolitan, sentis grandan honton, kaj sin pravigis, dirante: "Avo Izolita ĉiam vivis en dezerta kamparo, tre malofte venis al urbo, tial li restas analfabeta pri muziko."

Al la moko kaj riproĉoj de la kunsidantoj, Avo Izolita respondis nur per servorta rideto.

S-ro Li Mo demandis al li: "Estimata Avo, kiel mi interpretu vian konduton? Ĉu ignoron? aŭ vi mem estas majstro de flutludado?"

Avo Izolita senurĝe respondis: "S-ro, kial vi opinias ke mi ne scipovas ludi fluton?" Aŭdinte tion, ĉiuj kunsidantoj ŝanĝis sian mienon kaj ridante petis lian pardonon por s-ro Li.

Avo Izolita diris al s-ro Li Mo: "Nun vi prove ludu por ni la pecon Liangzhou (*ljangĝou*), mi petas."

Kiam s-ro Li Mo finis la arion, Avo Izolita diris al li: "Vi ludas ankaŭ sufiĉe bone, tamen kun miksita fremda tono. Ĉu vi havis kunulon el lando Qiuci (*ĉjuĉi*)?"

Konsternite, s-ro Li Mo leviĝis kaj riverencis: "Ho, vere mirinde! Avo! Eĉ mi mem ne rimarkis tion, sed mia instruisto vere estis ano de Qiuci."

Avo Izolita daŭrigis: "Ĉu vi scias, s-ro, ke je la 13-a alineo vi misfalas en la Akvo-arion?"

"Mi estas stulta," respondis s-ro Li Mo. "Kaj vere ne rimarkis tion."

Avo Izolita transprenis lian fluton kaj provis ekblovon. S-ro Li Mo havis alian fluton. Li viŝpurigis ĝin kaj transdoni al la avo. Rigardante al la fluto, Avo Izolita diris al li: "Tio estas sentaŭga, nur ilo por komencantoj."

Prenante la alian fluton, Avo Izolita diris kun averto: "Ludante ĝis la enkonduka parto de movimento *Rompo*, tio ĉi certe rompiĝos. Ĉu vi ne bedaŭros?"

"Mi ne kuraĝas." respondis s-ro Li Mo.

Avo Izolita do ekblovis. La fluta sono flugis ĝis nuboj. Ĉiuj kunsidantoj sentis miron kaj timon.

S-ro Li Mo humile kaj honteme kuraĝis fari nenian moveton.

Ludante ĝis la 13-a alineo, Avo Izolita montris al s-ro Li Mo la eraron. Kun respekto kaj admiro, s-ro Li Mo preskaŭ surgenuiĝis. Kaj, ludante ĝis la enkonduka parto de ĉapitro *Rompo*, la fluto ekrompiĝis, tiel ke li ne povis ludi ĝis la fino.

S-ro Li Mo refoje riverencis. Ankaŭ ĉiuj ĉeestantoj imponiĝis, kaj disiĝis.

La sekvantan matenon, s-ro Li Mo kaj la gastoj kune vizitis al Avo Izolita. Venante al la hejmo de la avo, ili vidis nur vakantan kabanon, sed malaperis Avo Izolita. Konantoj en Shaoxing serĉis lin, sed neniu sciis kien la avo foriris.



Elĉiniegis **Guozhu** (Ĉinio)

## Fratoj Grimm



*aŭtoroj, Fratoj Grimm*

### Tri serpentfolioj

Estis iam malriĉa viro, kiu ne povis nutri plu sian ununuran filon. Jen diris la filo: „Kara patro, vi vivas tiel mizere, mi estas ŝarĝo por vi, prefere mi foriros kaj provos perlabori mian ĉiutagan panon.“

Jen la patro lin benis kaj tre malĝoje adiaŭis lin. Je tiu tempo la reĝo de potenca regno troviĝis en milito.

La junulo lasis dungu sin en ties servo kaj kunmarŝis en la militon. Kaj kiam ili atingis la malamikojn, okazis batalo, estis granda danĝero kaj bluaj kugloj pluvis kvazaŭ tiel, ke liaj kamaradoj je ĉiuj flankoj falis teren. Kaj kiam ankaŭ la komandanto postrestis, la ceteraj volis fuĝi. Sed la junulo elpaŝis, kuraĝigis ilin vokante: „Pro ni nia patrolando ne pereu!“

Jen la aliaj sekvis lin, ili atakis kaj venkis la malamikojn. La reĝo, kiam li aŭdis, ke li dankas la venkon nur al li, faris lin pli altranga ol ĉiun alian, donis al li grandajn trezorojn kaj faris el li la plej altrangan en sia regno sub si.

La reĝo havis filinon, kiu estis tre bela, sed ankaŭ tre stranga. Ŝi ĵuris al si, ke ŝi ne akceptos kiel mastron kaj edzon iun, kiu ne promesos al ŝi, ke tiukaze, kiam ŝi mortos antaŭ li, li lasos entombigi sin vivanta kun ŝi.

„Se li amas min elkore“, ŝi diris, „kial la vivo tiukaze ankoraŭ utilos al li?“ Siaflanke ŝi volis fari la saman, se li mortus unue, ŝi grimpus al li en la tombon. Tiu stranga ĵuro ĝis tiam fortimigis ĉiun edziĝemulon, sed la junulo estis kortuŝita de ŝia beleco tiel, ke li estis tute neatentema, sed petis la patron pri la geedziĝo kun ŝi.

„Ĉu vi scias ankaŭ“, diris la reĝo, „kion vi devos promesi?“

„Mi devos iri kun ŝi en la tombon“, li respondis, „se mi transvivos ŝin, sed mia amo estas tiel granda, ke mi ne atentus la danĝeron.“


La reĝo konsentis la geedziĝon, kaj la nupto estis pompe festata.

Poste ili kune vivis dum certa tempo feliĉe kaj kun plezuro. Sed tiam okazis, ke la juna reĝidino fariĝis grave malsana, kaj neniu kuracisto povis helpi ŝin. Kaj kiam ŝi kuŝis tie morta, memoris la juna reĝo, kion li devis promesi, kaj tial li horore

ektimis devi kuŝigi sin vivanta en la tombon, sed ne estis elirvojo, ĉar la reĝo ordonis al la gardistoj gardi ĉiujn pordegojn, kaj ne eblis fuĝi de la sorto. Kiam alvenis la tago, kiam oni entombigos la kadavron en la reĝa kela volbaĵo, oni kondukis lin kun ŝi tien malsupren kaj riglis la pordon kaj fermŝlosis ĝin.

Apud la ĉerko staris tablo, sur ĝi troviĝis kvar kandeloj, kvar panoj kaj kvar boteloj da vino. Tuj, kiam tiu provizaĵo estos foruzita, li devos morti. Jen li sidis plena de doloro kaj malĝojo, li manĝis ĉiutage nur peceton de la pano, trinkis nur gluton de vino, kaj tamen li sentis, kiel la morto proksimiĝas pli kaj pli. Kiam li fikse rigardis, li vidis, kiel rampis el angulo serpento, kiu proksimiĝis al la kadavro. Kaj ĉar li pensis, ke ĝi intencas prironĝi ĝin, li eltiris sian glavon kaj diris: „Tiom da tempo, kiom mi ankoraŭ vivos, vi ne tuŝos ĝin.“ Kaj li dishakis ĝin en tri pecojn. Post certa tempo alrampis dua serpento el la angulo, sed kiam ĝi vidis, ke la alia estis dispecetigita kaj morta, ĝi rampis malantaŭen, sed baldaŭ ĝi revenis kun tri verdaj folioj en la buŝo. Poste ĝi prenis la tri pecojn de la serpento, kunmetis ilin tiel, kiel ili kutime kunas, kaj metis sur ĉiun vundon iun el la tri folioj. Kaj baldaŭ la disigitaj partoj rekuniĝis, la serpento ekmoviĝis kaj fariĝis vivanta, kaj ambaŭ serpentoj rapide foriĝis. La folioj restis kuŝantaj sur la planko. Kaj la malfeliĉulo, kiu ĉion tion vidis, ekhavis la ideon, ke la mirinda forto de la folioj, kiuj vivigis la serpenton, eble ankaŭ povus helpi al homo. Li do levis la foliojn kaj metis unu folion sur la buŝon de la morta edzino, kaj la du aliajn sur ŝiajn okulojn. Kaj apenaŭ tio okazis, ekmoviĝis en ŝiaj vejnoj la sango, grimpis en ŝian palan vizaĝon kaj ruĝiĝis ĝin. Ŝi ekspiris, malfermis la okulojn kaj diris: „Aĥ, Dio, kie mi estas?“

„Vi estas ĉe mi, kara edzino“, li respondis, kaj li rakontis al ŝi, kiel ĉio okazis kaj kiel li revivigis ŝin. Poste li donis al ŝi iom de la vino kaj pano, kaj kiam ŝi denove fortiĝis, ŝi leviĝis kaj ili iris al la pordo kaj frapis kaj kriis tiel laŭte, ke la gardistoj aŭdis kaj raportis tion al la reĝo. La reĝo iris mem malsupren kaj malfermis la pordon, jen li trovis ambaŭ freŝaj kaj sanaj kaj ĝojis kun ili, ke do la tuta mizero estas finita. La tri serpentajn foliojn la juna reĝo kunprenis, donis ilin al servisto kaj diris: „Konservu ilin zorgeme kaj portu ilin je ĉiu tempo ĉe vi, oni ne scias, en kiu mizero ili ankoraŭ povus helpi.“



Sed en la edzino, kiam ŝi vekigi denove, okazis ŝanĝiĝo: estis kvazaŭ ĉiu amo pri la edzo estis fuĝinta el ŝia koro. Kiam li volis veturi post kelke da tempo al sia maljuna patro trans maron, kaj ili grimpis sur ŝipon, ŝi forgesis la grandan amon kaj fidelecon, kiun li pruvis al ŝi, kaj per kiu li savis ŝin el la morto, kaj ŝi ekhavis malican emon al la ŝipisto. Kaj kiam la juna reĝo iam kuŝis kaj dormis, ŝi alvokis la ŝipiston, kaptis la dormanton je la kapo, kaj la ŝipisto devis preni lin

ĉe la piedoj, kaj tiel ili ĵetis lin en la maron. Kiam la hontiga fiago estis okazinta, ŝi diris al li: „Nun ni reveturu hejmen kaj diru, ke li mortis dum la veturo. Ĉe la patro mi ja tiel gloros kaj laŭdos vin, ke li edzigos vin al mi kaj faros vin heredonto de sia krono.“

Sed la fidela servisto, kiu observis ĉion tion, senrimarkite deigis boaton de la granda, sidigis sin en ĝin, sekvis sian mastron kaj lasis forveturi la perfidulojn. Li elfiŝis la mortigiton kaj helpe de la tri serpentofolioj, kiujn li portis ĉe si, kaj kiujn li metis sur la okulojn kaj la buŝon de la droninto, li bonŝance revivigis lin.

Ili remis per ĉiuj siaj fortoj tage kaj nokte, kaj ilia boateto kvazaŭ flugis tiel rapide antaŭen, ke ili revenis pli frue ol la ŝipo al la maljuna reĝo. Li miris, kiam li vidis reveni ilin solaj, kaj li demandis, kio okazis al ili. Kiam li aŭdis, kiel malica lia filino agis, li diris: „Mi ne povas imagi, ke ŝi agis tiel malbone, sed la vero baldaŭ montriĝos.“

Li ordonis, ke ambaŭ iru en sekretan ĉambron kaj kaŝu sin kontraŭ ĉiu ajn. Baldaŭ poste alveturis la granda ŝipo kaj la sendia ino aperis antaŭ sia patro kun malĝoja mieno.

Li demandis: „Kial vi revenas sola? Kie estas via edzo?“

„Aĥ, kara patro“, ŝi respondis, „mi revenas kun granda malĝojo, mia edzo en la veturo subite malsaniĝis kaj mortis, kaj se la bona ŝipisto ne estus subteninta min, estus okazinta io terura al mi. Li ĉeestis dum ties morto kaj povas rakonti ĉion al vi.“

La reĝo diris: „Mi revivigos la mortinton“, kaj li malfermis la ĉambron kaj ordonis, ke ambaŭ eliru. La edzino, kiam ŝi ekvidis sian edzon, estis kvazaŭ trafita de tondro, ŝi sinkis sur la genuojn kaj petis pri pardono.

La reĝo respondis: „Neniu pardono eblas, li estis preta morti kun vi, kaj donis la vivon al vi, sed vi mortigis lin dum la dormo, kaj tial vi ricevos la merititan pagon.“

Tial oni metis ŝin kaj ŝian helpinton en truigitan ŝipon kaj pelis ilin eksteren en la maron, kie ili baldaŭ dronis en la ondoj.

## Blanka serpento

Jam antaŭ tre longa tempo vivis reĝo, kies saĝo estis konata en la tuta lando. Nenio restis nekonata al li, kaj oni havis la impreson, ke li, kvazaŭ el la aero, ricevis mesaĝojn pri la plej kaŝitaj aferoj. Sed li havis strangan kutimon. Ĉiun tagmezon, kiam estis ĉio forportita de la tablo kaj neniu plu ĉeestis, intima servisto devis porti plian pelvon al li. Sed ĝi surhavis kovrilon kaj la servisto mem ne sciis, kio kuŝas en ĝi. Neniu homo sciis tion, ĉar la reĝo ne malkovris ĝin kaj ne manĝis el ĝi antaŭ ol li estis tute sola. Tio jam delonge ripetigis tiel. Tiam iutage la servisto, kiu forportadis

la pelvon, ekscivolis tiel, ke li ne povis rezisti plu kaj portis la pelvon en sian ĉambron. Kiam li zorgeme ferme riglis la pordon, li levis la kovrilon kaj vidis, ke troviĝas blanka serpento en ĝi. Ĝin gardante, li ne povis reteni sin gustumi de ĝi. Li detranĉis pecon de la serpento kaj enbuŝigis ĝin. Sed apenaŭ lia lango tuŝis ĝin, li aŭdis ĉe sia fenestro strangan flustradon kaj delikatajn voĉojn. Li iris al la fenestro kaj ekaŭskultis ilin; jen li rimarkis, ke estas paseroj, kiuj interparoladas kaj rakontas reciproke, kion ili vidis en la kampoj kaj en la arbaro. La gustumado de la serpento havigis al li la kapablon kompreni la lingvon de la bestoj.



Okazis, ke ĝuste en tiu tago la plej bela ringo de la reĝidino perdiĝis, kaj oni suspektis, ke la intima servisto, kiu havis ĉie aliron, esti la ŝtelisto. La reĝo ordonis, ke li venu al li kaj minacis lin kun fortaj insultvortoj, ke tiukaze, se li ne scios nomi la ŝteliston ĝis morgaŭ, li mem kvazaŭ estos rigardata kiel la ŝtelisto kaj oni ekzekutos lin. Ne helpis, ke li ĵuris sian senkulpecon. Li tamen ne ricevis pli bonan informon antaŭ la retiriĝo. Plena de maltrankvilo kaj timo li iris malsupren en la

korton kaj cerbumis, kiel li povus savi sin el la mizero. Tie sidis pace anasoj ĉe fluanta akvo, unu apud la alia, kaj ripozis. Ili purigis sin glatige per siaj bekoj kaj intime interparoladis. La servisto haltis kaj aŭskultadis ilin. Ili rakontis reciproke, kien ili ĉiuj ŝanceliĝe trotadis tiumatene, kaj kian bonan manĝon ili trovis.

Jen iu el ili diris grumble: „En mia stomako premas min io peza, mi glutis haste ringon, kiu kuŝis sub la fenestro de la reĝidino.“

La servisto tuj kaptis la anason ĉe la kolo, portis ĝin en la kuirejon kaj diris al la kuiristo: „Buĉu tiun ĉi, ĝi estas sufiĉe grasa.“

„Jes“, diris la kuiristo kaj pesis ĝin surmane, „ĝi ne evitis penojn sin grasigi kaj jam delonge atendas, ke oni rostu ĝin.“

Li detranĉis ĝian kolon, kaj kiam ĝiaj intestoj estis elprenitaj, troviĝis la ringo de la reĝidino en la stomako. La servisto tial facile povis prui sian senkulpecon antaŭ la reĝo, kaj ĉar tiu volis reglatigi sian maljustecon, li permesis al li peti pri favoro. Poste li promesis al li la plej altrangan honoran oficon, kiu dezireblas kiel kortegano.

La servisto rifuzis ĉion kaj petis nur pri ĉevalo kaj vojaĝmono, ĉar li scivolis rigardi la mondon kaj vagadi certan tempon en ĝi. Kiam oni plenumis lian deziron, li survojiĝis kaj iutage preteriris lagon, kie li rimarkis tri fiŝojn, kiuj kaptiĝis en fragmito kaj provis trinki akvon. Kvankam oni diras, ke la fiŝoj silentas, li tamen aŭdis ilian lamentadon, ke ili devos morti tiel mizere. Ĉar li havis kompateman koron,



li deĉevaliĝis kaj metis la kaptitojn denove en la akvon. Ili baraktiĝis pro ĝojo, etendis la kapojn eksteren kaj vokis al li: „Ni ne forgesos tion, kaj iam ni rekompencos ĝin, ĉar vi nin savis.“

Li rajdis plu kaj post certa tempo ŝajnis al li, kvazaŭ li aŭdus en la sablo antaŭ siaj piedoj voĉon. Li ekaŭskultis kaj eksciis, kiel formika reĝo plendas: „Se nur la homoj kun siaj nelertaj bestoj restus for de niaj korpoj! Tiu stulta ĉevalo tretadas per siaj pezaj hufoj mian popolon sen kompato!“

Li kondukis la ĉevalon al flankvojo kaj la formika reĝo vokis al li: „Ni ne forgesos tion kaj iam ni rekompencos ĝin.“

La vojo kondukis lin al arbaro, kaj tie li vidis du korvojn, kiuj staris sur sia nesto kaj ĵetis siajn idojn eksteren.

„Foriĝu, fia manĝavida idaro“, ili vokis, „ni ne plu povos satigi vin, vi estas sufiĉe grandaj, zorgu mem pri vi. La kompatindaj idoj kuŝis surtere, nelerte flirtetis, provis ekflugi kaj kriis: „Ni, la senhelpemaj idoj, nutru nin mem kaj eĉ ne kapablas flugi ankoraŭ! Kio restos al ni krom malsatmorti ĉi tie!“

Tial la bonkora junulo deĉevaliĝis, mortigis la ĉevalon per sia spado kaj translasis ĝin al la junaj korvoj kiel manĝon. Ili alsaltetis, satigis sin kaj vokis: „Ni ne forgesos tion kaj iam ni rekompencos ĝin.“

Li devis uzi nun siajn proprajn gambojn, kaj kiam li jam iris longan tempon sur vojoj, li atingis grandan urbon. Tie estis bruego kaj interpuŝado en la stratoj, subite alrajdis heroldo sur ĉevalo kaj konigis: „La reĝa filino serĉas edzon, sed tiu, kiu volas proponi sin svatiganto, devos plenumi malfacilan taskon, kaj se li ne estos bonŝanca, li devos morti.“

Multaj junuloj jam provis, sed ili vane riskis sian vivon. Kiam la junulo vidis la reĝidinon, li estis tiom blindigita de ŝia granda beleco, ke li tute forgesis la danĝeron kaj paŝis antaŭ la reĝon kaj anonciĝis kiel svatiganto.

Baldaŭ oni kondukis lin al la maro kaj ĵetis antaŭ liaj okuloj oran ringon en la akvon. Poste la reĝo ordonis, ke li reportu tiun ringon el la mara fundo, kaj li aldonis: „Se vi revenos sen ĝi supren, oni ĵetos vin ĉiam denove maren, ĝis vi dronos en la ondoj.“

Ĉiuj bedaŭris la belan junulon kaj lasis lin poste sola ĉe la maro. Li staris ĉe la bordo kaj pripensis kion fari. Jen li vidis subite alnaĝi tri fiŝojn, kaj ne estis aliaj krom tiuj, kies vivon li savis. La meza fiŝo inter ili tenis en la buŝo konkon, kiun ĝi metis sur la strando antaŭ la piedojn de la junulo. Kiam tiu levis kaj malfermis ĝin, kuŝis la ora ringo en ĝi. Plena de ĝojo li portis ĝin al la reĝo kaj atendis, ke tiu cedos la promesitan rekompencon al li. Sed la fiera reĝa filino ne volis havi lin, kiam ŝi eksciis, ke li ne estas princo, ŝi rifuzis lin kaj postulis, ke li antaŭe plenumu duan taskon. Ŝi iris malsupren en la ĝardenon kaj mem disŝutis dek sakojn da miliaj grajnetoj sur herbejon.

„Ĝis morgaŭ matene, kiam leviĝos la suno, li kunkolektu ilin. Kaj ne manku eĉ

unu grajneto“, ŝi diris.

La junulo sidiĝis en la ĝardenon kaj pripensis, kiel plenumi la taskon, sed li ne povis trovi ion. Tial li fariĝis tute malĝoja kaj atendis la mateniĝon, kiam oni kondukos lin al la ekzekutejo. Sed kiam la unuaj sunradioj trafis la ĝardenon, li vidis la dek sakojn, ĉiuj estis bone plenigitaj, kaj ĉiuj staris kune. Eĉ ne grajneto mankis en ili. La formika reĝo kun kelkaj miloj da formikoj alvenis tien en la nokto kaj la dankemaj bestoj kunkolektis la miliajn grajnetojn kun granda fervoro kaj metis ilin en la sakojn.

La reĝa filino iris mem en la ĝardenon kaj vidis mirigite, ke la junulo plenumis tion, kion li devis fari. Sed ŝi ankoraŭ ne povis venki sian fieran koron kaj diris: „Kvankam li plenumis ambaŭ taskojn, li tamen ne fariĝu pli frue mia edzo ol tiam, kiam li estos portinta al mi pomon de la arbo de l' vivo.“

La junulo ne sciis, kie troviĝas la arbo de l' vivo, li survojiĝis, kaj seninterrompe volis daŭrigi la iradon tiom longe, kiom liaj piedoj portos lin, sed li ne havis la esperon trovi ĝin. Kiam li jam migris tra tri reĝaj regnoj, kaj vespere atingis arbaron, li sidiĝis sub arbon kaj volis dormi; tiumomente li aŭdis ĉe la branĉoj brueton kaj ora pomo falis en manon de li. Samtempe tri korvoj flugis malsupren al li, sidiĝis sur liajn genuojn kaj diris: „Ni estas la tri junaj korvoj, kiujn vi liberigis de la malsatmorto. Kiam ni plenkreskiĝis kaj aŭdis, ke vi serĉas la oran pomon, ni flugis trans la maron ĝis la fino de l' mondo, kie staras la arbo de l' vivo kaj portis la pomon al vi.

Plena de ĝojo la junulo survojiĝis hejmen kaj portis la oran pomon al la bela reĝidino, kiu ne povis elturni sin plu. Ili dividis la pomon de l' vivo kaj manĝis ĝin kune. Jen ŝia koro plenigis sin per amo al li, kaj ili atingis senĝenate dum feliĉa vivo grandan aĝon.

*Originalo: Die weiße Schlange*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*



*tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)*

*lingve kontrolis Vladimir Türk*

## Su Shi (1037—1101)



### Odo al la Ruĝa Klifo\*

#### Unua vizito al la Ruĝa Klifo

En la aŭtuno de la jaro renxu (jenŝju) (1082), je la deksesa de la sepa monato, mi plezurecele veturis per boato kun kelkaj amikoj al la Ruĝa Klifo. Blovis frida zefiro, kvieta estis la akvo. Mi levis pokalon kaj tostis al miaj amikoj, kaj ni skandas la odon pri la plenluno kaj kantis la versaĵon pri belulino. Post iom da tempo la luno leviĝis super la orientan monton kaj kvazaŭ vagis inter Ĉerpilo kaj Bovpaŝtisto\*\*. La rivero vaste etendiĝis, kovrite de blanka vapornebulo, kaj la lumo sur la akvo kunfandiĝis kun la ĉielo. Ni lasis nian boaton flosi, kien ĝi volis, kiel fragmita folio sur la senlima akvomaso, kaj ni sentis nin tiel liberaj, kvazaŭ ni rajdus sur facila vento, nin portanta al iu nekonata loko, kaj tiel malpezaj, kvazaŭ ni forlasus ĉi homan mondon kaj fariĝus flugpovaj senmortuloj.

*Frapu la lunon rebrilantan en la akvo, kontraŭ lum' fluinta;*

*Ĉar senlima, forta sopiro min tiras foren.*

*Foren al mia kara, kiu estas tie en la alia fino de ĉielo.*

La vino gajigis nin, kaj ni ekkantis, batante la takton sur la boatrandoj. Jen la kanto: Iu el la amikoj, kiu estis bona flutisto, ludis akompanion al nia kanto. La tonoj ĝemis kaj singultis, kvazaŭ li estus plendanta, sopiranta, ion rakontanta. La ŝvebanta postsono tiriĝis kiel silka fadeno, kiu ne rompiĝis, ĝis ĝi vekis al dancado la drakojn, sin kaŝantaj en mallumaj kavernoj, kaj elvokis larmojn elvidvino, forlasita en sia soleca boato.

Malĝoja en la koro, mi rektigis min sidante kaj demandis gravmiene mian amikon, kial lia muziko estas tiel trista. Li respondis:

*“La luno estas bela, la steloj estas disaj,  
la korvoj kaj la pigoj flugas suden...”*

Ĉu tiuj ĉi versoj ne estas de Cao Cao (caŭcaŭ)\*\*\*\*? Rigardu okcidenten al Xiakou (ŝjakoŭ) kaj orienten al Wuchang (vuĉang). Jen, kiel interplektiĝas la montoj kaj riveroj, kaj kiel imponaj ili sin prezentas en sia malhela verdo. Ĉu ĉi tie ne estas la loko, kie Cao Cao siatempe estis venkita de juna Zhou Yu (ĝoŭju)\*\*\*\*? Kiam li venkopreninte Jinzhou (ĝinĝoŭ) kaj konkerinte Jiangling (ĝjanglin), venis orienten laŭ la fluo de la rivero, liaj batalŝipoj esprimas miajn sentojn, al la vento trista.” intersekvis en vico mil liojn longa, kaj liaj flagoj kaj standardoj vualis la ĉielon. Kiam li enverŝis al si vinon vizaĝe al la rivero kaj skandis sian poemon kun lanco en la mano transverse, li estis la heroo en sia tempo. Sed kie do li estas nun? Kompare kun li, ni estas nur fiŝkaptistoj kaj arbohakistoj sur la riveraj insuloj, kun fiŝoj kaj salikokoj kaj cervoj kile kunuloj; ni veturigas nian boaton, tiel etan kiel folio, kaj tostas unu al alia trinkante vinon el botelkukurbaj ĉerpiloj. Ni estas nenio alia ol efemeroj, kiuj ĉi mondon vizitas tre mallongajn horojn, kaj ni estas tial malgrandaj, kiel greneroj en la vasta maro. Mi malĝojis, ke nia vivo estas pasema, kaj envias al ĉi potenca rivero, kiu fluas senfine. Mi dezirus kroĉiĝi al flugpova senmortulo kaj migri en la senlima spaco, aŭ brakumi la belan lunon por vivi kun ĝi eterne. Sed ve! Sciante, ke tio ne estas facile atingebla, mi konfidas ĉi tonojn, kiuj esprimas miajn sentojn, al la vento trista.”

“Ĉu ankaŭ vi iam pripensis la akvon kaj la lunon?” mi diris. “Akvo ĉiam fluas, sed neniam foriĝas; la luno ĉiam kreskas kaj malkreskas, sed nek pligrandiĝas nek malgrandiĝas. Se vi rigardas la ŝanĝiĝeman aspekton, la universo pasas en palpebruma daŭro; sed se vi rigardas la senŝanĝan aspekton, ĉiuj estaĵoj inkluzive de ni mem estas nepereeman. Nu, kial do via envio? Cetere, ĉiu estaĵo en ĉi mondo havas sian posedanton, kaj eĉ unu hareton, kiu ne estas mia, mi neniel povas preni al mi. La solaj esceptoj estas la frida zefiro sur la rivero kaj la hela luno inter montoj. La antaŭa, kaptite de niaj oreloj, fariĝas muziko, kaj la dua, renkontite de niaj okuloj, ŝanĝiĝas al koloro. Ĉi tiujn du ni povas libere servigi al ni kaj ĝui por ĉiam. Ili estas neelĉerpeblaj trezoroj, liveritaj al ni de la Kreinto, kaj ni ĉiuj povas partopreni en ilia ĝuado.”

Mia amiko ĝojiĝis kaj ekridis. Ni lavis la pokalojn kaj ree enverŝis al ni vinon. Post kiam ni finis la pladojn kaj fruktojn. La pokaloj kaj teleroj estis lasitaj en malordo. Kaj ni ĉiuj kuŝiĝis dormi en la boato, apogante la kapon unu sur alia, kaj ne rimarkis la lumiĝon jam ĉe la orienta horizonto.

Notoj:

\**La Ruĝa Klifo*— konata kiel loko, kie estis batalkampo en la epoko de Tri Regnoj (220—280), situas en la nuna gubernio Jiayu, prov. Hubei.

\*\**la Ĉerpilo kaj Bovpaŝtisto*— nomoj de du konstelacioj.

\*\*\*Cao Cao (155—220)— fama generalo kaj ŝtatestro dum Tri Regno, kiu voliskonkeri Wu-regnon, sed estis venkita de Zhou Yu en 208 P.K.

\*\*\*\*Zhou Yu— generalo de Wu-regno dum Tri Regno, kiu venkis Cao Cao-n en la batalo ĉe la Ruĝa Klifo, tiam li nur estis 24-jara.


## Dua vizito al la Ruĝa Klifo

Je la dekkvina de la deka monato de la sama jaro, kiam la luno estis plena, mi piede ekiris de Neĝa Halo por reveni al Lingao (lingaŭ), akompanata de du amikoj. Nia vojo kondukis preter Flavkota Deklivo. Jam estis la sezono de prujno, la arboj perdis ĉiujn siajn foliojn. Niaj korpoj jetis ombrojn sur la teron, kaj levinte la okulojn, ni povis vidi la helan lunon. Admirante la ĉirkaŭan pejzaĝon, ni ĝoje kantis ĥoraĵojn dum la vojo.

Post iom da tempo mi suspiris kaj diris, “ĉi tie ni havas amikojn, sed ne vinon; kaj eĉ ni havas vinon, ni ne havas pladojn indajn je ĝi. La luno estas brila kaj la zefiro freŝa — kiel do ni pasigos tian belan vesperon?”

Iu el miaj amikoj respondis, “Ĝuste antaŭ la vesperiĝo hodiaŭ mi kaptis fiŝon per mia reto. Ĝi havas grandan buŝon kaj malgrandajn skvamojn kaj estas io simila al perko el Song-rivero. Sed de kie ni povas havigi al ni vinon?”

Kiam ni revenis hejmen, mi konsiliĝis kun mia edzino, kaj ŝi diris, “Mi konservas botelegon da vino dum longa tempo, kiu estas destinita por via uzo en okazo de subita bezono.” Do preninte kun ni la vinon kaj la fiŝon, ni ekiris fari ankoraŭfojan viziton al la Ruĝa Klifo.



La rivero brue fluis preter klifoj turantaj je mil futoj; la altaj montoj kontraste malgrandigis la lunon, kaj la malleviĝinta akvo malkovris rokojn. Kvankam pasis ne

longa tempo de post mia unua vizito, tamen la pejzaĝo jam ŝanĝiĝis ĝis nerekonebleco. Mi levis mian robon kaj faris grimpadon. Mi pasis sur akre angulajn rokojn, faris al mi vojon tra la dense kreskantaj sovaĝaj herboj kaj dornoj, kaŭriĝis sur ŝtonblokoj en fantaziaj formoj de tigro kaj leopardo, ascendis helpe de rampaj plantoj similaj al drakoj kaj serpentoj, ĝis mi atingis la altegan neston de akcipitro por rigardi malsupren al la kaŝita loĝejo de la dio de la akvo. Tamen miaj du amikoj ne povis min sekvi. Mi do komenci voki al ili per forta, tirata voĉo. La arboj kaj arbustoj ekstremis, la montoj kaj valoj eĉe resonis, vento leviĝis kaj ondoj ŝveliĝis. Kaptita de subita tristo kaj ektimo, mi ne kuraĝis plu resti tie. Mi ekiris returne kaj revenis al nia boato. Ni lasis nian boaton drivi, kien ĝi volis, en la mezo de la rivero. Jam estis preskaŭ noktomezo kaj ĉirkaŭe regis silento. Tiam unu soleca grupo, kiu estis transfluganta la riveron, venis de la oriento super nian boaton. Ĝi havis flugilojn similajn al ĉarradoj, estis vestita en blankaj kaj nigraj plumoj kun longa, akra krio ĝi preterflugis super nia boato okcidenten.

Post iom da tempo miaj amikoj foriris kaj mi kuŝiĝis dormi. Ensonĝo mi vidis, ke taoista pastro en ŝvebanta robo el plumoj preterpasas mian domon en Lingao. Li salutis min per kunmeto de la manoj kaj diris, “Ĉu vi ĝuis vian viziton al la Ruĝa Klifo?” Kiam mi demandis pri lia nomo, li klinis la kapon kaj donis nenian respondon. “Ha, mi scias!” mi ekkriis, “ĉu vi ne estas tiu, kiu preterflugis super mi lastnokte?” La pastro ĵetis rerigardon al mi kun rideto. Mi vekigis de surprizo. Sed kiam mi malfermis la pordon por rigardi, mi povis trovi nenian postsignon de li.



elĉinigis *Wang Chongfang* (Ĉinio)

## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



poeto, Mikaelo Bronŝtejn

### Al la nepino

En mia nuna morna kaj malhela  
sentaga nokto  
ĉeestas unu radieto stela,  
sed ŝia voko,  
aŭ mokrideto, ofendiĝ' infana,  
brakumo dolĉa  
la mondon faras brila, diafana,  
la viv-pendol' - ĉu

pro l'ekscitiĝo aŭ pro la ekĝojo  
ĝis kora tremo –  
balance iras laŭ feliĉa vojo,  
kaj mia memo  
konjektas lumon de la am' sincera,  
kiun scipovas  
infana kor', de ajna pek' libera.  
Do mi retrovas  
en mia nuna morna kaj malhela,  
noktaĉo mava,  
ke l' radieto estas plej fidela  
apogo sava.

\*\*\*

La kanta konstipo obsedis min frue.  
La kanta konstipo obsedis min vane.  
En mia animo ĉeestas nun tru' de  
la pafo farita de mi propramane

ne el la kruela paftubo fusila,  
ne el la kanajla insido pistola,  
sed pere de bruske veninta al mi la  
maljusto embuska, vundanta pli ol la

eksplodo obusa aŭ bato ponarda  
ekstreme dolora, sed tamen honesta...  
Min nun en la sonĝoj turmentas la ar' da  
fantomoj, kaj l' esto ne plu estas festa.

Indulgu, amikoj, de mi atendantaj  
sinceran rimplekton en la melodioj.  
Ne kulpas mi ke ne plu venas la kantoj  
eksteren al mia publiko hodiaŭ.

Kortuŝa espero min tute ne lasas,  
ke iam ekfluos kantarolavange,  
ja mornaj mensogoj entempe forpasas,  
sed kantoj fascinaj cirkulas ensange.

\*\*\*

Senkompataj raketoj  
flugas en fum-nebulo.  
Mi malamas la bildon,  
maltrankvilas mi pri vi,  
kiuj kuras en kelojn,  
kiuj serĉas la ŝildon  
kun petego-postulo:  
- Ne malhelpu nin vivi!

Jes, prezentas suferon  
la vivig' de l' dezerto?  
Por beligi la teron  
endas ŝvite aktivi.  
La popol' laborema  
nun aklamas kun certo,  
kun aspiro al paco:  
- Ne malhelpu nin vivi!

Emas uloj sen honto  
homamasojn direkti  
al kruelo milita,  
sangavide lascivi.



Ĉu ne povus la mondo  
sin fidinde protekti  
kontraŭ tiuj per krio:  
- Ne malhelpu nin vivi!

Ŝatus ĉiuj popoloj  
en la pac' kaj konsento  
al disfloro de l' Tero  
kunlabore ekdrivi...  
La kvar vortojn plorĝemajn  
monden portas la vento:  
- Ne malhelpu nin vivi!  
- NE MALHELPU NIN VIVI!

\*\*\*

Vastiĝas la nokt' sen kompato  
en la mezoktobra etero.  
Aŭtuno. Pli feblas korbato  
kaj ŝultroj kliniĝas al tero.

Aŭtuno. Gutetoj – la lensoj  
sur oro folia trembrilas,  
ekglimas enkape mil pensoj,  
la mens' kaj anim' maltrankvilas.

Aŭtuno. Ventego ekleka  
protektion ombrelan detruas,  
kaj ĉio humida, malseka  
aŭguras, ke, ŝajne, malfruas

akceloj, aspiroj, elanoj,  
eĉ revoj pri onta bonŝanco,  
ke ne realiĝos la planoj...  
Sed kreskas en kor' disonanco

de l'vent' kaj de l' floroj humilaj,  
do jam malpli gravas pensem' ol  
senkulpa flavet' kamomila,  
kaj bluo de lastaj penseoj.

\*\*\*

*En 2016 dum Arkones mi prezentis mian recitalon "Pekaj kantoj" en vica Arkones, en Poznano. En 2017, denove veninte Pollandon mi kun miro kaj plezuro eksciis ke unu kanton de la recitalo tradukis (brile tradukis!) en la polan Georgo Handzlik. Kun sincera danko al mia bona amiko mi prezentas al miaj geamikoj la tekstojn - rusan kaj polan.*

## Meditado

Naiva mensoget'  
en la oreloj falas.  
Pri kio ĝi signalas,  
mi ne scivolos, sed  
de lundo ĝis merkred'  
mi pensas nur pri tio.  
Fortiĝas opinio,  
ke devus mi kun kred',  
se venis tiu pled'  
pristudi, – eĉ se klaĉon, –  
sed plaĉon, kaj malplaĉon  
forŝovi al bufed'.  
Deksepa cigared'  
jam estas forfumita...  
Mi estas informita,  
do ne plu decas ced'.  
Sufiĉas pensokned'!  
Mi devas jam reagi,  
al ofendintoj pagi  
per sama agrimed',  
ĉar ajna miskonced'  
min povus kompromiti.  
Ja eblas nur imiti,  
ke ekis la proced',  
sed poste, dum banked'  
paciĝi, eble, toste,  
manpremi – iom poste...  
Aŭ ne?! Ja la obsed'  
min daŭre perskutos,

se la ofendon glutos  
mi sen rebati... sed,  
pensante ĝis vendred',  
mi jam ne plu memoras,  
pro kiu blag' fervoras  
mi dum semajno! Ted'  
alvenas kun nekred',  
forfluas fiaj sentoj...  
Naiva mensoget' –  
sed kiom da turmentoj!

## Finna aŭtuno

Ŝtonoj kadukas en tempofluo,  
regas trankvil' inter bluo kaj bluo.  
Kredas apenaŭ varmo granita  
famon pri la somero finita.

Ruĝo, skarlato, punco, purpuro  
pompe plektiĝis en verda veluro.  
Kupro kaj oro, bronzo, latuno –  
jen la vesto de finna aŭtuno.

Lago lascivas ekster labor', do,  
brunajn boatojn brakumas ĉe bordo,  
kaj el la fundo, el akvosino  
supren iras la sun'-karmezino.

Kaj la perukon el okro kun rusto  
prove surmetis ĉiu arbusto.  
Zorgas trankvile morti en festo  
de l' naturo kvieta majesto.

Nur disonance en movimento  
sonas sopira kordo de l' vento,  
svinge spiretas lace petola...  
Ĉu ne tro da kviet' por mi sola?

## Jorge Camacho (Hispanio)



*poeto, Jorge Camacho*

*(La poeto mem respondecas pri la vidpunkto kaj ideo en la poemo.)*

### **Senrajte!**

Mi ne scias kial mi verkis kaj prezentas  
ĉi tiun poemlibron.  
En Palestin' mi ne naskiĝis, palestinano mi ne estas  
nek devis travivi tiun militon.  
Kial verkas kaj deklamas versojn mi  
– dum proprajn poetojn havas Palestino?  
Mi pensas pri Darŭiŝ kaj Refaat Alareer  
kies voĉo ĉi tie sonas kun dampiĝo,  
kaj ke eble ne estas tro absurde  
paroli anstataŭ ili al mialingva publiko.  
Kiam Picasso pentris sur vasta tolo la hororon  
de la matematika bombado de Gerniko  
li ne estis eŭsko nek loĝis tiuurbe.  
Same eksterlanda estis la akra vido  
de Costa-Gavras en *Hanna K.*,  
kuraĝa kaj pridemanda filmo.  
Aŭ la trista kanto *Telk kadeja*,  
kun versoj de Mostafa Ibrahim el Kairo.  
Aliflanke, palestinanojn mem

– kiu atentas, aprezas, traktas kun distingo?  
Do mi kontribuas laŭ miaj ebloj  
por ke forgeso ne venku, por ĉies scio.  
Kaj, jes, se mi retrorigardas  
al ĉio kion mi verkis kaj kio ricevis publikigon,  
mi ekdubas ĉu mi denunciis sufiĉe,  
sed fine mi atingas la konvinkon  
ke mi ne povas strebi ĉiufronte,  
ke mi prefere lasu nuran memorsignon  
kvankam mankas pasemaj detaloj kaj nuancoj,  
aspektoj kaj informoj, statistikoj.  
Restu, do, Ruzan' an-Najar',  
la juna flegistino,  
kiel sola viktin' kies nomon mi mencias  
anstataŭ neuzeble vasta listo  
kun dekmiloj da individu- kaj famili-nomoj  
murditaj, horor-enciklopedio.  
Mi ankaŭ ne enlistigu pli da  
ekzekutistoj, punistoj kaj komplicoj  
en ĉi milita kampanjo tiel kovarda  
kaj malhumana. En ĵurnal-arĥivoj  
vi trovos ties nomojn kaj postenojn,  
ties silentojn, hontomankon, krimojn.  
Permesu ke mi aldonu, fine,  
paron da novaj konsiderindoj.  
Kiel jam skribis en ĵurnal-artikolo  
pri mia verko la antaŭparolinto,  
Israelo, kiel potenco okupacianta  
ne havas rajton je sindefendo sed devigon  
rilate al palestinanoj. Sen surprizo  
ni vidas ilin rezisti kontraŭ la kolonian jugon,  
malakcepti ĝin, ribeli per armiloj  
violente, blinde kaj kruele.  
Ni jam vidis tion  
kaj plu vidos la samon same ĉie,  
en ĉiuj rezistoj kaj insurekcioj.  
Aliflanke, kaj por fini,  
la kreo de Israelo, tiu aberacio

morala, tiu apartisma ĥimero,  
 estis ne malfarebla eraro, riparebla miso,  
 eksperimento kiu malsukcesis,  
 sed principo  
 denaske koruptita, abomeninda,  
 monstraĵo sen rajto je ekzisto.

## NOTOJ

[1] *Telk Qadeya* / تلك قضية (Jen unu afero) kantata de Cairokee.


[2] denunci: (en literaturo, en jena subsenco laŭ ReVo): sciigi la publikan opinion pri ies krimo aŭ kulpo: literaturo de socia denunco; denunca poezio.

AI-muzikigo de la poemo: <https://www.youtube.com/watch?v=70rJdpWCEEo>



esperantigita de *Alain Roze Courbou* (Francio)

## Tiberio Madonna (Italio)



*poeto, Tiberio Madonna*

### Taga sceno

Kaj la suno  
apostrofito de verdaj folioj,  
pendantaj  
de l' arb' ombranta

staranta  
aŭstera,  
pentras per heleco la tagon.  
La suno,  
ĉirkaŭita de malpezaj flokoj  
de vato  
disŝutitaj lontanen kaj proksimen  
en la vakuo lazura,  
ridante kun viva energio  
super la mondo  
ĝojege  
radias sian fajron  
citronflava,  
kiu pli malfrue  
iom pli sube  
fariĝos oranĝa  
kaj koloros per tia tinkturo  
la tutan ĉirkaŭaĵon.  
La kvivitalo de l' paseroj  
vestas per muziko  
la komponaĵoj de koloroj  
brilantaj  
kune ludantaj,  
kaj ornamas  
la pentraĵojn

per melodiaj fadenoj el oro.  
La floroj de l' herbejoj  
ankaŭ ili  
flavaj  
kaj oranĝaj  
kolorigis siajn petalojn  
imitante la sunon.  
Ĉiuj aferoj  
lumigitaj  
de l' ronda varma juvelo  
enamigis al ĝi ekstaziĝintaj,  
ĝin admirante  
en la ĉiel' de l' tago.

## Nokta sceno

La luno  
substremita de fadenforma nuboj  
heligas  
sian luman haloon  
kiu ĉirkaŭas kaj envias  
ĝin  
ĉirkaŭvolvite en la nokto.  
La luno  
akompanata de timidaj punktetoj  
el fajro  
disjetitaj ĉi kaj tie  
en la senfina vakuo  
ĵus leviĝinta  
de l' horizonto  
timeme  
montras sian vizaĝon  
ruĝiĝinta  
ĝis ĝi poste  
pli alta kaj sekura  
fariĝas pli kuraĝa  
elmontrante sentime  
arĝentan rideton.  
La silento



rakontas  
libron da emocioj  
da rememoroj  
por ke oni povu sin luli  
en ili  
kaj sugestas  
pensojn  
ŝtelitajn al la fantazio.  
La lampionoj  
ankaŭ ili  
enviantaj la lunon  
estingiĝas unuope  
en la strato endormiĝinta.  
Ĉiu afero  
senmova  
atendanta la morgaŭon  
lasas spacon al la spektaklo  
de lumoj  
en la ĉielo de la nokto.



*esperantigita de Alain Roze Courbou (Francio)*

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



*poetino, Rita Mkrtĉjan*

Ni estis tre proksime – en la reto,  
La konatulo, nomo, nur vizaĝ’,  
Pri amikec’ – propono, peto,  
Komentoj kurtaj kun humur’ kaj saĝ’.

Lakona parolad’, ne babilado,  
La vortoj – el profunda sin’,  
Honestaj, laŭdaj, dankemaj  
Pri kara al la koro poezi’.

Ĝis nun la vortoj sonas en oreloj,  
De nomo, de vizaĝo, siluet’,  
Nur kurtaj frazoj, varmaj kaj sinceraj  
Kaj en dezerto eĉ aperos la poet’.

\*\*\*

Somero "pakas la valizojn",  
Senforta varmo de aŭgusta suno,  
Somero estas nia "eta vivo",  
Sed mi atendas aŭtunon!

Ĉielo blua, ter’ floranta,  
La mar’ karesa, la ripoz’, sunbruno,

Feliĉaj kaj liberaj tagoj,  
Sed mi atendas aŭtunon!

Esperoj dum la tuta jaro,  
Someraj rondoj, dancoj kune,  
Pardonu min, somero gaja,  
Sed mi pli ŝatas aŭtunon!

La vento, tondro, uraganoj,  
Diluvo - kiel Dia puno,  
Sopiro, senreviĝo, larmoj,  
Sed mi tre ŝatas aŭtunon!

\*\*\*

Pri Vi la strofojn verkas la poetoj,  
Ho, kiel ĉarmas Via melodi',  
La pluvo pianludas, kantas vento,  
En valsos de folioj – la beleco kaj graci'.

Vi mem similas al poem' mirinda,  
Karesa lasta bril' de ruĝa suno,  
Kiel malfrua am', al ĉio blinda,  
De jar', de vivo, nia ora Aŭtuno!

Komprenas ĉiam Vi la vorton de la koro,  
Kiel savanta stel', Vi brilas en la nokt',  
Fortigas nin dum plag', en malfacila horo,  
Pli bela iĝas viv', eĉ malaperas mort'.

Vi estas blanka vel' en maro senespera,  
Kaj reviviĝas homo ofte dank' al Vi,  
Ne ĉiam indas ni al Vi, la POEZIO  
Vi estas nia rid', la ploro, flustro, kri'!

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



*poetino, Maria Nazaré Laroca*

### Estu lumo!

Heredantoj de l' Lumo,  
jen ni feliĉaj, tamen,  
dancantaj en la mallumo  
de nia malsaĝeco.

Ni avidas je l' ombro  
vanta de l' aplaŭdoj  
nutranta la famon,  
kiu nin trompas,  
kaj forpasas.

Lumiĝi bezonas  
la senmova animo,  
dum estas tempo:  
ĉar nur la lumo  
ne korupteblas!

### Vintro

La doloro frostigis  
mian septembron  
iam tiel rozkoloran...

Senkoloraj tagoj lamentas,  
kaj fluas tra l' fenestro,  
kiu min rigardi permesas  
la nun malproksiman placon,  
kiel nigra-blankan filmon.

Sed l' anĝelo de l' espero,

el la paĝoj de l' Evangelio,  
responde al larmoj kaj preĝoj,  
indulgema kantis al oreloj niaj:  
"Ĝojegu, karulino!"  
Ne malfruos printempo!

## Sentoj

En soleco agonias  
la silento buŝoŝtopita,  
dum dronadas la mondo  
en strida galimatio.

Nur Dio en silento  
aŭdebla nin alparolas;  
tamen neniu sukcesas  
aŭskulti la Dian Voĉon.

## Rapsodio

Kvinjara knabino  
feliĉon balancas  
sur ŝnuro ligita  
al du arbaj branĉoj.

Sed ŝi ne suspektas  
pri nepra ŝnurego:  
kvindekjara ino,  
pont' super abismo.

La knabino feliĉas  
pro la momento pura;  
tamen ŝi malkonfidis  
al l' abismo el plumoj.

Kaj ŝi teksas kaj malteksas  
la silkon de l' temprivero,  
kiu eterne revenas...

La virino kvindekjara  
la vivspegulon transiras,  
kaj kun kaos' dialogas.

Sed ŝi nur sukcesas trinki  
de l' tago l' okulon bluan,

sub la printempa suno...

## Limoj

Jen tempo venas,  
en kiu printempo  
sin vestas kiel aŭtuno,  
kaj preferas silentojn  
plektitajn el memoroj  
pri someroj apud la maro.

Tiam sereniĝas poeto,  
la koro kvietiĝas:  
ankoraŭ eĝoj restas  
en la revanta brizo  
ĉe l' animĝardenoj.

## Al Baldur Ragnarsson

Poezio funebras,  
versoĵ ploras: forpasis -  
Ho ve! - Baldur Ragnarsson,  
la Poeto plej elstara  
el nia verda mondo.

Tamen Parnas' gaje festas!  
Poetoj mortos neniam:  
ili restas ensorĉitaj,  
kiel porĉiamaj steloj  
en la memoro de l' tempo.

## L' arbo de Kaŝambuo

En la Parko de l' Akvoj  
de la urbo Kaŝambuo  
jen arbego impona  
mian koron alparolas...

Kaj venis Esperanto  
tuj al mi en la kapon:  
ĉies arbo fluganta,  
kiu ĉiame floras,  
kaj nutras nian koron!

## Feri Floro (Hungario)



*poeto, Feri Floro*

### Sereneco

Vi ne scias kie mi estas  
 kaj vi ŝatus trovi min,  
 serĉu min, vin mi atendas  
 brakume bonvenigas vin.

Trovu min kie la suno  
 subiros en la malproksim',  
 aŭ tie kie la luno  
 nokte brilas sen fin'.

Serĉu min inter folioj  
 de belaj, odoraj rozoj,  
 jen instigas karesadon  
 ili estas ja sen dornoj.

Vi ne scias kie mi estas  
 kaj vi ŝatus trovi min  
 serĉu min, vin mi atendas  
 brakume bonvenigas vin.

Serĉu min kie hirundoj  
 ripozas dum la vintroj,  
 kie ĉiam estas varma  
 la ĉiel' profunde blua.

Trovu min sur la plaĝo  
 kuŝanta en la sablo,  
 sur boat' balanciĝanta  
 en trankvil' ŝilenta, paca.

Serĉu min kie vi volas  
por trovi serenecon,  
tie vin mi atendas  
kaj donas al vi mian koron.

## Mia muzo

En la mondo de la vortoj, mia muzo loganta,  
en la versoj vi estas mia damo adoranta,  
dankon al vi, mia fonto de inspiro,  
naskiĝas la kanzono, eksonas la poemo.

La lum' de viaj okuloj, mian plumon kondukas,  
en miaj tekstoj, via esenco parfumas.  
Vi estas stelo, lumigas mian vojon,  
sen iuj duboj gvidas nian futuron.  
En la notoj de dankem', mi vin trovas,  
en miaj ĝemoj, mi pri vi sonĝas.  
miajn versojn vi levas al altaĵoj,  
dankon al vi, mia muzo de kreaĵoj.

En la paletro de sonĝoj, kiujn ni dividas,  
koloroj intensaj, ni kune konstruas.  
Vi estas melodi', vi dancas en versoj,  
dankon al vi, mia esenc' de la universo.

## Mi volas vivi en harmoni'

El la pasinteco venas senĉese la memoro,  
la nostalgi' aperas, eksplodas mia menso.  
Inter la antikvaj flustroj ekglitas nun la tempo,  
en la fora pasinteco preciziĝas mia sento.

Via majesta ĉeesto pulsas en ĉiu angulo,  
en la libro de la amo unu forta ligilo.  
La paĝoj rakontas pri nia historio,  
la koro ebriiĝas en la pasema danco.



Mi pensas je nia ero, murmuras la sopiro,  
kaj rimarkas viajn spurojn, tuj en ĉiu spiro,  
ke nia viv' estu la sama, kiel tiuj tagoj  
kaj la novaj ĝojoj fluu en niaj memoroj.

Kune kun vi mi volas vivi en harmoni'  
kie la amoro daŭras en eterna simfoni'.  
Kune kun vi mi restas en la ombroj de la memoro,  
kie la ĉo de la ridet' estas en nia trezoro.

## Ĝui la vivon

Ĝui la vivon estas arto,  
kiun aprezas via kor',  
danki por la momentoj,  
plene de belaj sentoj.

Ĝui ĝin estas vojaĝi,  
kun la menso kaj raci',  
la kulturojn tuj ekkoni  
kun diversa tradici'.

Kanti, danci, ridi multe,  
forlasi vian timon tuje,  
agi libere, aŭtente,  
forgesi zorgojn multfoje.

Ĝui la dian naturon,  
la ĉiaman sunleviĝon,  
Senti la marbordan brizon,  
dolĉigante vian animon.

Ĝui la vivon, vi elektas,  
la dezir' en ni restas,  
sekvi ĉiam la bonvolon sur la voj'  
por pluvivi feliĉe en la ĝoj'.

Ĝi estas donac' kaj defi',

invitas nin por sperti mem  
ke la feliĉo povas esti,  
se ni lasas ĝin plukreski.

## Vi, la plej kara

Mi sentas, ke en la vivo,  
vi estas por mi la plej kara,  
plenigante min per ĝojo,  
mi sentas min tiel amata.

Mi donus al vi mian vivon,  
metus ĝin en viajn manojn,  
vi estas mia vera lumo,  
mia revo, mia sopiro.

Senĉese dum la tuta tago,  
vi ĉiam restu apud mi,  
ne gravas la opinio  
de aliaj homoj, ĉar gravas nur vi.

Vi, mia rozo kun dornoj,  
vi, delikata petalo,  
pere de via amoro,  
liberigu min de la zorgoj.

Amplena estas mia vivo  
kio pro vi tuje ŝanĝis  
kaj ek de tiu bela tago,  
kiam el viaj lipoj mi trinkis.

Tiu kanzono al vi diras  
honeste, ke mi vin amas,  
vi estas senc´ de mia vivo,  
mia ĝojo, mia songo.

## Ni estas fablo

Ni estas fablo kun moral´  
ni estas teksto en ĥoral´,  
ni estas bela histori´,  
korpoj kune en harmoni´.

Ni estas du geanimuloj,  
unu voĉo el du buŝoj,  
unueco el du korpoj,  
dolĉaj, silentaj versoj.

Ni nian soifon aman kvietigas,  
nian amon elkore ni nutras,  
ni estas proz´sen rimo,  
unu poem´, dolĉa vino.

Ni estas tero kaj ĉielo  
de l´ ŝtormo ĝia forto.  
Ni kune estas jen la pasi´,  
kiu zorgojn povas solvi.

## Sen vi

Mi amas vin en mallumo,  
kie la ombroj obstinas,  
kie leviĝas la luno,  
la frenezo komenciĝas.

La fulmo ronda vi estas  
kiu min ĉinokte lumigas,  
sen vi la vivo finiĝas,  
sen vi en mallum´ mi vivas.

Vi estas vere mia spiro,  
aero mia de la vivo,  
sen vi ne gravas la mondo,  
sen vi ne estas nuntempo.

Lumradio en mia vivo  
de superfluanta ĝojo,  
sen vi la vivo malvarmas,  
mia amo nur en vi fidas.

La spuroj de la firmamento,  
plenigas nin per la kareso,  
sen vi mi la vivon ne volas,  
sen vi la vivo mallumas!

## **Vi estas mia luno**

Vi estas mia luno kaj suno,  
mi, la amo kaj vi la plezuro  
favoras nin jen la fortune,  
ni kune vivas en granda ĝojo.

Mi estas maro vi estas ondo,  
mi estas nokto, vi, mia sonĝo.  
Mi estas la maro vi estas ondo,  
mi estas la nokto, vi, mia sonĝo.


Vi estas fajro, vi estas vento,  
kies fort' ekflamigas mian rideton  
vi, mia muzo kaj mi la kanto  
ni uzu kune tiun eblecon.

Mi estas korbato, vi, la pasio,  
ĝi plenigas min per emocio.  
Kune ni estas la universo,  
sincera amo, sen reverso.

Viaj okuloj, steloj kiuj gvidas,  
via voĉo min trankviligas,  
ĝi kvietigas miajn marojn  
helpas forgesi la ĉagrenojn.

## Venu, dancu kun mi la vivon

Ni estas kune ĉar mi scias mi povas fidi vin.  
Ni estas kune ĉar mi ŝatas aŭskulti nin.  
Mi ŝatas, ke vi sendogme, sekvas vian vojon.  
Mi ŝatas, ke vi agadante uzas vian koron.  
Ni pasigas tempon kune, kviete senprobleme,  
sur la ĝardenbenk' intime, en feliĉ', en harmoni', kune.  
Donu al mi vian manon, aŭskultu mian kanton,  
ni realiĝos la imagon, venu, dancu kun mi la vivon.  
Ni restas kune ankaŭ se vi ekscitiĝas,  
ni restas kune kaj la zorgojn mi bonvole solvas.  
Mi ŝatas, ke vi trankviligas mian koleran kapon,  
mi ŝatas, ke vi estas preta kunvivi ĉiun ŝtormon.



## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



*poeto Yi Qiao*

### Revsopiro al novepoko

En la splendan mondon ni alvenas  
plene de senfina sankta amo.  
Niaj koroj ja aplomb-serenas  
kun solena monda pacdeklamo.

Brilas supre l' suno kun disperso  
ekde tempoj praaj jam konstante.  
La senlima bena universo  
jen brakumas grace nin gigante.

Espereble venos novepoko,  
maro farbos la dezerton blue.  
Kun evangelio pri pacvoko,  
al prapatroj ni ridetos ĝue.

Pli prosperos jen de jar' al jaro  
esperplena nia globhomaro!

### Ora aŭtuno

Aŭtuno venas, sterne sin en bril',  
arbaro buntas kun folia or'.  
Venteto flustras freŝe kun dolĉetril',  
rikolto glora pompas en fervor'.

Sur kamp' sin kuŝas fruktoj de l' sezon',  
zefiro flirtas tra helblua alt'.  
En ĉiu branĉ' susuras belreson',  
kaj ĉiu roĵo lirlas jen sen halt'.

Tritiko jam maturas en orlum',

folioj ŝvebas kiel festa danc'.  
Ĉe ĉiu kampo ŝprucas freŝa fum',  
kaj ĉio festas pro la bunta ŝanc'.

Rikolt' alportas nin kun plena ĝu',  
aŭtun' jubilas ĉie arde plu.

## Ĉielo stelplena

En ĉiel' stelplena, lumo fluas,  
dum kontemplas ni kun menso ĉasta.  
Stela lum' mistera nin influas,  
kaj inspiras nin pri l' kosm' glolvasta.

Pensas ni pri l' senco de la vivo,  
ĉio difinitas karmfatale.  
En la kosmo flirtas sprit' laŭ drivo,  
voj' al sav' sin sternas ideale.

El stelaro trovas ni trankvilon,  
lum' la sankta flagras en la koro.  
Fine vidas ni l' verecan brilon,  
kaj klopodu kun la gracfavoro.

Ĉiel' as la spegulo de l' anim',  
kaj tie trovas sin homviva rim'.

## Sunsubira ruĝo

La suno nun descendas en hel-ruĝ',  
kompateme kun lastlumo brila.  
La tago dume svenas tuj en fuĝ',  
kaj krepusko svarmas jen trankvila.

Temp' dumviva flosas tro rapide,  
jam vesperas antaŭ nokta revo.  
Pensas mi pri tarda am' medite,  
kaj ankoraŭ nefarita devo.

Mi baniĝas en la roza brilo,  
kun la koro ŝajne d' ard' juneca.  
Releviĝas jam nun l' or-profilo,  
kaj inspiras nin pri fato deca.

Baldaŭ flagros jen maten-aŭroro,  
novkomenco glatos en favoro.

## Odo al l' amo

La ĉielo blua super ni jen povas fali,  
kaj la Tero povas eĉ kolapsi,  
tion mi ne zorgas, se vi amas min.  
Mi atenton donas ne al tuta mondo,  
tiel ke la am' inundos la matenojn,  
kaj ke mia korpo tremos jen sub viaj manoj.  
Al mi gravas ne l' problemoj,  
mia amo, ĉar vi amas min.

Irus mi ĝis fino de la mondo,  
kaj min farbus en helblondo,  
se vi de mi ĝin postulus.  
Irus pluki mi la lunon  
kaj eĉ ŝteli la riĉaĵon,  
se vi de mi ĝin postulus.  
Mi forlasus mian hejmpatrujon,  
kaj forlasus miajn geamikojn,  
se vi de mi ĝin postulus.  
Oni povas ridi pri mi,  
kaj mi farus ion ajn,  
se vi de mi ĝin postulus.

Se la vivo iutage vin forŝiras de mi,  
se vi mortas, tiel estus fore de mi,  
tion mi ne zorgas, se vi amas min,  
ĉar mi ankaŭ mortus,  
eternecon por ni havos ni.



En la bluo de l' vasteco,  
kaj en la ĉielo, estos ne plu la problemoj.  
Mia amo, ĉu vi kredas, ke plu oni amas sin?  
Dio ja kunigas tiujn, kiuj amas sin.

— Liriko de Édith Piaf (1915 - 1963), muziko de Marguerite Monnot, prezentis C ĉine Dion,

esperantigis Yi Qiao.

## Serenado

Lirlas mia kant' leĝere  
tra l' nokto al vi.  
En kvietan boskon jen ekstere,  
kara, venu al mi!

Flustrante susuras arbpintoj  
en lunlum' favora.  
Subaŭskulton de fi-perfidintoj,  
ne timu, mia dolĉ-trezora!

Ĉu vi aŭdas najtingalojn kante?  
ho, ili vin petegas.  
Kun dolĉaj ĝemoj jen pepante,  
ili por mi preĝas.

Ili Kor-sopiron ja komprenas,  
kaj konas l' am-doloron.  
L' arĝent-tonoj jam tuŝtenas  
ĉiun mild-teneran koron.

Kor-tajdo via nun torentu,  
kara, do aŭskultu min!  
Mi streĉate vin atendu,  
venu, feliĉigu min!

— Liriko: Ludwig Rellstab (1799-1860); Muziko: Franz Schubert (1797-1828); Soprano: Nana Mouskouri; esperantigis Yi Qiao

## Mia koro batos plue

Ĉiun nokton en la sonĝoj  
mi vin vidas kaj vin sentas,  
tiel scias mi, ke vi ĉeestas.

Transpasinte la distancon  
kaj vast-spacojn inter ni jam,  
vi venintas montri, ke vi ja alestas.

Diste aŭ proksime, kie ajn vi estas,  
kredas mi, ke l' koro batas ja plu.  
Vi denove jen malfermas pardonon,  
kaj en mia koro vi ĉi tie estas,  
kaj la koro mia batos plu kaj plu.

Amo povas tuŝi nin jam unufoje  
kaj dum tuta vivo plue restas,  
kaj neniam velkas nur ĝis ni foriros.

Amo estis kiam mi vin amis  
ĉe la ĝusta tempo, kiun mi kaptintis,  
mia-vive ĉiam ni antaŭen iros.

Timas mi nenion, dum vi apudestas,  
scias mi, ke l' koro mia batos plu.  
Ni por ĉiam kune restos tiel,  
en la koro mia vi sekura estas,  
dume mia koro batos plu kaj plu.

— Liriko „My heart will go on“ de Will Jennings, melodio de James Horner, prezentado de Celine Dion, esperantigis Yi Qiao.

# Bedo de Ĉinesko

## Vejdo (Ĉinio)



poeto, Vejdo

*La jenaj ĉin-stilaj poemoj estas verkitaj laŭ la melodio Dekses-Silabo de Ĉinesko. Ties skemo konsistas el kvar verslinioj de 1, 7, 3, 5 silaboj kun rimarangō aaxa (x=senrima).*

## Fantazi' de Juna Melkistino

Kun  
lakt-pot' surkape ŝi nun  
revenas  
sub ruĝhela sun'.

Ŝvit'  
perlas survange per glit'  
fantazi'  
venas por vizit'.

“Se  
mi vendos lakton, por ke  
aĉetu  
ovojn ĉipe tre.

En  
estont' naskiĝos en ben'  
kokidoj  
en grandkvanta ĉen'.

Mi  
forvendos ilin je pli  
alta prez'  
en festo feri'.

Nu  
mi havos monon por ĝu'  
aĉeta  
de jupo kaj ŝu'.

Al  
mi proksimiĝos en bal'  
junuloj  
pro nova vestar'."

Sen  
konscio ŝi skuas jen  
la kapon  
dum sia promen'.

Bum!  
Falas poto kiel plumb'  
de l' kapo  
kaj rulas sur grund'

Tut'  
da lakto kovras per ŝut'  
la teron  
sen restanta gut'

For  
ŝia ensonĝa trezor'  
seniĝas  
en ŝia ĝemplor'.

## Mao Zifu (Ĉinio)



*poeto, Mao Zifu*

### Amon Fordrinkis

El  
la orgia mar' de el'  
mi rampis.  
Ne vidiĝis stel'.

Al  
mi ventumis pluma al'  
de supre;  
pluvo jam en pal'.

Por  
vinelflua arda por'  
la akvo  
venis en ĝustahor'.

Sur  
la kolapse febla sur'  
sentiĝis  
pez' de Ejfeltur'.

Tuj  
mi apogis min al tuj':  
— Kien nun  
paŝas la rubuj'?

— Sed...  
Nigra blanka vaz' kun sed'  
turniĝis  
sur mantel' el led'.

Kaj  
ĝi ekiras al la kaj'  
post longa  
staro en malgaj'.

En  
ŝia poŝo eĉ sen en'?'  
Kial ŝi  
tranoktis kun pen'?'

Sen  
pago de eĉ unu sen',  
vi dormu  
do ĉe mi, sen ĝen'!

## Niunio (Ĉinio)

### Inter Domegoj

vent'  
ne venas tra dom' cement'  
solida  
je mia kontent'

lum'  
ne filtras inter brakum'  
de muroj  
je eta volum'

bru'  
laŭtas pro densa konstru'  
sufoke  
kun viva enu'

jam  
mi ne plu per laŭd-aklam'  
por alta  
konstruaĵa gam'

for  
mi volas tuj ĉe ĉi hor'  
min loki  
de l' granda dolor'

## Stulta Hokfiŝisto

Jen  
li ekĵetis per faden'  
logaĵon  
ĉe bord' de haven'.

Li  
atendis kun fatazi'  
akiri  
fiŝegojn dek tri.

Kun  
korbrulo li sidas nun  
sub arde  
la bakanta sun'.

De  
temp' al temp' li ĉesis ne  
trinketi  
el la kruĉ' de te'.

Ĉi  
momente fulmis radi'  
sur akvo  
kun ŝajna premi'.

Bu'  
faletis laŭ akvoflu'  
iome  
kun vezika bru'.

Li  
ektiris kun energi'  
la stangon

kun mallaŭta kri'.

Ba  
li elhokis bulon da  
retaĵo  
de fiŝisto ja.

Por  
la dua fojo pli for  
li ĵetis  
kun sama fervor'.

Dek  
minutojn poste bu' ek  
moviĝis  
re kun akvovek'.

Li  
pensis, se moviĝos ĝi  
refoje  
nu ektiros mi.

Ja  
vere li resentis tra  
fadeno  
removiĝon, ha!

Per  
fortostreĉ' li kun esper'  
ektiris  
ĝin al la ter'.

Fi  
kia granda ironi'  
ĝi estis  
nova tragedi'.

Hom'  
starante ĉe gardodom'  
ekkriis  
per kara pronom'.



“Hej  
 ci amiko, ĉirkaŭej’  
 jam estas  
 polucita plej.

Vid’  
 al la tabulo en sid’!  
 Ĝi diras  
 ‘Instanca decid’:

Ĉi  
 loke pro akv-poluci’  
 ne licas  
 fiŝada meti’.”

## Sero (Ĉinio)

### Aŭtuna Pejzaĝo

flor’  
 flavas brune kiel or’  
 alloga  
 kun dolĉa odor’

ter’  
 ondadas kiel river’  
 orflave  
 plena je esper’

arb’  
 skuas en ruĝa farb’  
 leĝere  
 kun brila lumgarb’

vent’  
 alblovas kun ĝojkontent’  
 mesaĝon  
 de rikolt- moment’

hom’  
 okupiĝas pri nova dom’  
 ĝojplene  
 kiel rida pom’

## Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)



*poeto, Saulo Salgado Wanderley*

### Nature

Nature ni vivas pensantaj pri Paco  
kiel lumo necesa sur niaj vojoj;  
senpaca vivo estas terura minaco  
kontraŭ la enaj sonĝoj de niaj koroj...

Nature ni volas Feliĉon por fakto  
kiu eliminus ja nian malĝojon;  
malfeliĉa vivo estas terura stato  
kiu vere malfortigas nian volon...

Tiamaniere pri bono pensantaj  
ĉiuj devas resti survoje marŝantaj,  
ĉar Paco ne estas medalo al nenio!

Se pri la Feliĉo envive sonĝantaj  
ĉiuj devas resti survoje amantaj,  
ĉar Feliĉo ne restas ĉe ni sen tio!

### Kresku Esperanto!

Ĝi progresas el La Lumo al La Lumo  
flame varmante la amemajn korojn  
kiel konvenas al la vivo-dumo  
pli riĉigante de la vivo horojn;

konsekvence pro la amaga sumo  
kiu nin ofertas belegajn florojn  
al ni sendataj de La Dia Plumo  
altigos nin al belaj honoroj;

akcelu, do, amon, kiel vi povas  
ĉar vi certe, multege, amipovas  
kaj vi ĝin vidos ĝuste je via flanko;

akcelu, do, vian korkariton  
tiel al ne- kiel al la bonamato  
kaj tiel kreskos nia Esperanto!

## Erika Godó (Hungario)



*poetino, Erika Godó*

### Varmaj someraj noktoj

Estas varma somera nokto,  
malvarmeta venteto karesas mian haŭton.  
Steloj hele brilas sur la malluma ĉielo,  
alportante lumon al mia trankvila ĉambro.  
La pepado de griloj aŭdebla en la nokton,  
kies beleco preskaŭ lulas min en sonĝo.  
La arĝenta lumo de la luno brilas sur min,  
la mondo dormanta en silento kaj trankvilo.

Kiel trankvila kaj mirinda nun ĉiuj,  
la plej bela sezono estas somero.

### La vivo estas la plej granda direktoro

Vivo, la plej granda direktoro,  
en kies manoj ripozas nia sorto.  
Kreante, formante, gvidante nin,  
ĝi reflektiĝas en nia ĉiu momento.  
Sed ni povas fidi la direktoron,  
kiu finfine metas ĉion en la lokon.  
Nia vivo estas foje dramo, foje komedio,  
foje tragedio, foje am-afero kun ni kiel roluloj.

Sed ĉiu troviĝas en sia loko kaj tempo,  
ĉar la vivo estas la plej granda artisto.  
Ni akceptu nian rolon, kiun ĝi atribuis al ni,  
ni ludas ĝin kiel ĝi volas ĝin kaj ĝis tiam.  
Ĉar tiel la ludo povas esti kompleta,  
kaj ni povas esti la ĉefroluloj.  
Ni danku la vivon pro la escepta ŝanco,  
ke ni povas esti partoj de ĉi tiu mirinda prelego.

## Se mi estus vento...

Se mi estus vento...  
Mi povus ŝvebi alte supre,  
mi vidus la teron sub mi.  
Mi dancus inter la branĉojn de arboj,  
mi karesus la vizaĝojn de homoj.  
Mi flugus ĉiam kun birdoj,  
mi admirus la bluan ĉielon.  
Mi flugus super la herbejoj,  
mi admirus la naturon de tie.  
Mi estus vento, en senfineco,  
kiu ŝvebas libere en la mondo.

## Aŭtuna sonato

La danco de flaviĝintaj folioj,  
aŭtuna vento mallaŭte blovas.  
La sunradioj inter la arboj,  
ĉiu ombro flustras sekreton.  
Ĉiu unuopa guto de pluvo,  
plena de memoroj kiel puto.

Malvarmeta tagiĝo, matena lumo,  
velura nebulo ĉirkaŭbrakas min.  
Flaviĝintaj folioj, aŭtunaj pejzaĝoj,  
deziroj vivas ankoraŭ en koroj.  
Somero jam adiaŭis de kelka tempo,  
la vivo ludas aŭtunan sonaton.

## Nigra kato

Nigra kato promenas en la nokto,  
ĝiaj ungegoj estas akraj kiel klingo.  
Ĝi ĉiam kaŝas sin la mallumo,  
ĝia malhela felo brilas en la lunlumo.  
Kiel la steloj, kiuj brilas en la ĉielo,

magia estaĵo, reĝo de la nokto.  
Sed ne timu ĝin, ne kredu je superstiĉo,  
ĝi nur volas iom da amo kiel ĉiu vivanto.

## Ni vivas unufoje

Ni vivas nur unufoje, jen la granda vero,  
nur estas unu vojo, ni marŝas sen celo.  
Momentoj brilas, kiel steloj en la nokta ĉielo,  
ĉiu revo teksas retan, donas esperon.  
Ĉiu paŝo, ĉiu vorto portas memoron,  
ni kaptas ĉiun temperon, kvazaŭ trezoron.  
La suno karesas, la vento dolĉe flustras,  
kaj nia tempo forglitas, sen ke ĝi nin avertas.

Brakumu la mondon, la kolorojn sentu,  
ĉiun sonon, ĉiun vidon en la koron enŝovu.  
Ne timu morgaŭ, hodiaŭ ni brilas,  
ĉar rido kaj larmo novajn sentojn ĉizas.  
Ni vivas nur unufoje, do vivu en libero,  
ĉiu minuto estas miraklo en nia vivo.

## Aŭtuna sunbrilo

La sunradio estas kiel ora fadeno,  
ĝi fluas mallaŭte inter la arboj.  
Brilaj ombroj, varmaj brakumoj,  
koroj batas pro la kiso de sunlumo.  
La magio de momento, kiu ĝi neniam foriras,  
kavalkado de koloroj, mirinda spektaklo videblas.

La pitoreska kanvaso de la aŭtuna pejzaĝo,  
en kiu estas la eterna sekreto de la sunradio.  
Do haltu por momento ĝuu la naturon,  
sentu la lumon, la feliĉon en via koro.  
Ĉar en aŭtuno, kiam ĉio estas belo,  
la aŭtuna sunbrilo vivas en via animo.

## Jadranka Miric (Serbio)



*poetino, Jadranka Miric*

### Mia najbarino, Duda

Antaŭ mi staris ŝi  
vestita en robo blukolora.  
En ŝiaj manoj rozetoj, donacitaj de vi,  
Sur ĉiel' sunspuro de nubo ruĝora.

Jam sulkiĝis ŝia vizaĝo.  
Surfrunte videblas vivospuroj de maljunec' .  
Malgraŭ tio allogas ŝia belec' .

En ŝiaj okuloj flamo  
ankoraŭ ne estingiĝis.  
Sur lipoj ridetoj pro la vivoamo  
kiu profunde en ŝia koro kaŝiĝis.

Sunsubiro ora sur ĉiel'  
similas al vivosubiro.  
Venas subite krepuske kiel lampir'  
aŭ kiel de vivo fina kismiel' .

### Al mia belulin'

Malfermu fenestron, mia Bela  
Salutos vin de vasta ĉiel'  
via kara Norda stel',  
kaj pala lun', la lanterno ĉiela!

Sur vasta maro malgajas mi,  
ĉar sen vi, la vivo estas kiel pun' .  
Ne malĝojiĝu kara, vi,  
baldaŭ revenos mi.

Luno kaŝiĝis  
malantaŭ nubar',  
alte en ĉielo inter stelar'.  
Ne, ploru karulin' mia  
sed prizorgu pri la tria ano nia!

## Tenera saluto

Arigiĝis ruĝa nubar',  
pro sunsubiro koloriĝis la tuta ĉiel'.  
Suno dronas en la profunda blua mar'.  
Dormu bone, mia anĝel'!

Disiĝis mallumo.  
Ekstere aŭdiĝis turtokverado.  
Subite sur ŝian vizaĝon falis la blanka plumo.  
Tenera salut', anstataŭ serenado.

Tagiĝo hela  
asertis ke la tago estos bela.  
For de vi, preĝas mi.  
Estu ĉiam sana kara, ci!

## En sonĝoj

Via kiso varma kiel ĉi vespero  
tenera kiel tuŝo de papilio,  
subita kiel ĉi ŝanĝiĝanta vetero,  
bonodora kiel tiu blanka lilio.

Gajiĝis mia animo.  
Manoj provis saluti vin.  
Vekiĝis mi el la ebriiga sonĝo,  
malgajssente aperis timo.

## Ivanichka Magharova (Bulgario)



*poetino, Ivanichka Magharova*

### Fasko da hajkoj

Printempa venteto  
en l' animo de Eva.  
Ama flugilojn.

Ruĝaj rozoj,  
konfeso de amo.  
Ili svenas en la salono.

Vespersunsubir'.  
La odoro de rozoj.  
Najbaro sonĝas

La nokto falas.  
En la ĉambro regadas  
tango de pasi'

Printempa venteto  
en la animo de Eva.  
Ama flugilojn.

Ruĝaj rozoj,  
konfeso de amo.  
Ili svenas en la salono.

La tago mortas—  
sur la fenestro luno.



Anĝeloj kantas.

\*\*\*

Gaja grileto  
Vagulo kun gitaro.  
Bardoj survoje.

Senvestiĝas jam  
la arbaroj en aŭtuno.  
Striptiz' por birdoj.

Pluvaj gutetoj  
kisas mian vizaĝon.  
Perdita ombrel'.

Vespertristeco  
survoje min vizitis.  
Krevitaj pneumatik'.

Palaraneaj`.  
Kreaĵo de la Dio.  
Pendas de angulo.



## Rovere Emanŭele (Italio)



*poeto, Rovere Emanŭele*

### Esperantisto

*Muziko / lirikoj: Manŭel Rovere*

Naskiĝis mi en tre trankvila familio  
en kiu regis granda harmonio.  
Mi kreskis obeema kaj studema,  
bonkora, sentoplana, laborema.

Kondukas ĉiam mi sincere kaj honeste,  
plenumas miajn devojn senproteste.  
Mi strebas pagi ĉion laŭimposte  
eĉ se la taksoj mordas min ĝisoste.

Mi ne drinkas, mi ne fumas,  
ne frekventas virinetojn,  
por manĝaĵoj kaj vestaĵoj  
havas mi modestajn petojn.  
Mi laboras diligente,  
ŝparas monon kun persist',  
sed mi havas la difekton:  
estas mi Esperantist'.

Mi estis ĉiam tre konvinka pacifisto  
kaj tial iĝis mi Esperantisto.

Logike trovis mi, ke Esperanto  
utilas tre al porpachatalanto.  
Aktivas vigle mi en l' Esperantistaro  
por solvi la problemojn de l' homaro:  
forigi lingvajn barojn, miskomprenon,  
starigi reciprokan la subtenon.

Mi ne drinkas, mi ne fumas,  
ne frekventas virinetojn,  
por manĝaĵoj kaj vestaĵoj  
havas mi modestajn petojn.  
Mi praktikas multajn virtojn,  
estas longa tiu list',  
sed mi havas la difekton:  
estas mi Esperantist'.

Sed mi rimarkas, ke jam nun l'idealismo  
fariĝis stranga vort', idiotismo.  
La homoj celas nur al la profito,  
riĉeco estas la nuntempa mito.  
Bonŝance, tamen, ene de Esperantujo  
neniu strikte tenas la monujon.  
L'esperantistoj estas tre helpemaj,  
por la komuna celo donacemaj.

Mi ne drinkas, mi ne fumas,  
ne frekventas virinetojn,  
por manĝaĵoj kaj vestaĵoj  
havas mi modestajn petojn.  
Mi aplikas la precepton  
esti vera altruist',  
sed mi havas la difekton:  
estas mi Esperantist'.

Ĉu mi parolu nun pri nia la movado,  
pri la sukceso de ĝia agado?  
Rezultas ja post centdudekok jaroj  
tre kompatinda vico da eraroj.

Do, karaj, ne postulu, ke l' samideanoj  
ne estu homoj sed eksterteranoj  
kaj eĉ, ke de UEA l' estraruloj  
ne estu plu fuŝuloj sed geniuloj.

Mi ne drinkas, mi ne fumas,  
ne frekventas virinetojn,  
por manĝaĵoj kaj vestaĵoj  
havas mi modestajn petojn.  
Se mi iĝos estrarulo,  
brilos mia la ekzist',  
mi fariĝos sendifekta:  
estas mi esperantist'.

Plensukcesa kaj perfekta  
fluas mia la ekzist',  
mi fariĝis sendifekta:  
estas mi Esperantist'.  
Mi fariĝis sendifekta:  
estas mi esperantisto. ESPERANTISTO!

## Eŭropo

*Muziko / vortoj: Rovere Emanuele (Manŭel)*

Enkore mi kultivas belan revon.  
Ĝi naskiĝis jam dum mia infanaĝ'.  
Mi kreskis kaj mi prenis kiel devon  
lukti por ĝin realigi kun kuraĝ'.

Mi revas pri estonta nova mondo  
kie regas la justeco, la liber',  
ĉiuj homoj en frateca, granda rondo  
kunlaboras por la paco, la prosper',  
kun respekto por naturo kaj medio  
ĝuas kune la riĉaĵojn de la ter'.

Ho mondo, ho mondo, en via estont'

ne plu venu de la militoj la hont'.  
Sed estu fiero kaj granda honor'  
por ĉiuj popoloj vivadi en paco kaj glor'.

Ni studu l' historion de Eŭropo  
kun la dua mondmilita tragedi'.  
Teruras, ke personoj en miloj  
tiel vundis kaj mortigis inter si.

El tio la konvinkon nun ni prenu,  
ke milito estas ega abomen',  
pri rasismoj, naciismoj ni komprenu,  
ke ja temas pri la plej granda malben',  
ke landlimoj estas nur sensecaj baroj,  
honto por l' inteligento de l' homar'.

Eŭropo, Eŭropo, jen via estont':  
Vi estos modelo por la tuta mond',  
pri demokratio, civilo, liber',  
por multaj popoloj la nova, la granda esper'.

La "HEJMO KOMUNA", la nova, la GRANDA ESPER'.

## Ave Maria, Reĝino de la espero

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*  
*Muziko / vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel).*

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,  
Vin mi salutas, ho Madono de mia koro.

Vi, de l' mondo Reĝino, de l' vera Amo la fonto,  
Patrino de Jesuo, nia Savanto:  
asistu nin ĉiutage, kvazaŭ infanojn, prenu niajn manojn,  
kaj helpu nin elteni niajn penojn.

Al Vi sopiras koroj, por la konsolo sia,  
Vin vokas ĉiuj "Panjo", kun sento pia.

Protektu Viajn filojn disajn sur la tuta ter',  
ne lasu ilin en malsato aŭ sen liber', mi preĝas.

Se l' estonto malheliĝas, brilas pli Viaj okuloj  
kaj lumigas nian vojon per radio,  
sub gvidado Via sekura ni fariĝas kuraĝuloj,  
dank' al helpo Via timigas nin nenio.

Vortojn miajn, do aŭskultu, Vin mi preĝas kun fervoro,  
Dipatrino estas Vi nia espero,  
estas Vi nia certeco, ke en ĉi mondo triumfos la Bono;  
propetu Dion pri paco kaj frateco,  
por ni pri Lia pardono.

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,  
Vin mi omaĝas, ho Madono de mia koro.  
(Al vi omaĝas mi, Madono de mia koro).

Tutkore Vi kompatas pekulon pentofarintan,  
neniam Vi forlasas filon vojerarintan.  
Fortigu l' malsanulojn, portu al ili resanigon,  
aŭ donu almenaŭ sanktan rezignacion, mi preĝas.

Se danĝero proksimiĝas, tenu min flanke de Vi:  
ĉiam zorgas Vi pri filo vin vokanta.  
Via ĉeno rozaria estas la ankro por mi,  
subtenil' por ĉiu filo Vin amanta.

Nun mi petas, Dipatrino, per tiu ĉi simpla preĝado:  
montru celon al nia surtera paŝado.  
Vi tion faros sendube, ni sopiras al nura provizo:  
pretigu por Via filoj, de Vi apude, lokon en Paradizo.

Ave, ave Maria, Reĝino de la Espero,  
Vin mi salutas, ho Madono de mia koro.

## **Anĝeletoj negraj**

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

Muziko / vortoj: A. Eloy Blanco / M. Alvarez Maciste

Pentristo, paŭzigu l'laboron, dum vi pentradas l'altaron.  
Mi estas nur povra nigrulo, venas kun eta postulo:  
kvankam la Dipatrino blankas, pentru anĝeleton negran.  
Ĉiuj beboj ĉielen iras, eĉ se haŭt' ilia nigras.


Se vi pentradas kun amsento,  
la koloro nigra por vi ne estu honto.  
Vidante bebojn negrajn, al ili Dio ridetos.

Mi estas nur negro, pekulo, tamen de Dio fidelulo.  
Scias mi, ke Li amas Siajn filiojn, same negrojn kaj blankulojn.

Kvankam la Madono blankas, pentru anĝeleton negran.  
Ĉiuj beboj ĉielen iras, eĉ se haŭt' ilia nigras.

Se vi pentradas kun amsento,  
la koloro nigra por vi ne estu honto.  
Vidante bebojn negrajn, al ili Dio ridetos.

Mi estas nur negro, pekulo, tamen de Dio fidelulo.  
Petas mi, ke vi, en anguleton, pentru negran anĝeleton.



## Li Shangyin (813—858)



*Li Shangyin estas unu el la plej elstaraj poetoj en Tang-dinastio de Ĉinio. Liaj poemoj estas strikte komponitaj en strukturo, en kiuj li uzis implicitajn sencojn, simbolajn rimedojn, rafinitajn vortojn kaj delikatajn sentojn por esprimi la profundajn emociojn.*

poeto, Li Shangyin

### Sentitole

Ja malfacilas rekuniĝi kaj disiĝi same,  
 la orienta vent' malfortas, floroj velkas plene.  
 Silkraŭp' printema ĉesas ŝpini silkon ĉe la morto,  
 kandel' ne stopas larmi ĝis cindriĝo kunĉagrene.  
 Matene la spegulo timas vidi harblankiĝon,  
 en luna lumo frost' invadas maldormanton ĝene.  
 La monto baras vojiradon neproksiman de li,  
 al Blua birdo mi konfidas la viziton splene.

### Falantaj floroj

Gastoj jam foriris de la alta turo,  
 en la korto floroj flirtas en pelmelo.  
 Svagas en vidkampo la meandra pado,  
 strabe brilas subiranta la sunhelo.  
 Florojn ne balaas mi jen kun korŝiro,  
 la printempo haste svenis en leĝero,  
 Floroj plendas pri tro frua printempfino,  
 vest' humidas, ve, de larm' pro flor-mizero.

### Penseo en frida aŭtuno

Kiam vi foriris, la printempa akvo  
 ŝvelis ĝis la balustrado,  
 jam cikadoj ĉesis trili sur la branĉo



ros-humidaj en parado.  
Mi ĉi tie staras en sezono aŭtuna  
kun la penso de sopiro,  
apogante min al balustrado senmove  
jen sen emo al foriro.  
Norda stelo flage pendas malproksime  
kiel tiu primavero,  
kuriero el la sudo ankoraŭ tardas  
ja alveni kun letero.  
Mi kelkfoje sortdivenis kaj prisonĝis  
la kialon de malfru',  
mi konjektas, ke vi konas nov-amikon,  
jam memoras min ne plu.

## Printempa pluvo

Mi kuŝas sen demeti blankan robon nov-printempe,  
ne vizitatas rendevua lok' je mia ĝeno.  
Rigardas mi tra pluvo la buduaron en malvarmo,  
sub pluvbatado mi revenas hejmen kun ĉagreno.  
Vi eble sentas fridon en printempa nokt' en foro,  
verŝajne renkontiĝus ni en sonĝo de nubpleno.  
Mi jam pretigis orelingojn, amleteron por vi,  
per la sovaĝansero ilin sendos mi kun beno.

## Leyou-altano

Min ĉagreno mordas jen kruele,  
mi ascendas la altanon oldan.  
Subiranta suno ĉarmas bele,  
sed vesperas bedaŭrinde vere.

## Cikado

Vi sur alta branĉo stare malsatas,  
vane ripetade ĉirpas rankore.  
Noktprofunde vi singultas kelkfoje,  
ĉiam l' arb' sin tenas kalme senkore.  
Kiel malalta-rangul' mi migradas,  
herbkovritas la hejmloko enfore.  
Min avertu zorgi mian konduton,  
mi imitas vin en alt' senkaĵole.

## Ventpluvo

Mi verkas tristajn versojn, sed kun ambicio,  
mi forvagadas jarojn ĉie nenifara.  
Folioj flavaj fale flirtas en ventpluvo,  
el luksa hal' elŝvebas la muziko bala.  
Amikoj novaj ja klaĉatas triviale,  
dum la malnovaj foras pro destin' reala.  
Mi volas dampi la ĉagrenon per la vino,  
eĉ devus mi aĉeti ĝin je prezo kara.

## En nokta pluvo

Vi ĉuas, kiam mi revenos, mi ne certas,  
en nokta pluvo ŝvelas l' aŭtun-akvo en baseno.  
Ĉe renkontiĝo ni lampmeĉon kune tondos,  
mi diros al vi amsopiron kun ĉagreno.

## Vespera sereno

Mi ermite vivas flanke de urbeto,  
printempfine freŝas spiro de l' somero.  
La Ĉiel' kompatas herbojn en kvieto,  
al la homa mondo plaĉas ĉi vespero.  
Sur la alta tur' pli klaras vid' en belo,  
svagas la subira sun' ĉe l' fenestreto.  
Nestoj varmas jam en seka la aero,  
birdoj revenflugas ŝvebe kun impeto.

## Farbita citro

La farbita citro havas kvin dek kordojn, kial?  
Ĉiu kordo memorigas min pri la pase'.  
Zhuang Zi songis pri l' de si amata papilio,  
La regnestr' konfidis koron al kukol' kun ve'.  
La lunbild' en maro glimas kiel larmoperloj,  
la fumanta jad' naskiĝas en Lantian-are'.  
Tiuj belaj scenoj restas nur en rememoro,  
bedaŭrinde tiam mi kondukis ilin al pere'.

*elĉinigas Eto (Ĉinio)*

## Shi Yu



*tajvana poetino, Shi Yu*

### Eterneco en Momento

ho vi! ne sunumu vian ombron en vundon  
 kiu estas okulpikanta, kaj la tempo estas afliktita  
 ho vi! kiam sendormema najtingalo kantas sub la  
 steloj,  
 ne lasu la sopiron malvarmumiĝi  
 somere, cikadoj kantas foje kaj refoje,  
 mankas al malnova gitaro en la angulo via tenereco

aŭtune, la vento blovas foje kaj refoje,  
 mankas al lignaj ventosonoriloj apud la fenestro via  
 konsolo

ho, mi rigardas al la lunarko, kiu rondiras senhalte  
 la grizaj domoj starantaj kontraŭe ekhavas sulkojn  
 ho, mi rigardas al la suno, kiu leviĝas kaj subiras  
 jen fenestropordoj, kiuj enŝlosis mian koron  
 ne lasu la pluvon malsekigi ĝin

ho vi! ho vi!

aŭskultu ree, aŭskultu ree  
 ĉu la vento ankoraŭ blovus  
 tiel milde, tiel milde

ho mi! ho mi!

ankoraŭ plu, ankoraŭ plu  
 aŭskultu la sonon de pluvo  
 kiu alportus malsekiĝon

### Forigita de la vento kaj pluvo

oktobro ĉirkaŭas ies urbon  
 murpinta aŭroro alportis pasintaĵojn foren  
 malfrue reveninta hirundo ne volas  
 preterpasi la tenerecon de aŭtuna suno  
 nokto, palpebrumas iom  
 lunarko pigras, kaj pigras

sopiroj elverŝas  
 la vento disiĝas silente unu post la alia  
 pluvero ne estas tenata en la sino  
 oni aŭdis, ke ĉiuj larmoj fluas en la nordo  
 riveroj kaj valoj tre okupiĝas  
 la vento konsterniĝas  
 nokto retrorigardis ĝin malestime  
 oktobro ne ĝojegas  
 al kiu iu apartenas, kaj ŝtopiĝis en soleco  
 amo estis forigita de la pluvo kaj vento  
 tiu stellumo  
 malvarmigas nokton

## FOJE

kiam vento forbalais flavon  
 aŭtuno estis jam matura  
 vento kaj pluvo frue velkigis branĉojn  
 trafiksignaloj funkcias regule  
 nur aŭtoj pasis rapide, restas vaka strato  
 signaloj ŝaltas aŭ malŝaltas lumojn  
 kvazaŭ kiuj venigis venton kaj pluvon  
 ekster la fenestro, ĉio estas tre kaosa  
 vi kurbiĝas kiel kato  
 kuŝante antaŭ la fenestro  
 kviete aŭskultas venton kaj rigardas pluvon  
 ĉio estu eble sekura

## Ma Wei (1992-)



*poetino, Ma Wei*

### Nokto sen stratlampoj

oni eĉ ne povas vidi ombron sur nokta vojo  
 nur mi, akompananto de arboj  
 la frida vento blovas en aŭtuna nokto  
 mi sentas la solecon jam ĝisostan  
 preterpasante soforon, sekve poplon

kaj laŭro preparas dissendi sian aromon  
 nun mi eĉ ne povas vidi miajn fingrojn  
 sed mi povas klare distingi ilin  
 kaj pensu, ke ĉiu arbo, kiu sola gardas la nokton, estas ja  
 bonega  
 ĉu ĝi floras aŭ ne, ĉu ĝi fruktas aŭ ne  
 ili ĉiuj amas la mondon silente, senhezite  
 kaj ĝuas absolutan lumon  
 kaj akceptas absolutan mallumon

## Funebron al aŭtuno

Kiam ĉiuj lampoj estas lumigitaj,  
 mi surbordiĝis kaj finis mian vagadon,  
 ĉio estas tre trankvila kaj stabila.  
 Mi antaŭsciigis pri ĉio de venonta vivo:  
 mi povos plenigi fendojn en iu jaro,  
 mi povos konstrui kastelon en iu loko,  
 aŭ mi renkontus iun, kiun mi ne indus renkonti  
 en nekonvenaj tempo kaj loko.  
 Kiam iu gajnas ion, tiam tiu eĉ perfidus tion,  
 sed la serĉadon mi rezignus, mi ne perfidos ion,  
 Plej malbone mi sinmortigus per tranĉilo,  
 dediĉu la mortintan kadavron al realo.  
 Plej malbone mi plukus florojn per mil fingroj,  
 dediĉu la falintan solecon al idealo.  
 Plej malbone mi estus gasto en gastejo,  
 dediĉu la silentan kaj eternan naskiĝlokon al memoro.

*\*Ma Wei, juna ĉina poetino, laboras en urbo Xi'an. Antaŭ ne longe ŝi eklernas Esperanton, nun estas membro de Xi'an-a Esperanto-Asocio. Ŝiaj poemoj aperis en diversaj ret-gazetoj de Ĉinio.*



*esperantigis Ardo (Ĉinio)*

# Fang Hong (Ĉinio)

## Variantoj en tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj

Ĉinio estas lando riĉa je poemoj. Jam pasis ĉirkaŭ tri mil jaroj kiam la unua poemaro *Libro de Poezio* aperis en Ĉinio. Laŭ malpreciza kalkulo la ĉinaj antikvaj poemoj nombriĝas je ĉirkaŭ tri cent mil. Pro interŝanĝo de kulturaj heredaĵoj inter diversaj landoj multaj ĉinoj tradukis la ĉinajn poemojn en alilandajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Precipe dum la lastaj tridek jaroj pli ol du mil ĉinaj antikvaj poemoj estas esperantigitaj. Kompreneble la tradukintoj zorgeme elektis popularajn kaj multelegatajn poemojn por esperantigo. La tradukitaj poemoj kovras la tempdaŭron de pli ol tri mil jaroj. Kiam ni ĝuas kaj aprezas tiujn poem-tradukojn, ni trovas, ke ekzistas multaj traduk-variantoj de la sama poemo. Tio estas interesa fenomeno, ĉar ni povas studi la stilon kaj traduk-teknikojn de tradukintoj. Traduki la ĉinajn poemojn en Esperanton ne estas facila afero. Pro tio, ke la ĉina kaj Esperanto multe diferencas en vortigo, esprimo, gramatiko kaj aliaj flankoj, la ĉinaj kaj eĉ neĉinaj esperantistoj strebas fari la tradukojn pli perfekte. Fakte antaŭ ili staras du obstakloj: komprenado de la originalaj poemoj kaj esprimado per Esperanto. Por kompreni la sencon de la ĉina antikva poemo la ordinaraj ĉinoj devas posedi solidajn sciojn de la ĉina antikva lingvo, ĉar la antikva ĉina lingvo kaj la moderna malsamas en vortsenco kaj gramatik-konstruo. Kaj eĉ se oni povscias la ĉinan antikvan lingvon, li devas konatiĝi kun la skribaj teknikoj, metaforaj figuroj, imagoj kaj etosoj prezentitaj de poetoj en la ĉinaj antikvaj poemoj, tiel ke oni povu pli bone kompreni la poemojn mem. Por esprimi ĝin en Esperanto oni devas skribi simplajn kaj facile kompreneblajn versojn en Esperanto kaj poste laŭ la Esperanta metriko kompletigi la tradukitan poemon. La plej malfacila laboro kuŝas en tio, ke en la ĉinaj antikvaj poemoj oni uzis tonadon (en la ĉina ekzistas kvar tonoj por unu ideogramo) por sona harmonio, dum al Esperanto mankas tia rimedo, kaj en Esperanto oni uzas ritmon kaj rimadon malsamajn ol en la ĉina. Se oni volas sukcesi traduki unu ĉinan antikvan poemon en Esperanton, li devas konsideri tiujn faktorojn kaj plenigi la mankojn inter la du lingvoj. Laŭ la tradicia tradukproceso, ĉinaj esperantistoj kutimas konsideri la nombron de uzitaj silaboj kompare kun la nombro de ideogramoj de ĉina antikva poemo. Ĝenerale oni uzas du silabojn por traduki unu ĉinan ideogramon, ĉar unu ĉina ideogramo povas esprimi pli da senco ol proksimume du silaboj aŭ unu vorto, ekzemple, por traduki unu poemon kun po kvin ideogramoj en ĉiu verslinio, oni uzas dek-silaban versliniojn en Esperanto (kompreneble kun konvenaj ritmo kaj rimado). En tiel kompleksa proceso la tradukintoj penis kaj penas produkti diversajn

tradukojn laŭ sia kapablo ne nur en la ĉina lingvo, sed ankaŭ en Esperanto. Kaj tiele multaj poem-tradukoj naskiĝis amase el la manoj de tradukintoj. Variantoj de tradukoj el la sama poemo nature aperadis en diversaj libroj, revuoj, retejoj kaj aliaj lokoj. Ĝis nun, laŭ mia rimarko, la poemo verkita de Li Bai (701-762) *Nokta penso* havas plej multajn traduk-variantoj, sume je pli ol du dek. Antaŭ kvar dek jaroj aperis la libro *Tutmonda sonoro* farita de nia karmemora K. Kalocsay, en kiu troviĝas la traduko de *Nokta penso*. Laŭ mia supozo, la traduko de la poemo jam aperis almenaŭ kelkdekaj jarojn pli frue ol la libro mem. Laŭdire Kalocsay ne konis la ĉinan lingvon kaj pere de la helpo de ĉino li sukcesis esperantigi la poemon laŭ lia parafrazo aŭ laŭvorta traduko de la poemo. Mi permesas al mi aserti, ke lia traduko estas la unua tradukversio de la poemo. Depende de lia poezia talento, Kalocsay faris ĝin bela Esperanta poemeto, se ni legas ĝin senkonsidere la originalan poemon. Nun ni unue ekzameni la originalan poemon verkitan de Li Bai antaŭ pli ol mil kaj du cent jaroj:

李白(701-762)

静夜思

床前明月光，疑是地上霜。举头望明月，低头思故乡。

Laŭlitera traduko:

Kvieta nokto penso

Ĉe putrando (verŝiĝas) brila luna lumo, / ŝajnas prujno sur la tero. / (Mi) levas la kapon (kaj) rigardas la brilan lunon, / (kaj) klinas la kapon (kaj) pensas (pri mia) hejmloko.

Lia traduko legiĝas:

### NOKTA PENSO

Antaŭ lito blanke brila luno floras,

Super tero kvazaŭ prujno blankkoloras.

Kapolevo: brilan lunon mi rigardas,

Kapoklino: naskvilaĝon mi memoras.

*trad. K. Kalocsay*

La originala poemo konsistas el kvar kvin-ideogramaj versioj kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj, simile al robaia konstruo. Kalocsay uzis kvar ses-trokeojn kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj. En konstruo la traduko estas fidela al la originala, sed en senco la traduko ne estas tiom fidela. “Antaŭ lito” devus esti “ĉe puto” aŭ “putrande”. Kompreneble tiu kulpo ne devus iri al Kalocsay, sed al lia ĉina klariginto. Tamen en esprimado Kalocsay faris kelkajn misojn. “(prujno) super tero” ŝajnus, ke prujno flosus en aero, sed ne kuŝus SUR LA TERO”; “Kapolevo” kaj “Kapoklino” sonas kiel ordonvortoj, sed ne tiel nature nek poezie. Fakte “rigardas brilan lunon” postulas kapolevon, ĉu necesas aldoni redundajon?

Japano Kenji Ossaka ankaŭ esperantigis tiun ĉi poemon de Li Bai:

**PENSO EN NOKTO**

Antaŭ lito helas planko,  
 Kvazaŭ kuŝas prujno blanka.  
 Levas kapon mi al lun' admire,  
 Kaj... ĝin tuj mallevas hejmsopire.

*trad. Kenji Ossaka*

La traduk-poemo konsistas el du kvar-trokeoj kaj du kvin-trokeoj kun para rimado. En ĝi troviĝas la sama miskompreno pri “antaŭ lito”. La pli bona esprimo ol tiu de Kalocsay estas “(mi) levas la kapon” kaj “ĝin mallevas”, tiel ke la japana tradukinto evitis la ordoneskajn esprimojn.

Jena estas la traduko de Claude Piron:

**NOKTOPENSOJ**

Al lit' helas lun',  
 Sur ter' lumas prujn'.  
 Kaplev': jen lunbrilo,  
 Kapklin': hejma jun'.

*trad. Claude PIRON*

La traduk-poemo konsistas el tri kvin-silabaj versoj kaj unu ses-silaba verso (la tria verslinio) kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj. Persone mi ne konsideras, ke ĝi tenas ĝustan ritmon de Esperanta metriko, precipe tiuj karamboloj (lit' helas, ter' lumas, kapklin' hejma) konfuzas mian menson. En senco ĝi iom distancas de la originala poemo. Ekzemple la originala poemo diras, ke la lunlumo ŝajnas prujno sur la tero, sed la traduko diras, ke “Sur ter' lumas prujn'” ne estas vera, ĉar tute ne ekzistas prujno sur la tero en tiu sceno. La tradukinto ĉasis rimadon per –un-, sed “hejma jun'” prezentas al la leganto malklaran bildon: ĉu juna hejmo? Fakte la traduko jam detruis la sopireman etoson de la originala poemo, kvankam laŭdire ĝi akiris premion de la belarta konkurso.

William Auld ankaŭ partoprenis en tradukado de tiu ĉi poemo:

**DUM NOKTO KVIETA**

Mi vidis lunlumon  
 Antaŭ kanapo mia:  
 Ĉu frosto kovras la teron?  
 Mi levis la kapon,  
 Rigardis sur monto la lunon,  
 Mi klinis la kapon,  
 Kaj pensis pri hejmo lontana.

*trad. William Auld*

Mi aŭdace asertas, ke la traduk-poemo esprimiĝas ĉefe per amfibrakoj en libera



maniero. “Antaŭ kanapo” egalas al “antaŭ lito”, same miskompreno de la originala poemo. Ĝia konstruo nature ne kongruas kun tiu de la originala poemo.

Rilate la tradukojn far ĉinoj, mi citu nur ses el ili:

1. Antaŭ l' lit' la luno blanke floras,  
Sur la planko kvazaŭ prujn' koloras.  
Kapolev': la lunon mi rigardas,  
Kapoklin': hejmlokon mi memoras.

*trad. Laŭlum*

2. Antaŭ la lit' scintilas pompa bel',  
Ĉu prujno sin disŝutas al la ter'?  
Ha, l' lun' al mi obstine okulumas;  
Ve, nostalgio en la kapo zumas!

*trad. Xie Yuming*

3. Antaŭ lito luma spir'  
Ĉu surtere frosta ir'?  
Kapoleve: luna bril';  
Kapokline: hejmsopir'.

*trad. Vadant*

4. Antaŭ lit' lum-spir'  
Teren prujnoŝmir'?  
Kaplev': lun-rigard';  
Kapklin': hejm-sopir'.

*trad. Lu Jixin*

5. Put-rande lunlum'  
kvazaŭ prujn'. Kaj dum  
al lun' kap' supren,  
klinas ĝin hejmum'.

*trad. Zhou Liuxi*

6. Ĉe puto ludas la lunbrilo  
kiel surtera prujn-kovrilo.  
La lunon helan rigardante,  
mi hejmsopiras sen trankvilo.

*trad. Vejdo*

La unua traduko pli aŭ malpli samas kiel tiu de Kalocasay, eble modifita versio de Kalocsay.

La dua estis esperantigita de Xie Yuming, la tradukinto de *Ruĝdoma Songô* (Ĉina Esperanto-eldonejo, Beijing, 1996). Sendube li estas lerta tradukinto de la ĉina antikva poezio, ĉar en *Ruĝdoma Songô* troviĝas multaj poemoj, versparoj kaj alistilaj

poemoj, kiujn li esperantigis zorgeme kaj en serioza maniero. Laŭ lia stilo en tradukado li donis atenton al la senco, etoso kaj artismo de tiuj poemoj, sed ne nur al iliaj konstruo kaj formo. Vere en tradukado de ĉi tiu poemeto li ne strebis reaperigi la formon kaj konstruon de la originala poemo. Lia traduko konsistas el kvar kvin-jambaj verslinioj kun para rimado. En la okuloj de aliaj tradukintoj lia traduk-poemo iome malproksimiĝas de la originala, sed fakte ĝi estas fajne elfarita kun kelkaj luksaj vortoj (ekz. scintili).

La tradukintoj de la tria kaj la kvara tradukoj donis grandan atenton nur al la ekstera konstruo de la traduko, preskaŭ ignorante la esprimatan sencon. Ili volis, ke la nombro de silaboj de tradukitaj verslinioj egalul al tiu de ideogramoj de la originalo por akiri la absolutan egalvaloron almenaŭ en kvanto de silaboj aŭ longeco de la verslinioj, sed fakte tio ne eblas, ĉar la senco esprimita per unu ideogramo estas pli ol tiu de unu Esperanta silabo. Pro tio ili vole nevole forĵetis kelkajn necesajn ligantajn vortojn por teni la liniojn en sama kvanto de silaboj, tiel ke naskiĝis nekomprenblajoj. Mi ne scias, kiom da senco neĉinaj legantoj povus kompreni el tiuj verslinioj. Kaj la kvina traduko similas al la tria kaj la kvara. Kvankam ĝi entenas verbon por ligi aliajn frazelementojn en verslinioj, bedaŭrinde pro manko de sufiĉaj silaboj, ĝi ne plene esprimas la sencon de la originalo. En la ĉinaj antikvaj poemoj oni ofte ellasis la subjekton “mi”, dum en Esperanto oni ne devas ellasi la subjekton “mi” ĝenerale, alie la plenumanto de la ago ne estas klara. Tiaj tradukoj plejofte forĵetas la plej gravan personon (mi) en la bildo de la poemo.

La sesan tradukon la tradukinto faris surbaze de tiuj pli aŭ malpli sukcesaj tradukoj. Li scias, ke nur tra komparado oni povas juĝi, kiuj tradukoj estas bonaj kaj kiuj malpli bonaj, tiel ke oni produktas relative perfektan tradukon.

En tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj ofte aperas tiaj variantoj de la sama poemo. Ili rajtas ekzisti samtempe, ĉar ili reprezentas diversajn stilojn kaj karakterojn de diversaj tradukintoj. Pere de tiuj variantoj oni povas kompari kaj analizi ilin de multaj anguloj— komprenado, esprimado, metriko kaj eĉ elektado de vortoj—, tiel ke oni iom post iom perfektigas la tradukadon.

Jene mi citu alian grupon da variantoj por ĝuado kaj aprezado de la legantoj:

孟浩然 (689 – 740)

春晓

春眠不觉晓，

处处闻啼鸟。

夜来风雨声，

花落知多少。

Laŭlitera tradukado:

printema mateno

printema dormo ne scias vekigon, / ĉie aŭdiĝas birdaj pepoj. / noktaj venta kaj pluva sonoj, / floroj falis oni ne scias kiom.

Meng Haoran (689 – 740)

### 1. Printempa mateno

La dormo printempa vekigon ne konas,  
Matene, sed ĉie, birdpepo resonas.  
Hieraŭ en nokto de pluvo kaj vento,  
Ve, kiom da floroj falis en lamento?

trad. Minosun

### 2. Printempa mateno

Dormanton eksurprizas matenhelo  
Birdkantoj ĉie eĥas ĉe l' orelo.  
Sed dum la noktaj vent' kaj pluvo,  
Kiom da floroj ja ekkuŝis sur la tero?

trad. S.J.Zee

### 3. Printempa mateno

Dormado printempa,  
Tagiĝon ĝi spitas:  
Birdeta pepado de tempo  
Al temp' ĝin nur sonĝe vizitas.  
Dum nokt' mi aŭskultis,  
Ke plukas kaj ventas:  
De tio, ho ve, evidentas,  
Ke floroj falintaj tre multis!

trad. Kenji Ossaka

### 4. Printempa mateno

Printempa dormo dolĉis ĝis taghelo,  
Birdkantoj ĉie tiklas al l' orelo.  
Bruadis nokte pluvo kaj ventblovo,  
Kiom da floroj falis al la tero?

trad. Laŭlum

Post komparado kaj analizado, mi povas konstati, ke al ĉiuj suprecititaj tradukoj ne ekzistas problemoj pri komprenado de la originalo kaj Esperanta metriko. Do, kio estas la kriterio por juĝi, kiu el ili estas pli bona traduko? Estas vere malfacile fari tion, ĉar ĉe altnivela tradukantoj la traduk-poemoj aspektas tre simile en esprimado. Laŭ la opinio de la ĉina fama tradukisto Xu Yuanchong, kiu tre lertas en poezia tradukado en la angla kaj franca lingvoj el la ĉina antikva poezio, elmetis tri kriteriojn por la tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj al aliaj lingvoj. La unua

kriterio estas beleco de senco, laŭ kiu la traduko devas esti fidela al la originalo ne nur en senco, sed ankaŭ en ekzakta kaj artisma vort-elektado. La dua emfazas la belecon de muziko, ĉar kiel poemo la traduko devas prezenti poezian etoson en diversaj flankoj de metriko. Kaj la lasta temas pri la beleco de formo, t.e. la traduko devas esti bela en formo aŭ konstruo fidela al tiu de la originalo.

Pri la beleco de senco:

La unua traduko prezentas pli aŭ malpli belan scenon de la originalo. En la dua traduko “Dormanton eksurprizas matenhelo” ne povas transdoni la ĝustan sencan de la originalo, kiu diras, ke eĉ kiam tagiĝas, la dormanto ankoraŭ dormas, ne volante ellitiĝi. En la tria traduko “spitas” uziĝas nur por rimado, sed ne estas konvena vorto en la senco, kaj “ĝin nur sonĝe vizitas” aldonas la sencan, kiun la originalo ne havas. En la kvara traduko “tiklas” estas erare uzita, ĉar oni ĝenerale uzas ĝin kiel transitiva verbo.

Pri la beleco de muziko kaj beleco de la formo:

La unua traduko konsistas el kvar versoj de kvar amfibrakoj kun para rimado (la rimaranĝo de la originala poemo estas aaxa (x=senrima)) kaj ĝia konstruo proksimiĝas al tiu de la originala. La dua traduko konsistas el du kvin-jamboj, unu kvar-jambo kaj unu ses-jambo kun para rimado kaj ĝia konstruo iom distancas de tiu de la originalo. La tria traduko entenas ok versliniojn laŭ la skemo: du du-amfibrakoj + du tri-amfibrakoj + du du-amfibrakoj + du tri-amfibrakoj kun rimaranĝo ababccddc, kaj ĝia konstruo iom multe diferencas de tiu de la originalo. La kvara traduko havas netajn versliniojn de kvin jamboj laŭ la rimado de la originalo aaxa.

Laŭ la supra analizado tiuj kvar poem-tradukaj variantoj havas sian proprajn avantaĝon kaj malavantaĝon. Se oni volas juĝi, kiu varianto estas pli bona, tio eble dependas de aprezo kaj nivelo de Esperanto de la leganto. Fine mi volas diri, ke la poem-tradukaj variantoj de la ĉinaj antikvaj poemoj povas helpi fari poem-tradukadon pli perfekta, se vere ekzistas tiaj perfektaĵoj.



*esperantigita de Alain Roze Courbou (Francio)*



## John Huang (Kanado)



*aŭtoro, John Huang*

## Mia Vojaĝo al Ĉongĉingo dum la Ĉina Nacia

### Festo 2024

Ĉi-jare, dum la Nacia Tago-ferio, mi finfine realigis mian longdaŭran deziron kaj vojaĝis al Ĉongĉingo por viziti la mondfaman esperantistan tradukiston, Profesoron Vejdo. Tiu ĉi vojaĝo ne nur ebligis al mi sperti la prosperon kaj unikan pejzaĝon de Ĉongĉingo, sed ankaŭ mi ekhavis la ŝancon persone renkonti Profesoron Vejdon kaj ekscii pli pri lia laboro en esperanta literaturo. Dum la Nacia Tago, Ĉongĉingo estis plena de homamasoj kaj ĝojplena etoso, kio aldonis apartan koloron al mia vojaĝo.

### Vizito al Profesoro Vejdo

La 3-an de oktobro, frue matene, mi flugis rekte de Ŝenĝeno al Ĉongĉingo. Mi prenis taksion ĉe la flughaveno kaj iris rekte al la loĝkvartalo, kie loĝas Profesoro Vejdo. Kiam mi alvenis ĉe la enirejo de la kvartalo, Vejdo jam piediris renkonti min. Li portis simplan ĉiutagan vestaĵon, elradiis intelektan ĉarmon, kaj mansvingis al mi ridetante. Li akompanis min tra ombra aleo, ĉirkaŭita de verdaj arboj. Ni gaje babilis, kaj mi sentis lian aparte afablan karakteron. Enirinte la hejmon de Vejdo, mi tuj sentis lian vivmedion saturitan de kulturo. La librobretoj estis zorge aranĝitaj kun diversaj libroj pri Esperanto kaj literaturo, kaj sur la muroj pendis kelkaj fotoj de liaj

familianoj. La hejmo de Vejdo, same kiel li mem, elspiris samtempe akademian rigorecon kaj elegantan vivstilon. Mi havis profundan interparolon kun ĉi tiu majstro, sentante lian dediĉon kaj pasion por la esperanta tradukado. Li ankaŭ rakontis al mi pri sia mirinda kaj riĉenhava vivo.

Vejdo (Wei Yida), naskita en 1947 en Wuxi, Ĉongĉingo, estas fama ĉina esperantista tradukisto. En 1964, li memlernis Esperanton kaj poste lernis de sinjoro Gu Cunhua kaj sinjoro Fang Shanjing. Liaj atingoj en Esperanto estas elstaraj. Li partoprenis en la traduko de la unua skizo de la Esperanta versio de "Poemoj de Mao Zedong" kaj tradukis ĉirkaŭ dek mil vortojn en la kvina volumo de "Elektitaj Verkoj de Mao Zedong". Krome, li tradukis "La Edzo" de Lu Yan kaj "La Familio" de Ba Jin. Li ankaŭ tradukis antikvajn ĉinajn literaturajn verkojn, inkluzive de "La Libro de Poezioj", Tang-dinastiaj poemoj, Ci-poemoj de Song-dinastio kaj Qu-poemoj de Yuan-dinastio, ktp. Kiel unu el la ĉefaj figuroj de la ĉina esperanta literaturo, Vejdo ne nur okupis diversajn postenojn en esperantaj asocioj, sed ankaŭ estis ĉefredaktoro de literaturaj revuoj kiel "Esperanto-Lernado", "Penseo", kaj "Beletra Edeno".



Dum mia interparolo kun Profesoro Vejdo, mi ankaŭ eksciis pri lia plej nova laborplano kaj liaj opinioj pri la esperanta movado en Ĉinio. Mi ankaŭ fotis kelkajn portretojn de Vejdo, kaptante momentojn de lia dediĉa laboro. Ĉi tiuj fotoj ne nur atestas lian allogan personecon, sed ankaŭ estas la plej altvaloraj memoraroj de mia ĉi-foja vojaĝo al Ĉongĉingo.

## Neforgesebla Sperto de Akra-pikagusta Fonduo

Post forlaso de la hejmo de Vejdo, ni kune iris al tradicia fondua restoracio en la centro de Ĉongĉingo, kie ni ĝuis aŭtentikan akran-pikagustan fonduon. Kiel ikoneca manĝaĵo de Ĉongĉingo, fonduo havas longan historion en la regiono kaj estas fama

pro sia spica, freŝa kaj aroma gusto. Precipe la akragusta bovafunduo estas la plej ŝatata de multaj funduo-amantoj.

Ni mendis akragustan bovafunduon, kiu uzis grandan kvanton da ruĝaj kapsiketoj kaj zantoksiloj. La buljono estis hele ruĝa kaj densa, elsendante fortan akraspican aromon. La bovaĵo estis freŝa kaj delikata, kaj post rapida trempado en la funduo, ĝi rapide sorbis la spican esencon de la buljono. Vejdo instruis min pri la ĝusta tempodaŭro por trempi la bovaĵon, kaj por certigi, ke ĝi restu mola kaj ĝue maĉebla. Dum ni ĝuis la vaporantan funduon, ni daŭrigis nian interŝanĝon de spertoj kaj pensoj pri esperantaj tradukoj. La varmega funduo kvazaŭ aldonis pasion kaj vigelecon al nia diskuto.



En la foto oni povas vidi, ke mi kaj Vejdo sidas antaŭ la vaporanta funduo, ridetante ĝoje. La tablo estis plene ŝarĝata de diversaj manĝaĵoj, inkluzive de bovaĵtranĉaĵoj, anasa sango, kaj toŭf-haŭto, ĉiuj kun la tipa gusto de ĉongĉinga funduo. Vejdo aparte rekomendis la bovaĵon kaj toŭf-haŭton, kaj li atentigis min, ke la bovaĵo devas esti rapide kuirita, dum la toŭfhaŭto bezonas iom pli da tempo por sorbi la gustojn de la buljono.

Per ĉi tiu funduo, mi ne nur gustumis la spican kaj freŝan ĉongĉingan funduon, sed ankaŭ ĝuis agrablan tempon kun Vejdo en varma etoso. La pikanta gusto de la funduo reflektis la senton, kiun Ĉongĉingo donis al mi: impone, entuziasme, kaj neforgeseble.

## Vizitado al la Famaj Vidindaĵoj de Ĉongĉingo

Post ĝuado de la funduo, Vejdo akompanis min viziti kelkajn famajn vidindaĵojn de Ĉongĉingo. Ni unue vizitis la faman por-piedirantan straton ĉe la Liberiga Monumento. Ĝi estas la komerca centro de Ĉongĉingo. La Liberiga Monumento mem estas la sola monumento en Ĉinio dediĉita al la venko en la Milito kontraŭ la Japanio. Ĝi estis unue konstruita en la 1940-aj jaroj kaj simbolas la venkon de la kontraŭjapana milito kaj la heroan reziston de la ĉongĉingaj popoloj. Nuntempe, la areo ĉirkaŭ la monumento estas evoluinta en prosperan komercan kvartalon, kie



staras altaj konstruaĵoj. Tie troviĝas multaj flagŝipaj vendejoj kaj butikcentroj, farante ĝin ŝatata vizitindaĵo de turistoj kaj lokanoj.



En la foto, ni pozas antaŭ la Liberiga Monumento, kaj la fono montras florbedon ornamitan per la vortoj "Vivu la Patrio", speciale por la Nacia Tago. Ĉirkaŭ ni amasiĝis turistoj el ĉiuj partoj de Ĉinio, ĉiuj prenante fotojn kun ĉi tiu simbolo de la urbo. Mi ridetas ĝoje, dum Vejdo afable staras apud mi. Malantaŭ ni, la Liberiga Monumento staras majeste inter modernaj nuboskrapuloj, simbolante la kunfandiĝon de historio kaj moderneco.

Poste, ni alvenis al la kunfluejo de la riveroj Jialing kaj Jangzio. Starante en la placo de Chaotianmen, ni rigardis foren kaj vidis la smeraldan verdan akvon de la rivero Jialing kuniĝi kun la flava akvo de la rivero Jangzio. Tio kreas grandiozan pejzaĝon de la naturo. Tiu vidaĵo, prilumita de la sunlumo, estas aparte kortuŝa. Ĝi simbolas la inkluzivemon kaj forton de la urbo Ĉongĉingo. Vejdo staris ĉe la bordo de la rivero, ridetante kaj klarigante al mi la historian signifon de la kunfluejo de la du riveroj. Mi prenis foton tie, kun la granda antikvstila krosŝipo kaj la senĉese fluantaj riveroj sur la fono.



Poste, Vejdo kondukis min por rigardi foren al la fama vidindaĵo de Ĉongĉingo – la konstruaĵaro Hongyadong. Hongyadong troviĝas en la urbocentro de Ĉongĉingo, konstruita laŭ la montoflanko, kaj estas bone aranĝita. Ĝi estas unu el la reprezentaj konstruaĵoj por montri la kulturen heredaĵojn de Ĉongĉingo. Ĉi tiu unika konstruaĵaro estas fama pro sia tradicia stilo de palafitaj domoj. Ĝi perfekte kombinas modernan urbon kun malnova arkitektura stilo. Vejdo diris al mi, ke ĉiufoje kiam la vespero alvenas, la tuta Hongyadong lumiĝas kiel fabela monturbo, brilega sub la lumo. Mi fotis lin.



En la foto, Vejdo staras sur la vidplatformo de Hongyadong, rigardante trankvile la forajn akvojn de la rivero Jialing. La fono montras la palafitajn domojn kaj la unikajn pejzaĝojn de montoj kaj riveroj en Ĉongĉingo. En la distanco, modernaj altaj konstruaĵoj staras kontraste al la tradicia arkitekturo, kio montras la perfektan kunfandiĝon de la moderna kaj tradicia en Ĉongĉingo. En ĉi tiu pejzaĝo, Hongyadong ne nur estas populara vidindaĵo por turistoj, sed ankaŭ grava orientilo por montri la unikan ĉarmon de Ĉongĉingo.



Poste Vejdo kondukis min por viziti Chaotianmen. Ĝi estis alia grava haltejo en nia vojaĝo. Tie staras la Raffles-konstruaĵo de Ĉongĉingo. Ĝi fariĝis nova simbolo de la urbo pro sia unika formo kaj moderna dezajno. La dezajno de Raffles estis inspirita de la naviga kulturo de Ĉongĉingo. La ŝipvela formo simbolas la urbon ekvelantan en la nova epoko. Ni fotis nin kune sub la Raffles-konstruaĵo. La fono montris la altajn konstruaĵojn, kiuj montras la kombinaĵon de moderna kaj historia Ĉongĉingo.

### Konversacio en tetrinkejo

Poste, ni serĉis trankvilon en bruo kaj iris al tetrinkejo en Ĉongĉingo por ripozi kaj libere konversacii. En ĉi tiu eleganta tetrinkejo, ni trinkis verdan teon kaj ĝuis la raran trankvilan tempon. Vejdo sidis ĉe unu flanko de la teotablo, tenante cigaredon, kaj trankvile rememoris sian historion kun Esperanto. Li precipe parolis pri sia studado kaj praktikado de Esperanta literatura traduko. Li rakontis al mi pri la malfacila historio de tradukado kaj publikigado de la Esperanta versio de la libro "La Familio" de Ba Jin, kaj la defioj de tiu grava periodo.

Vejdo kortuŝe diris, ke s-ro Ba Jin forte subtenis la eldonaĵon de la Esperanta versio kaj eĉ rifuzis aŭtoran tantiemon por certigi la eldonadon de tiu grava verko. Malgraŭ la malfacilaĵoj, ĉi tiu kunlaboro estis ne nur grava momento en la traduka kariero de Vejdo, sed ankaŭ grava atesto de la disvolviĝo de Esperanta literaturo. Li bedaŭris, ke li ne sukcesis fotiĝi kun Ba Jin, tamen lia respekto por la alta moralo de Ba Jin estis klara.



La aromo de teo disvastiĝis en la aero, kaj nia konversacio daŭris en malpeza sed profunda atmosfero. Ni ankaŭ parolis pri nia internacia projekto pri la Esperanta versio de "La Libro de Poezio" kaj la planoj de Vejdo por estontaj laboroj. Ĉi tiu foto kaptis ĉi tiun momenton, kie mi kaj Vejdo trinkis teon kaj dividis tiujn valorajn memorojn. Tiu trankvila tempo fariĝis neforgesebla epizodo en mia vojaĝo al Ĉongĉingo.

## Ĉongĉinga Artgalerio

Post la fino de la tea konversacio, Vejdo kondukis min al la fama kultura orientilo de Ĉongĉingo – la ekstero de la Ĉongĉinga Artgalerio. Mi faris foton de li tie. La konstruaĵo de la Ĉongĉinga Artgalerio havas unikan formon. Ĝia ekstero uzas ruĝan elstaran strukturon, inspiritan de la tradicia ĉina dezajno de doŭgong-o. Ĉi tiu dezajno montras ne nur elementojn de tradicia kulturo, sed ankaŭ kombinas modernan arkitekturan stilon. Tiel ĝi fariĝis unu el la simbolaj konstruaĵoj en la centro de Ĉongĉingo. En la artgalerio ofte estas ekspozicioj de enlandaj kaj eksterlandaj artaĵoj. Ĝi estas grava loko por civitanoj kaj turistoj por ĝui arton kaj senti la kulturen etoson.



En la foto, Vejdo staras antaŭ la artgalerio. La fono estas la tre moderna konstruaĵo, kaj lia esprimo estas trankvila kaj memfida. La konstruaĵo havas elstaran ruĝan eksteron kaj tavoloigitan dezajnon, kiu donas gravan kaj impresan senton. Ĝi simbolas la gravecon, kiun Ĉongĉingo donas al arto kaj kulturo.

## Ĉongĉingo-nudeloj

En la vespera horo, mi invitis Vejdon por kune ĝui la specialan manĝeton de Ĉongĉingo – Ĉongĉingo-nudeloj. Ĉongĉingo-nudeloj estas tre reprezenta tradicia manĝaĵo en la regiono de Ĉongĉingo, konata pro sia spica kaj bongusta gusto. La nudeloj estas elastaj, kaj oni kombinas ilin kun diversaj spicaĵoj kaj aldonaĵoj,

precipe kun sia unika ruĝa oleo el kapsiketoj, kio faras ĉi tiun manĝeton tre fama tra la tuta lando.



En la bildo, Vejdo atente gustumas la Ĉongĉingo-nudelojn. Antaŭ li staras bovlo da klasikaj nudeloj kun flosantaj verdaĵoj, faboĝermoj, terpomaĵoj kaj arakidoj, ĉiuj enhavantaj la aŭtentan guston de Ĉongĉingo. Mi kaptis la momenton kiam li koncentriĝis je ĝuado de ĉi tiu manĝaĵo kaj delikate premis la butonon por registri tiun naturan foton.

Ĉongĉingo-nudeloj, kiel parto de la ĉiutaga vivo de la lokanoj, estas ne nur ekonomiaj kaj atingeblaj, sed ankaŭ plenaj de la stimula spica gusto. Por tiuj, kiuj gustumas ilin por la unua fojo, ĝi eble estas defio por la gustumado. Sed por tiuj, kiuj bone konas ilin, ĝi estas neforgesebla gusto de la hejmloko. Dum Vejdo gustumis la nudelojn, li samtempe rakontis al mi interesajn rakontojn pri sia vivo en Ĉongĉingo kaj sian opinion pri manĝaĵoj.

## La Nokta Pejzaĝo de Ĉongĉingo

Post la vespermanĝo, mi adiaŭis Vejdon en la buso. Post la adiaŭo, mi decidis promeni sole kaj alvenis al la bordo de la Jialing rivero por ĝui la noktan pejzaĝon. La nokto de ĉi tiu urbo havas apartan ĉarmon, precipe ĉe la riverbordo, kie la brile lumigitaj altaj konstruaĵoj reflektiĝas en la rivero, kreante imponan urbovidon.



Mi fotis ĉi tiun noktan pejzaĝon. En la bildo, la urbosilueto de Ĉongĉingo estas lumigita per buntaj lumoj, kaj la diverskoloraj lumoj reflektiĝas en la akvo, kvazaŭ vestante la urbon per luksa mantelo. La malproksimaj altaj konstruaĵoj aspektas kiel lumturoj, iluminantaj la noktan ĉielon. Ili montras la prosperon kaj vigecon de ĉi tiu moderna metropolo. Ĉi tiu foto ne nur kaptas la ĉarman noktan pejzaĝon de Ĉongĉingo, sed ankaŭ registras la belan tempon, kiun mi travivis en ĉi tiu urbo.

## Homamaso en Hongyadong

Kiam nokto falis, mi daŭrigis mian promenadon laŭ la bordo de la Jialing Rivero kaj atingis la faman fotolokon de Ĉongĉingo – Hongyadong. Ĉi tiu domkomplekso konstruita laŭ la montoflanko, brilas per lumoj nokte kaj kreas ĉarman luman efikon. Mi haltis por admiri ĝin kaj fotis du bildojn por kapti la unikan belecon de ĉi tiu monturbo.



La unua foto montras la tutan panoramon de la konstruaĵaro Hongyadong. La tuta komplekso sub la lumoj aspektas kiel brila palaco kun antikva stilo kaj pluraj tavoloj de palafitaj domoj. Ĝi kontrastas kun la modernaj nubsrapuloj, kiuj staras malantaŭe. La lumoj de Hongyadong estas varmaj kaj brilaj, allogante multajn turistojn por halti kaj fari fotojn.

La dua foto speciale kaptis la scenon de granda homamaso antaŭ Hongyadong. Dum la Nacia Tago, Hongyadong fariĝis unu el la plej homplenaj fotolokoj, kun plenplena piedvojo de turistoj, kiuj fervore faras fotojn kaj ĝuas la imponan vidan efikon de la konstruaĵoj. La homamaso en la foto moviĝas kiel ondoj, montrante la popularecon de Hongyadong dum ferioj. Ĉi tiu sceno ne nur montras la vigecon de Hongyadong, sed ankaŭ reflektas la allogon de Ĉongĉingo kiel turisma celloko.



## La nostalgia etoso de la antikva urbeto Ciqikou

Post mia vizito al Vejdo kaj la komuna ekskurso al iuj famaj vidindaĵoj de Ĉongĉingo, la sekvan tagon mi sole vizitis la antikvan urbeton Ciqikou kaj la ruĝajn turismajn lokojn de Ĉongĉingo – Zhazidong kaj Baigongguan.



Unue, mi alvenis al la antikva urbeto Ciqikou. Ĉi tiu urbeto situas en la distrikto Shapingba de Ĉongĉingo kaj konservas multajn tradiciajn konstruaĵojn kaj antikvajn stratojn. Ĝi iam estis grava komerca haveno ĉe la rivero Jialing, kaj nun fariĝis populara turisma loko. En la bildo vidiĝas unu el la enirejoj de Ciqikou, kie la malnovaj palafitaj domoj montras la unikan stilon de la lokstila arkitekturo. Tiuj konstruaĵoj estas konstruitaj laŭ la montoflanko, kun ligna ŝtupetaro kaj platformoj, kio donas imponan aspekton. Sur la placo de la urbeto, granda termometra skulptaĵo altiras la atenton de turistoj kaj fariĝis fotopunkto. Je la placo, vendistoj vendas lokajn manĝaĵojn kaj manfaritaĵojn, montrante la vigan atmosferon de la urbeto.

Mi malrapide marŝis laŭ la ŝtonplata vojo, sentante la historian kaj kulturalan etoson de la antikva urbeto. Sur la antikva strato estis multaj homoj, kaj turistoj senĉese venis kaj iris. La bongustaĵoj en la butikoj kaj budoj estis tre allogaj. Ĉi tie ne nur troviĝis tradiciaj manĝaĵoj de Ĉongĉingo kiel *malatang* supo, glacigita deserto kaj frititaj terpomoj, sed ankaŭ metiartaĵoj kaj memoraĵoj en vendado. Promenante inter la historiaj konstruaĵoj, mi sentis kvazaŭ mi reirus al la pasinteco kaj spertus la iamajn prosperajn tempojn de ĉi tiu urbeto. La antikva urbeto Ciqikou konservas la pezon de historio kaj samtempe plenas je moderna turisma vicleco, aldonante tute alian sperton al mia vizito en Ĉongĉingo.

## La pezaj memoroj de Zhazidong kaj Baigongguan

Post kiam mi vizitis la antikvan urbeton Ciqikou, mi daŭrigis mian vojon al la ruĝaj turismaj lokoj de Ĉongĉingo – Zhazidong kaj Baigongguan. Ĉi tiuj lokoj estis malliberejoj, kie revoluciaj batalantoj estis tenitaj antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, kaj ili atestas tiun doloran historion. Dum la Nacia Festo, Zhazidong altiris grandan nombron da turistoj, kaj la sceno estis tre impresa.



En la foto oni vidas, ke la vojo al Zhazidong estas plena de homoj, kaj turistoj paŝas laŭ la serpentuma ŝtuparo. Densaj arboj kovras la sunon, kaj la verdaĵoj flanke de la vojo akcentas la movadon de la homamaso. De sur la montodeklivo, mi sentis la solenon de la loko kaj la respekton de la turistoj al la revoluciaj martiroj. Kvankam la vizitvojo estas mallarĝa kaj kurba, la homoj sekvas la ordon kaj iras silente, kvazaŭ memorante tiun nevenkeblan historion. Ĉi tiu vizito donis al mi pli profundan komprenon pri la malfacilaĵoj de la revolucio kaj la graveco de la nuna paco, kaj Zhazidong kiel ruĝa turisma loko memorigas nin ne forgesi la pasintajn suferojn kaj oferojn.

## Neforgesebla vojaĝo

Ĉi tiu vojaĝo al Ĉongĉingo ne nur permesis al mi sperti la prosperon kaj unikan ĉarmon de la urbo, sed ankaŭ donis al mi la ŝancon intime renkonti profesoron Vejdo. De la vigla porpiediranta strato de Jiefangbei ĝis la brilanta nokta pejzaĝo de Hongyadong, kaj al la imponaj pejzaĝoj ĉe la kunfluejo de la riveroj Jialing kaj Jangzio, ĉiu loko en la monturbo Ĉongĉingo ravis min. La alloga personeco, scioj kaj entuziasmo de Vejdo pri Esperanto ankaŭ profunde inspiris min. Ĉu dum niaj konversacioj en la tetrinkejo, ĉu dum ni kune ĝuis Ĉongĉingo-an fonduon kaj nudelojn, mi sentis la varmon kaj ĉarmon de la urbo. Ĉi tiu vojaĝo estis ne nur kultura kaj gastronomia esplorado, sed ankaŭ neforgesebla memoro, kiun mi ĉiam tenos en mia koro. ※